

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso
Manifesto de la Komunista Partio
kun enkonduko de *Eric Hobsbawm*

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso

**Manifesto
de la
Komunista Partio**

kun enkonduko de *Eric Hobsbawm*

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso:
Manifesto de la Komunista Partio
kun enkonduko de *Eric Hobsbawm*
tradukitaj de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)
2015
ISBN 978-2-918300-91-5

La ĉi tie prezentata teksto de la *Manifesto* aperas en nova traduko post la eldono de Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de *Detlev Blanke* (1990), *Emil Pfeffer* (1923), *Arturo Baker* (1908), (T. *Veder* [1933] kaj la germana originalo (librofina listo de MAS-libroj n-ro 52).

La germanlingva originalo de tiu ĉi traduko estas: *Karl Marx, Friedrich Engels: Werke* [Karlo Markso, Frederiko Engelso: Verkaro] (MEW), *Dietz Verlag*, Berlino, Germana Demokratia Respubliko, vol. 4, 6-a eld. 1972, senŝanĝa represo de la 1-a eld. 1959, saml., p. 459-493.

La teksto de *Eric Hobsbawm* estas tradukita el *Karl Marx und Friedrich Engels: Das Kommunistische Manifest, eine moderne Edition; mit einer Einleitung von Eric Hobsbawm, Argument-Verlag*, Hamburgo, 1999, 7-a eldono 2010 [Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: La komunista manifesto, moderna eldonaĵo, kun enkonduko de *Eric Hobsbawm*], p. 7-38.

Tiun ĉi libron la tradukinto dediĉas al

Gerardo Hernández Nordelo,
Ramón Labañino Salazar,
Antonio Guerrero Rodríguez,
Fernando González Llort kaj
René González Sehwerert¹

1 La Kvin Kubanoj – aŭ la Kuba Kvinopo – , kiuj estis sin enŝovintaj en la teroristajn grupojn de Miamo, Usono, por neŭtraliigi ilin. La Kvin sukcesis malhelpi cent sepdek atencojn kontraŭ Kubo per tio, ke ili ĝustatempe alarmis la instancojn en Havano. La kuba registaro informis tiam la usonajn instancojn kaj, en junio 1998, delegacio de la usona FBI vojaĝis al Kubo, kie ĝi ricevis kompletan dokumentaron pri la agadoj de la ekstremistoj de Miamo.

Post konatiĝi kun la informoj kaj la nerefuteblaj pruvoj pri la kontraŭleĝaj kaj danĝeraj agadoj de tiuj grupoj, la FBI, anstataŭ agi kontraŭ tiuj krimuloj, arestigis la kvin informantojn, kiuj, riske de siaj vivoj, estis barintaj tiujn teroraĵojn. Ili estis en Miamo kondamnitaj al longaj jaroj de malliberejo, ekz-e Gerardo al pli ol duoble vivolonga malliberejo.

Pri tiu justicskandalo vidu en Esperanto Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo; La Kuba Kvinopo (librofina librolisto n-ro 19). Komparu ankaŭ Jean-Guy Allard: Teroristoj de Usono kontraŭ Latinameriko (librofina librolisto n-ro 94)

En 2014, du el la kvin jam estis plenumintaj sian punon kaj revenintaj al Kubo. Fine, post pli kaj pli intensa premo de nobelpremiitoj, de la papo, de neregistaraj organizaĵoj en kaj ekster Usono, kaj post serio da artikoloj en la influhava gazeto *The New York Times* pri Kubo kaj ankaŭ pri tiuj kvin kubanoj, la prezidantoj Barack Obama kaj Raŭl Castro interkonsentis pri interŝanĝo de la restantaj tri kubanoj kun du usonaj spionoj kondamnitaj en Kubo. La 17-an de decembro 2014, tiuj tri, Gerardo, Antonio kaj Ramón revenis – post pli ol 15 jaroj da usona malliberejo – liberigitaj al Kubo, kie amasoj akceptis kun granda ĝojo kaj kontentiĝo sian Kuban Kvinopon kiel heroojn. Kaj herooj ili ja certe estas, se entute tiu vorto havas sencon. Komentoj pri tio, de la kuba kaj usona prezidantoj, de la papo Francisko kaj de aliaj vidu en la repaĝo de MAS : <<http://mas-eo.org>>.

Enhavo

Eric Hobsbawm: Enkonduko.....	9
1.....	9
2.....	17
3.....	21
4.....	25
5.....	33
Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio.....	35
Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio” (germana eldono de 1872)].....	36
Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la dua rusa eldono de 1882.....	39
Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la germana eldono de 1883.....	42
Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio” (angla eldono de 1888)].....	44
Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la kvara germana eldono (1890).....	52
Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la dua pola eldono (1892) de la „Manifesto de la Komunista Partio”].....	59
Frederiko Engelso: Al la itala leganto [Antaŭparolo al la itala eldono (1893)].....	61
Manifesto de la Komunista Partio.....	63
1. Burĝoj kaj proletoj.....	65
2. Proletoj kaj komunistoj.....	79
3. Socialista kaj komunista literaturo.....	88
3.1. La reakcia socialismo.....	88
3.1.1. La feŭda socialismo.....	88
3.1.2. Etburĝa socialismo.....	90
3.1.3. La germana aŭ „vera” socialismo.....	92
3.2. La konservativa aŭ burĝa socialismo.....	95
3.3. La kritike utopiecaj socialismo kaj komunismo.....	97
4. Pozicio de la komunistoj rilate al la diversaj opoziciaj partioj.....	100
Postparolo de la tradukinto.....	104
Principoj de tiu ĉi traduko.....	106

Principoj de prezentado.....	108
Depruntoj el antaŭaj tradukoj.....	108
Mallongigoj.....	111
Sigloj.....	112
de tradukintoj.....	112
aliaj sigloj.....	113

Eric Hobsbawm: Enkonduko

1

En la printempo de 1847 Karlo Markso kaj Frederiko Engelso deklaris sin pretaj aliĝi al la tiel nomata *Ligo de la Justuloj*, ido de la antaŭa *Ligo de la Elpelitoj*, de revolucia sekreta ligo, kiu fondiĝis en la 1830-aj jaroj en Parizo, sub franca revolucia influo, de germanaj meti-submajstroj – precipe tajloristoj kaj ĉarpentistoj – kaj kies membroj konsistis ankaŭ en tiu tempo plejmulte el radikalaj metiistoj vivantaj ekzile. La Ligo – konvinkita pri sia „kritika komunismo” – proponis al Markso kaj Engelso, ke ili redaktu manifeston kiel ĝian politikan programon, ke ĝi publikigu ĝin kaj ke ili modernigu ĝian organizaĵon laŭ siaj ideoj. Efektive ĝi estis en la somero de 1847 reorganizita, alinomita *Ligo de la komunistoj*, kies deklarita celo estis „faligo de la burĝaro, regado de la proletaro, forigo de la malnova burĝa socio baziĝanta sur klasaj kontraŭecoj kaj la fondo de nova socio sen klasoj kaj sen privata proprieto”. Dua kongreso de la Ligo, kiu okazis en novembro kaj decembro de 1847 ankaŭ en Londono, formale decidis la celojn kaj statutojn kaj instigis Markson kaj Engelson koncepti novan manifeston, kiu prezentu la celojn kaj la politikon de la ligo.

Markso kaj Engelso jam laboris ambaŭ pri konceptoj, kaj la dokumento klare montras ilian komunan ideon. Sed la fina redakto estis plej verŝajne farita de Markso – tamen nur post energia admono flanke de la gvidantoj, ĉar Markso tiam kaj poste malfacile finpretigis siajn tekstojn alie ol sub la premo de fiksa liverdato. Ĉar preskaŭ tute ne ekzistas antaŭaj malnetaĵoj,

oni rajtas supozoj, ke la teksto estis verkita seninterrompe.¹ La rezulto, dokumento de 23 paĝoj kun la titolo *Manifesto de la Komunista Partio* (ekde 1872 pli ĝenerale konata kiel *La Komunista Manifesto*), estis „publikigita en februaro 1848” – presita en la oficejo de la „Kleriga societo por laboristoj” („*Bildungs-Gesellschaft für Arbeiter*”), pli bone konata kiel „Komunista asocio de laborista klerigo” („*Communistischer Arbeiterbildungsverein*”), kiu transvivis ĝis 1914, en la *Liverpool Street* n-ro 46, Londono.

En la jaro 1998 ni festis la 150-an datrevenon de la publikigo de tiu ĉi malgranda pamfleto, kiu estas kun certeco la plej influrika politika unuopa verko post la *Deklaro de la rajtoj de la homo kaj de la civitano* de la Franca Revolucio. Ĝi estis liverita – kia favoro de la cirkonstancoj! – unu respektive du semajnojn antaŭ la eksplodo de la revolucioj de la jaro 1848, kiuj fulmrapide disvastiĝis de Parizo tra la tuta Eŭropo. Kvankam ĝia horizonto estis decide internacia (en la unua eldono oni anoncis esperplene tuj okazontajn publikigojn de la manifesto ankaŭ en la angla, la franca, la itala, flandra kaj dana lingvoj, sen ke tio en tiu momento realiĝis), ĝi komence disvolvis efikecon ekskluzive en Germanujo. Kvankam la Ligo de komunistoj estis malgranda, ĝi ludis ne malgravan rolon en la germana revolucio, nelaste per la *Nova Rejna Gazeto* (*Neue Rheinische Zeitung*), eldonata de Markso (de 1848 ĝis 1849). La unua eldono de la *Manifesto* estis ene de malmultaj monatoj trifoje postpresita, en la *Germana Londona Gazeto* (*Deutsche Londoner Zeitung*) ĝi aperis per daŭrigoj. En aprilo aŭ majo 1848 ĝi estis korektita kaj nove enpaĝigita – ĉi-foje sur 30 paĝoj –, sed kun la fiasko de la 1848-aj revolucioj ĝi malaperis el la vido. En la jaro 1949 Markso – ĵus alveninta en Anglujo por sia vivolonga ekzilo – ankoraŭ juĝis taŭga presi la parton III (Socialista kaj komunista literaturo) de la *Manifesto* en sia londona revuo *Nova Rejna Gazeto*, *Politika-ekonomia revuo* (*Neue Rheinische Zeitung*, *Politisch-Ökonomische Revue*) en novembro 1850, sed

1 Kiel prepara materialo troviĝis nur superrigardo por la parto III kaj unu sola paĝo de la malneto; vd *Marx-Engels-Werke*, Berlino (GDR), 1952sj, vol. 4 (en la sekvo mallongigite: MEW 4), p. 610.

ĝi trovis apenaŭ legantojn.

Neniu en la 50-aj kaj komence de la 60-aj jaroj de la 19-a jarcento estus al la *Manifesto* antaŭdirinta eksterordinaran estontecon. Elmigrinta germana presisto en Londono estigis nepublikan noveldonon en malgranda eldonkvanto, verŝajne en la jaro 1864, kaj kroma eldono aperis en malmultaj ekzempleroj en Berlino en la jaro 1866 – fakte la unua en Germanujo eldonita. Ŝajnas, ke inter 1848 kaj 1868 ne okazis tradukoj, escepte de sveda eldono, verŝajne publikigita fine de 1848, kaj angla eldono en 1850, kiu aperas en la bibliografia historio de la *Manifesto* nur ĉar la tradukintino ŝajnas esti konsultinta Markson aŭ (ĉar ŝi loĝis en Lankaŝiro) verŝajne Engelson. Ambaŭ eldonoj malaperis sen postlasi spuron. En la jaro 1865 praktike neniu el la tekstoj publikigitaj de Markso estis plu akirebla.

La konateco de Markso en la Internacia Laborista Asocio (la tiel nomata Unua Internacio, 1864-1872) kaj la estiĝo de du gravaj partioj de la laborista klaso en Germanujo – ambaŭ fonditaj respektive de eksa membro de la Ligo de Komunistoj, kiuj ambaŭ tre estimis Markson – revigligis la intereson pri la *Manifesto* kaj pri liaj aliaj verkoj. Speciale lia lerta defendo de la Pariza Komunumo 1871 („La interna milito en Francujo”)² famigis lin ĉe la gazetaro kiel danĝera, de la registaroj timata gvidanto de la internacia subfosado. Ĉefe la proceso pro ŝtatperfido kontraŭ la gvidantoj de la germana socialdemokratara Vilhelmo Libkneĥto, Aŭgusto Bebelo kaj Adolfo Hepnero³ en marto 1872 donis al la dokumento neatenditan konatecon. La prokuroro ĉe la tribunalo igis la tekston protokoli, kio por la unua fojo donis al la socialdemokratoj la eblecon publikigi ĝin en alta eldonkvanto kiel parton de la procesa protokolo. Ĉar estis klare, ke dokumento publikigita antaŭ la revolucio de 1848 bezonis aktualiĝon kaj klarigajn notojn,

2 Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871) (La Pariza Komunumo) kun enkonduko de Frederiko Engelso. Tradukis Vilhelmo Lutermano. Mondial, Novjorko, 2005, 137 p., ISBN 1-59569-025-5. -v1

3 Germane respektive: *Wilhelm Liebknecht* [vîlhelm líbkneĥt], *August Bebel* [áŭgust bébel], *Adolf Hepner* [ádolf hépner]. -v1

Markso kaj Engelso redaktis la unuan el serio da antaŭparoloj, kiuj de tiam kutime akompanis la novajn eldonojn de la *Manifesto*.⁴ Pro la leĝa situacio la antaŭparolo estis tiam ne larĝe disvastigebla, sed fakte la eldono de 1872 (kiu baziĝis sur tiu de 1866) fariĝis la bazo de ĉiuj postaj noveldonoj. Inter 1871 kaj 1873 ja aperis almenaŭ naŭ eldonoj de la *Manifesto* en ses lingvoj.

En la postaj kvardek jaroj la *Manifesto* konkeris la mondon, tirata de la supreniro de la novaj (socialistaj) laboristpartioj, en kiuj la marka influo rapide etendiĝis en la jardeko de 1880 ĝis 1890. Neniu el tiuj partioj tiam nomis sin Komunista Partio. Nur la rusaj bolŝevistoj revenis post la Oktobra Revolucio al la origina nomo. Sed la titolo *Manifesto de la Komunista Partio* restis senŝanĝa.

Jam antaŭ la Rusa Revolucio de 1917 la *Manifesto* estis aperinta en kelkcent eldonoj en proksimume tridek lingvoj, inkluzive de tri japanaj eldonoj kaj unu ĉina. Sed ĝia precipa influregiono restis la centreŭropa spaco de Francujo en la okcidento ĝis Ruslando en la oriento. Certe ne estas surprize, ke la plej multaj eldonoj aperis en la rusa (70), kaj kromaj 35 eldonoj en la lingvoj de la cara regno – la pola (11), la jida [aŭ judgermana] (7), finna (6), ukraina (5), georga (4) kaj la armena (2). 55 germanaj eldonoj estis aperintaj, krome en la habsburga regno naŭ hungaraj, ok ĉeĥaj (sed nur tri kroataj kaj po unu slovaka kaj slovena). 34 eldonoj en la angla (inkluzive de Usono, kie la unua traduko aperis en la jaro 1871), 26 en la franca kaj

4 Dum la vivtempo de la du aŭtoroj tiuj antaŭparoloj estis 1-e: Antaŭparolo al la (dua) germana eldono 1872; 2-e: Antaŭparolo al la (dua) rusa eldono 1882 – la unua rusa traduko de Bakunino* aperis 1869, kompreneble sen la beno de Markso kaj Engelso; 3-e: Antaŭparolo al la (tria) germana eldono 1883; 4-e: Antaŭparolo al la angla eldono 1888; 5-e: Antaŭparolo al la (kvara) germana eldono 1890; 6-e: Antaŭparolo al la pola eldono 1892; 7-e: Al la itala leganto (1893). Vd MEW 4, p. 573 sj. -mev

– En Esperanto, en tiu ĉi libro p. 36-62. -vl

*) *Miĥail Aleksandroviĉ Bakunin* (1814-1876), rusa revoluciulo. Li partoprenis en la revolucioj de 1848 en Parizo kaj Prago. Li estis membro de la 1-a Internacio (1868-1872) kaj kiel teoriulo de la anarĥiismo kontraŭis Markson. -vl

dek unu en la itala – unuafaje en la jaro 1889.⁵ Ĝia efiko en sudokcidenta Eŭropo estis malgranda – ses eldonoj en la hispana (inkluzive de la latin-amerika), unu en la portugala. La samo validas pri sudorienta Eŭropo (sep bulgaraj, kvar serbaj, kvar rumanaj eldonoj kaj unu sola, verŝajne en Saloniko publikigita eldono en la ladina). Nordeŭropo estis relative bone reprezentita kun ses danaj, kvin svedaj kaj du norvegaj eldonoj.⁶

En tiu malegala geografia dispartiĝo speguliĝas ne nur la malegala evoluo de la socialista movado kaj de la influo de Markso – alie ol ĉe aliaj revoluciaj ideologioj, ekz-e tiu de la anarĥiismo. Ĝi memorigu nin ankaŭ, ke la granda kaj influo de la socialdemokrataj kaj laboristaj partioj kaj la eldonkvanto de la *Manifesto* tute ne egalas. Ekzemple la Socialdemokrata Partio de Germanujo kun siaj pluraj centmiloj da membroj kaj siaj milionoj da elektantoj presis la noveldonojn de la *Manifesto* ĝis 1905 en eldonkvanto de ĝuste 2.000 ĝis 3.000 ekzempleroj. La Erfurtan Programon de 1891 la partio presigis en eldonkvanto de 120.000, male de la *Manifesto* verŝajne ne pli ol 16.000 ekzemplerojn en la dek unu jaroj de 1895 ĝis 1905, kiam la eldonkvanto de ĝia teoria revuo *Die Neue Zeit* [di n^oje c^{aj}t, La Nova Tempo] estis 6.400 ekzempleroj.⁷ De ordinara membro de marksisma socialdemokrata amaspartio oni ne atendis sukcesajn ekzamenojn pri teorio. Inverse, la sepdek antaŭrevoluciaj rusaj eldonoj reprezentas kombinaĵon de plej ofte kontraŭleĝaj organizaĵoj, kies tuta membraro ne povis esti pli ol kelkmil. Same la 34 anglaj eldonoj estis publikigitaj de kaj por unuopaj marksistaj sektoj en la anglosaksa mondo, kiuj agadis ĉe la maldekstra alo de la ekzistantaj laboristaj kaj socialistaj partioj. Tio estis la medio, en kiu „la rektlinieco de kamarado mezureblis senescepte laŭ la falditaj paĝanguloj

5 *Paolo Favilli, Storia del marxismo italiano. Dalle origini alla grande guerra*, Milano, 1996, p. 252-254.

6 Mi referencas la indikojn en la ekstreme meritplena publikigaĵo de Bert Andréas, *Le Manifeste Communiste de Marx et Engels. Histoire et Bibliographie 1848-1918*, Milano, 1963.

7 Nombroj laŭ la ĉiujaraj protokoloj de la SPD-kongresoj. Por 1899 kaj 1900 tamen mankas indikoj pri teoriaj publikigaĵoj.

de lia Manifesto”.⁸ Mallonge, la legantoj de la *Manifesto* estis ja parto de la novaj kaj supreniĝantaj socialistaj laboristpartioj kaj movadoj, sed certe ne reprezenta sekcio de la membraro. Ili estis viroj kaj virinoj kun aparta intereso pri la teorio, kiu estis la bazo de tiuj movadoj. Tio estas verŝajne daŭre la kazo.

La situacio ŝanĝiĝis post la Oktobra Revolucio, speciale en la komunist-aj partioj. Kontraste al la amaspartioj de la Dua Internacio (1889-1914) la partioj de la Tria Internacio (1919-1943) atendis de siaj membroj komprenon aŭ almenaŭ kelkajn konojn de marksisma teorio. La diĥotomio inter la influriĉaj politikaj gvidantoj, kiuj ne tre interesiĝis pri verkado de libroj, kaj la „teoriuloj” kiel ekzemple Karlo Kaŭcko⁹ – kiu estis ja konata kaj estimata, sed ne kiel praktika politikisto enligita en decidoj – iom post iom malaperis. Laŭ Lenino ĉiuj gvidantoj estis gravaj teoriuloj, ekde kiam la politikaj decidoj estis pravigataj per „marksismaj analizoj”, tamen plej ofte nur per referencoj de la aŭtoritato de la tekstoj de la „klasikuloj” Markso, Engelso, Lenino kaj poste Stalino. La publikigado kaj larĝa disvastigo de la tekstoj de Markso kaj Engelso fariĝis por la movado multe pli grava ol tempe de la Dua Internacio. Tio etendiĝis de serio de malgrandaj skribaĵoj – pioniroj estis verŝajne la *Elementarbücher des Kommunismus* (Bazaj libroj de la komunismo) tempe de la germana Vajmara Respubliko¹⁰ – tra bone

8 Robert R. LaMonte, „*The New Intellectuals*”, en: *New Review* II, 1914, ciita laŭ Paul Buhle, *Marxism in the USA. From 1870 to the present day*, Londono, 1987, p. 56.

9 Germane: *Karl Kautsky* [kárl káŭcki] (1854-1938), sekretario de Engelso (en 1881) kaj marksisto, publikigis la 4-an volumon de la „Kapitalo” de Markso („Teorioj pri la plusvaloro”), kontraŭargumentis la reviziismon de *Eduard Bernstein* [édüart bérnštajn], direktis ĝis 1917 *Die Neue Zeit* [di nóje cájt], la teoria organo de la germana socialdemokratara kaj poste kontraŭis la bolŝevismon („Terorismo kaj komunismo”), en la jaro 1919. -vl

10 La Vajmara Respubliko estis la germanuja respubliko de 1919 – 1933, organizita laŭ konstitucio voĉdonita en Vajmaro kaj ĉesigita per transdono de la potenco al la germanaj faŝistoj sub Hitlero, fare de la prezidanto Hindenburgo kun la apogo de la granda kapitalo kaj de la plejparto el la burĝaj partioj. -vl

prilaboritaj kunmetaĵoj – ekz-e la altvalora eldono de *Elektitaj leteroj de Markso kaj Engelso* (*Ausgewählte Briefe von Marx und Engels*) kaj la *Elektitaj verkoj* (*Ausgewählte Werke*) en du, poste en tri volumoj – ĝis la eldono de la kompleta verkaro. Tiuj publikigaĵoj estis subtenataj de la sovetia Komunista Partio per – por tiu celo – kvazaŭ senlimaj rimedoj kaj tre ofte en Sovetio presataj en multaj fremdaj lingvoj.

La *Komunista Manifesto* profitis de tiu nova situacio en tri rilatoj. Sen ajna dubo la eldonkvantoj altiĝis. La malmultekosta eldono, presita en 1932 de la oficialaj eldonejoj de la usona kaj brita Komunistaj Partioj en „cent-miloj” da ekzempleroj, estis nomita la „eble plej eldonkvanta poŝlibro, kiu iam ajn aperis en la angla”.¹¹ La titolo indikis nun jam ne historian fosilion, sed estis rekte kuplita kun la aktuala politiko. Ĉar unu el la grandaj ŝtatoj pretendis reprezenti la marksisman ideologion, la graveco de la *Manifesto* estis fortigita en la politika scienco. Laŭ tio ĝi estis enprenata en la instru-planojn de universitatoj, kio post la Dua Mondmilito nepre kaj rapidege multiĝis kaj tie, inter la intelektuloj de la 60-aj kaj 70-aj jaroj de la 20-a jarcento, la marksismo trovis sian plej entuziasman publikon.

La USSR aperis el la Dua Mondmilito kiel unu el la du superpotencoj – ĉepinte de giganta regiono de komunistaj ŝtatoj kaj teritorioj. La komunistaj partioj en la Okcidento (kun la notinda escepto de la germana) estis post la milito pli fortaj ol iam ajn antaŭe. Kvankam la Malvarma Milito jam komenciĝis, la Manifesto en la jaro de sia 100-a naskiĝtago estis publikigata ne nur de komunistoj aŭ de komunistaj eldonejoj, sed en altaj eldonkvantoj kaj kun antaŭparoloj de konataj universitatanoj ankaŭ de nepolitikaj eldonistoj. Mallonge, ĝi fariĝis ne nur klasika dokumento de la marksismo, sed politika klasikulo.

Tia ĝi estas ankaŭ ĝis nun, eĉ post la fino de la sovetkomunismo kaj la pereco de la marksismaj partioj kaj movadoj en grandaj partoj de la mondo.

11 *Hal Draper, The Annotated Communist Manifesto* [La prikomentita Komunista Manifesto], *Berkeley (Center for Socialist History)*, 1984, p. 64.

En ŝtatoj sen cenzuro preskaŭ ĉiuj homoj kun atingodistanco de bona libro-vendejo kaj kun certeco ĉiuj kun atingodistanco de bona biblioteko havas aliron al tiu teksto. La celo de tiu ĉi novelddono¹² 150 jarojn post la unua apero do estas ne tiom alirebligi la tekston de tiu miriga majstroverko, ankoraŭ malpli prezenti jarcenton da doktrinaj debatoj pri la „ĝusta” interpreto de tiu fundamenta teksto de la marksismo. Pli ĝuste ĝi memorigu nin, ke la *Manifesto* ĉe la sojlo de la 21-a jarcento havas daŭre multon por diri al la mondo.

12 Temas pri la lastatempa germana eldono de la *Manifesto: Karl Marx und Friedrich Engels: Das Kommunistische Manifest, eine moderne Edition; mit einer Einleitung von Eric Hobsbawm, Argument-Verlag, Hamburgo, 1999, 7-a eldono 2010 [Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: La komunista manifesto, kun enkonduko de Eric Hobsbawm]* – do la germana versio de tiu ĉi teksto de Hobsbawm. -vl

2

Kion do ĝi havas al ni por diri?

Ĝi estas kompreneble dokumento verkita por certa momento de la historio. Kelkaj elementoj en ĝi fariĝis preskaŭ tuj sensignifaj, ĉar fakte oni procedis dum la revolucio de 1848 kaj poste tute alie. Aliaj elementoj arĥaikiĝis kun kreskanta distanco de la legantoj al la momento de ĝia redaktiĝo. Guizot kaj Metternich delonge adiaŭis de la registara pinto por eniri la histori-librojn, la caro jam ne estas (tamen jes la papo). Koncerne la diskuton pri la „socialista kaj komunista literaturo”, Markso kaj Engelso en la jaro 1872 mem koncedas, ke ĝi estis jam tiam ne kompleta.

Sed kio estas multe pli grava: Kun la tempo la lingvo de la *Manifesto* jam ne estis la lingvo de ĝiaj legantoj. Ekz-e oni vigle frotiĝis kontraŭ la formulo, ke la progreso de la burĝa socio „elŝiris gravan parton de la loĝantaro el la idiotismo de la kampara vivo”¹³. Sendube Markso dividis tiam la inter urbanoj larĝe dividitan malestimon kiel ankaŭ nekonon de la kampara medio. Tamen la parolturno ne rilatas al „stulteco”, sed al la „mallarĝaj horizontoj” aŭ al la „izoliteco disde la multflanka socio”, en kiu la homoj en la kamparo vivis. En „idiotismo” aludiĝas ankoraŭ la origina signifo de la greka vorto „*idiotes*” (de kiu ankaŭ la hodiaŭ kutimaj vortoj „idiotajo” kaj „idioto” estas derivitaj), nome „persono, kiu zorgas nur pri siaj propraj aferoj kaj ne pri tiuj de la pli granda komunumo”. Kun la fluo de la tempo post 1840 kaj en tiuj movadoj, kies membroj ne kiel Markso estis ĝuintaj klasikan kleriĝon, la origina signifo perdiĝis kaj estis malĝuste interpretata.

Tio fariĝas ankoraŭ pli evidenta en la politika terminaro de la *Manifesto*.

13 Tiel ankoraŭ en la traduko de *Blanke*, en: Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la traduko de *Detlev Blanke* (1990), *Emil Pfeffer* (1923), *Arturo Baker* (1908), (*T. Veder* [1933]) kaj la germana originalo [librofina librolisto n-ro 52], p. 125. Vd la koncernan frazon malsupre, p. 70. -vl

Nocioj kiel „stato”¹⁴, „demokratio” aŭ „nacio”/„nacia” fine de la 20-a jarcento havas apenaŭ rilaton al la politiko aŭ jam de iom da tempo perdis la signifon, kiun ili havis en la politika aŭ filozofia pensado antaŭ 150 jaroj. Jen proksima ekzemplo: La „Komunista Partio”, kies manifesto nia teksto pretendas esti, havis nenion komunan kun la partioj de la moderna demokratia respubliko aŭ kun la „avangardaj partioj” de la leninisma komunismo, kaj eĉ malpli kun la ŝtatpartioj de sovetia aŭ de ĉina tipo. Io tia tiam ne ekzistis. „Partio” signifis envere tendencon aŭ pensofluron de la mondrigardaj manieroj aŭ de la politiko, kvankam Markso kaj Engelso vidis, ke specifa formo de organizaĵo evoluis, ekde kiam tiu tendenco trovis esprimiĝon en klasa movado: „tiu organizaĵo de la proletoj al klaso, kaj per tio al politika partio”. Pro tio en la parto IV ankaŭ la distingo inter „la jam konsistiĝintaj laboristaj partioj ... la ĉartistoj en Anglujo kaj la agrarreformistoj en Nord-ameriko” kaj la ceteraj, ankoraŭ ne konsistiĝintaj.¹⁵ Kiel klare evidentas el la teksto, en tiu stadio la komunista partio de Markso kaj Engelso ne estis formo de organizaĵo kaj ĝi ankaŭ ne provis estigi organizaĵon, eĉ malpli organizaĵon kun aparta programo, kiu distingis ĝin de aliaj organizaĵoj.¹⁶ Ni menciis ankoraŭ marĝene, ke la organizaĵo, laŭ kies taskado la *Manifesto* estis verkita, la Ligo de la Komunistoj, en la teksto nenie menciigās.

Krome klaras, ke la *Manifesto* estis verkita ne nur en kaj por aparta historia situacio, sed ke ĝi reprezentas ankaŭ – relative nematuran – stadion en la disvolvado de la marksa pensado. Tio plej klaras en ĝiaj ekonomiaj aspektoj. Kvankam Markso jam en la jaro 1843 komencis serioze studi politikan ekonomion, li komencis labori pri la ekonomia analizo prezentita en *La kapitalo* nur kiam li post la revolucio de 1848 atingis sian anglan

14 Germane: „Stand”, E-e *stato* en la senco de la dua difino de la Reta Vortaro (ReVo). -v1

15 La oficiala angla traduko de 1887, reviziita de Engelso, malfortigas tiun kontraston.

16 „La komunistoj ne estas aparta partio fronte al la aliaj laboristaj partioj [...] Ili ne starigas apartajn principojn, laŭ kiuj ili volas modli la proletan movadon.” (Parto 2).

ekzilon kaj en la somero 1850 ricevis aliron al la trezoroj de la biblioteko de la Brita Muzeo. Tiel la distingo inter la vendo de la *laboro* de la proleto al la kapitalisto kaj la vendo de sia *laborforto*, distingo fundamenta por la marka teorio de la plusvaloro kaj de la ekspluatado, en la *Manifesto* ankoraŭ ne estas klare ellaborita. La posta Markso ankaŭ ne opiniis, ke la prezo de la varo „laboro” egalas al ĝiaj produktadkostoj, t.e. al la kostoj de la fiziologia minimumo por teni la laboriston viva. Mallonge, Markso verkis la *Manifeston* malpli kiel marksista ekonomikisto ol kiel komunista rikardano.

Kvankam Markso kaj Engelso memorigis la legantojn pri la fakto, ke la *Manifesto* estas historia, plurilate arĥaiginta dokumento, ili konsentis kaj subtenis la publikigon de la teksto de 1848 – kun relative malmultaj notoj kaj klarigoj.¹⁷ Ili vidis, ke ĝi estis kaj restis grava dokumento de tiu analizo, kiu distingis ilian komunismon disde ĉiuj aliaj projektoj por krei pli bonan socion. Laŭ la esenco temis pri historia analizo. En ĝia kerno ĝi estis la pruvo de la historia disvolviĝo de la socioj, speciale de la burĝa socio, kiu forŝovis siajn antaŭulojn, revoluciis la mondon kaj kiu aliflanke kun nepr-eco produktas la kondiĉojn por sia neevitebla dialektika forigo¹⁸. Male ol la marka ekonomio, la „materiisma kompreno de la historio”, kiu estas la bazo de la analizo, estis jam meze de la 1840-aj jaroj elformulita. Ĝi restis

17 La plej konata, kiun Lenino emfazis, estas la rimarko en la antaŭparolo de 1872, ke la Pariza Komunumo montris, „ke la laborista klaso ne povas simple ekposedi la pretan ŝtatmaŝinon kaj ekfunkciigi ĝin por siaj propraj celoj.” – Post la morto de Markso, Engelso aldonis la piednoton, kiu modifas la unuan frazon de Parto 1 en la senco ke la antaŭhistoriaj socioj estas esceptitaj el la ĝenerala validado de la klasbatalo. Sed nek Markso nek Engelso perdis sian tempon per komento aŭ modifado de la ekonomiaj tekstoj de la dokumento. Ĉu Markso kaj Engelso efektive pensis pri iom pli granda „prilaboro aŭ kompletigo” de la *Manifesto* (antaŭparolo al la germana eldono de 1883), oni rajtas pridubi. Kun la morto de Markso la hipoteza projekto de prilaboro malaperis.

18 Originale: *Aufhebung*, t.e. nuligo, forigo, kaj samtempe konservado en nova kunteksto. -vl

en la postaj jaroj en sia esenco senŝanĝa.¹⁹ En tiu rilato la *Manifesto* estis jam dokumento, kiu difinis la marksismon. Ĝi enkorpigis la historian vizion, kies ĝeneralaj konturoj restis ankoraŭ plenigotaj per la pli ampleksa analizo.

19 Kp parton 2 de la *Manifesto*: („Ĉu necesas profundaj ekkonoj por kompreni, ke kun la vivkondiĉoj de la homoj, kun iliaj sociaj rilatoj, kun sia socia estado ŝanĝiĝas ankaŭ iliaj konceptoj, opinioj kaj nocioj, per unu vorto ankaŭ ilia konscio?” [malsupre, p. 85 -vl] kun la koncerna teksto en: Antaŭparolo al la Kritiko de la politika ekonomio („Ne estas la konscio de la homoj kiu determinas ilian eston, sed inverse ilia socia esto kiu determinas ilian konscion.”) [librofina librolisto n-ro 43, p. 33. -vl]

3

Kiel la *Komunista Manifesto* efikos al leganto, kiu nun ekvidas ĝin por la unua fojo? La nuntempa leganto tute ne povas resti indiferenta al la pasia konvinko, al la koncentrita koncizeco, al la intelekta kaj stila forto de tiu miriga pamfleto. Ĝi estas verkita kvazaŭ en unu sola krea erupcio, en koncizaj frazoj, kiuj preskaŭ per si mem ŝanĝiĝas en la neforgeseblajn aforismojn, kiuj konatiĝis multe trans la mondo de politikaj debatoj: de la unua „fantomo hantas en Eŭropo – la fantomo de komunismo” ĝis la lasta „La proletoj per ĝi [la revolucio] povas perdi nenion ol siajn ĉenojn. Ili povas gajni mondon”. Nekutime por germana teksto el la 19-a jarcento, ĝi konsistas el mallongaj, apodiktaj frazoj²⁰ el plej ofte maksimume kvin linioj; nur en kvin okazoj el pli ol 200 ĝi estas pli ol 15 linioj. Sendepende de tio, kio ĝi povas esti krome, la *Komunista Manifesto* kiel politika retoriko havas preskaŭ biblian lingvopotencon. Mallonge, ĝia deviga forto kiel literaturo apenaŭ kontestblas.²¹

Sed kio sendube ankaŭ mirigos la nuntempan leganton, estas la notinda diagnozo de la revolucia karaktero kaj de la revolucia elano de la „burĝa socio”. Ĉe tio ne temas simple pri tio, ke Markso agnoskis kaj anoncis la eksterordinarajn atingojn kaj la viklecon de socio, kiun li abomenis – tre mirige por pli ol unu posta defendanto de la kapitalismo kontraŭ la ruĝa danĝero. Decida estas, ke la mondo ŝanĝita de la kapitalismo, kiun li en la jaro 1848 priskribis en teksteroj de malluma, lakona elokvento, estas ne-pretervideble la mondo, en kiu ni 150 jarojn poste vivas.

Ŝajnas strange, ke la politike sufiĉe malrealisma optimismo de du revoluciuloj 28- kaj 30-jaraj pruviĝis la plej daŭrema forto de la *Manifesto*. Ĉar

20 Frazoj logike nerefuteblaj. -vl

21 Pri stilanalizo vd S. S. Prawer, *Karl Marx and World Literature*, Oksfordo – Novjorko – Melburno, 1978, p. 148s. La tradukoj de la *Manifesto* al mi konataj tamen ne posedas la literaturan forton de la germana originalo.

kvankam la „fantomo de komunismo” efektive hantis politikistojn kaj kvankam Eŭropo trairis longan periodon de ekonomiaj kaj sociaj krizoj kaj staris proksime al la plej granda kontinenta revolucio de sia historio, simple ne ekzistis sufiĉa kialo por la konvinko eldirita en la *Manifesto*, ke la momento por faligi la kapitalismon estas tuj venonta („do ĉar la germana burĝa revolucio povas esti nenio alia ol la rekta antaŭludo al proletara revolucio”)²². Male. Kiel ni hodiaŭ scias, la kapitalismo troviĝis tiutempe antaŭ la unua erao de sia triumfa mondvastiĝo.

Du aferoj donas al la *Manifesto* ĝian trafan forton. La unua estas ĝia vizie longa vido jam komence de la triumfo de la kapitalismo, ke tiu produktadmaniero ne estas daŭrigebla, stabila, „la fino de la historio”, sed pasanta fazo en la historio de la homaro, kiu kiel ĝiaj antaŭintoj estos deŝovota de alispeca socio (escepte se – tiu limigo en la *Manifesto* estas nur malofte konsiderata – ĝi finiĝas „per la komuna perejo de la batalantaj klasoj”). La dua estas ĝia kompreno de la neeviteblaj *longtempaj* historiaj tendencoj de la kapitalisma evoluo.

La revolucianta potenco de la kapitalisma ekonomio jam evidentis – Markso kaj Engelso ne asertis esti ekkonintaj tion solaj. Ekde la Franca Revolucio kelkaj el la tendencoj, kiujn ili konstatis, jam klare efikis – ekzemple „sendependaj, preskaŭ nur aliancaj provincoj kun malsamaj intereso, leĝoj, registaroj kaj doganaĵoj” pereis favore al naciaj ŝtatoj kiuj havas „unu registaron, unu leĝon, unu nacian klasintereson, unu doganlimon”. Tamen tio, kion „la burĝaro” fine de la 1840-aj jaroj estis atinginta, estis esence pli modesta ol la miraklaĵoj, kiun la *Manifesto* atribuis al ĝi.

Ĉar la mondo ĉirkaŭ 1850 produktis ne pli ol 71.000 tunojn da ŝtalo (el kiuj preskaŭ 70 elcentoj en Anglujo) kaj disponis pri malpli ol 40.000 kilometroj da fervojoj (el kiuj du trionoj en Anglujo kaj Usono). Historiistoj povis facile pruvi, ke eĉ en Anglujo la industria revolucio (nocio, kiun pre-

22 Malsupre, p. 102. -vl

cipe Engelso ekde 1844 uzis²³) antaŭ la 1850-aj jaroj apenaŭ kreis industrian aŭ eĉ precipe urbe stampitan landon. Markso kaj Engelso ne priskribis la mondon, kiun la kapitalismo en 1848 jam transformis, sed antaŭdiris, kia ĝi devis transformiĝi laŭ siaj propraj leĝoj.

Ni vivas hodiaŭ en mondo, en kiu tiu transformado grandparte okazis, kvankam la leganto de la *Manifesto* en la tria jarmilo de la Okcidenta kalendaro devas konstati, ke ĝi ekde 1998 ankoraŭ pli progresis. Plurrilate ni povas vidi la forton de la prognozaj faritaj en la *Manifesto* eĉ pli klare, ol tio eblis al la generacioj inter 1848 kaj hodiaŭ.

Ĉar ĝis la revoluciado de la transport- kaj komunik-vojoj post la Dua Mondmilito la tutmondigo de la produktado, la „kosmopolita” formado de la „produktado kaj konsumado de ĉiuj landoj” havis limojn. Ĝis la 1970-aj jaroj la industriigo restis precipe limigita al la landoj de sia origino. Kelkaj marksismaj skoloj povis eĉ aserti, ke la kapitalismo, almenaŭ en sia imperisma formo, anstataŭ „devigi ĉiujn naciojn alproprigi al si la produktadmanieron de la burĝaro, se ili ne volas pereii”²⁴, laŭ sia naturo eternigas aŭ eĉ kreas la „subevoluo” en la tiel nomata Tria Mondo. Dum triono de la homaro vivis en ekonomiaj sistemoj de sovetkomunisma tipo, povis ŝajni, ke la kapitalismo neniam sukcesos devigi ĉiujn naciojn mem „fariĝi burĝoj”²⁵. La burĝaro, laŭ ili, ne kapablos krei „mondon laŭ sia propra imago”²⁶.

Kaj ŝajnas, ke ĝis la 1960-aj jaroj ankaŭ ne realiĝis la antaŭdiro de la *Manifesto*, ke la kapitalismo alportas kun si la detruadon de la familio – eĉ ne en la progresintaj okcidentaj landoj, en kiuj hodiaŭ proksimume la duono de ĉiuj infanoj naskiĝas aŭ edukiĝas de solaj patrinoj kaj la duono de ĉiuj mastrumejoj en la grandurboj estas unupersonaj.

23 En *Die Lage Englands. Das 18. Jahrhundert* [La situacio de Anglujo. La 18-a jarcento], MEW 1, p. 566-568.

24 Malsupre, p. 70. -vl

25 Saml. -vl

26 Saml. -vl

Mallonge, tio, kio en la jaro 1848 al senantaŭjuĝa leganto povis ŝajni kiel revolucia retoriko aŭ, en la plej bona kazo, kiel logika prognozo, hodiaŭ legeblas kiel konciza priskribo de la kapitalismo fine de la 20-a jarcento. Pri kiu alia dokumento de la 1840-aj jaroj tio direblas?

4

Fine de la jarmilo ni do ne povas alie ol perpleksiĝi pri la akra vizio de – tiam ankoraŭ en fora estonteco troviĝanta – vere tutmonda kapitalismo, tia kian ni renkontas en la *Manifesto*, sed same perplekse ni devas aliflanke konstati la neokazon de kroma el ĝiaj prognozaj. Intertempe evidentas, ke la burĝaro en la proletaro ne produktis „antaŭ ĉio siajn proprajn entombigistojn”. „Ĝia perejo kaj la venko de la proletaro” ne pruviĝis „same neeviteblaj”. La kontraŭeco inter la du duonoj de la analizo de la *Manifesto* en la sekcio „Burĝaro kaj proletaro” bezonas post 150 jaroj pli da klarigoj ol tempe de la festo de centjariĝo de la *Manifesto*.

La problemoj ne troviĝas en la marka kaj engelsa vizio de kapitalismo, kiu transformas la plej multajn homojn, kiuj perlaboras sian monon en tiu ekonomia formo, nepre en virojn kaj virinojn kiuj, por certigi sian vivtenadon, devas trovi dungon por ricevi salajron. Tia evoluo sendube okazis, kvankam certaj ricevantoj de enspezoj, kiuj estas oficiale deklaritaj kiel dungitoj kun fiksa salajro – ekzemple en la gvidaj pintoj de entreprenoj –, ne estas plu konsidereblaj kiel parto de la proletaro.

La problemoj troviĝas ankaŭ ne esence en ilia konvinko, ke la plej granda parto de la laboranta loĝantaro konsistas el *industrial*laboristoj. Kvankam Britio kiel lando, en kiu la salajrataj manlaboristoj estis la absoluta plimulto de la loĝantaro, restis escepto, tamen la evoluo de la industria produktado postulis dum la tuta jarcento post la apero de la *Manifesto* amasan kaj kreskantan aplikadon de manlaboro. Tio estas en la moderna kapitalintensa, altteĥnika produktado sendube jam ne la kazo, jen evoluo ne antaŭvidita en la *Manifesto*, kvankam Markso mem en siaj pli maturaj ekonomiaj esploraĵoj efektive prezentis la eblan evoluon de pli kaj pli senlabora ekonomio – almenaŭ en postkapitalisma erao.²⁷

27 Kp ekz-e la diskuton pri „fiksa kapitalo kaj la disvolvado de la sociaj produktadfortoj” en la Manuskriptoj de 1857-1858. *Karl Marx: Grundrisse der*

Eĉ en la malnovaj industriekonomioj de la kapitalismo la elcentaĵo de dungitoj en la produktanta industrio restis ĝis en la 1970-aj jaroj stabila, kun la escepto de Usono, kie la malkresko komenciĝis iom pli frue. Kun tre malmultaj esceptoj kiel Anglujo, Belgio kaj Usono en la jaro 1970 la industrilaboristoj estis verŝajne pli alta parto de la tuta laboranta loĝantaro de la mondo industria kaj industriiĝanta ol iam ajn antaŭe.

Ĉiukaze la faligo de la kapitalismo, tia kia ĝi estis antaŭdirita de la *Manifesto*, ne baziĝis sur la antaŭa transformiĝo de la *plimulto* de la laboranta loĝantaro en proletaron. La prognozo estis pravigita pli ĝuste per la supozo, ke la proletaro pro sia pozicio en la kapitalisma ekonomio laŭ sia organiziteco kiel necesa politika klasmovado povis transpreni la gvidadon de la malkontentaj ceteraj klasoj kaj arigi tiujn malantaŭ si kaj tiel transpreni la politikan potencon kiel „la memstara movado de la giganta plimulto en la intereso de la giganta plimulto”. La proletaro, laŭ tio, „leviĝos al nacia klaso, konsistigas sin mem kiel nacion”.

Ĉar la kapitalismo ne estis faligita, ni emas forĵeti tiun prognozon. Kio en la jaro 1848 ŝajnis tute ekskludita: La politikaj kondiĉoj de preskaŭ ĉiuj eŭropaj kapitalismaj landoj estis ankoraŭ transformotaj per la supreniro de la organizitaj politikaj movadoj, kiuj apogas sin sur la klaskonscia laborista klaso – klaso, kiu ekster Britio tiam apenaŭ aperis. Sed socialistaj kaj laboristaj partioj estiĝis en la plej multaj partoj de la „evoluinta” mondo dum la 1880-aj jaroj, fariĝis amaspartioj en ŝtatoj kun demokratia voĉdonrajto, al kiu ili estis tiom multe kontribuintaj. En kaj post la Unua Mondmilito sekvis branĉo de la „proletaraj partioj” la revolucian vojon de la bolŝevistoj, dum alia fariĝis la portanta kolono de la demokratiigita kapitalismo. La bolŝevista branĉo havas hodiaŭ en Eŭropo apenaŭ ian gravecon aŭ la partioj de tiu tipo asimiliĝis al la socialdemokrataro. La socialdemokrataro – en la kompreno de Aŭgusto Bebelo aŭ de Clement Attlee – troviĝas en la 1990-aj jaroj en retroiraj bataloj. Kaj tamen, en la momento de la redaktado de tiuj

Kritik der Politischen Ökonomie (Rohentwurf 1857-58), Berlino, 1953, p. 586s.

ĉi linioj (1997) la posteuloj de la socialdemokrataj partioj de la Dua Internacio, kelkfoje sub sia origina nomo, partoprenas en ĉiuj eŭropaj ŝtatoj la registaron – escepte de Hispanio kaj Germanujo, kie ili tamen en la pasinteco konsistigis la registaron kaj verŝajne tion ankaŭ ree faros.

Mallonge, malĝustis ne la prognozo de la *Manifesto* pri la centra rolo de la politikaj movadoj, kiuj apogas sin sur la laborista klaso (kaj kiuj parte – kiel la brita, nederlanda, norvega, aŭstralia kaj novzelandaj laboristaj partioj – portas daŭre sian klasan nomon). Malĝustis la aserto: „El ĉiuj klasoj, kiuj hodiaŭ alfrontas la burĝaron, nur la proletaro estas vere revolucia klaso”, kies neevitebla sorto, jam ennaskita en la naturo kaj la evoluo de la kapitalismo, konsistas laŭ Markso kaj Engelso en faligo de la burĝaro: „Ties pereado kaj la venko de la proletaro estas same neeviteblaj.”

Eĉ en la fifamaj malsatjaroj post 1840, la meĥanismo, kiu devis certigi tion, nome la nepra paŭperiĝo de la laboristoj²⁸, ne estis tute konvinka – escepte sub la tiutempe ankaŭ ne konvinka supozo, ke la kapitalismo troviĝas en sia lasta krizo kaj ĝia falo estas *tuj* okazonta. La meĥanismo estis duobla. Apud la efikoj de la paŭperiĝo al la movado de la laboristoj montrigi, ke „la burĝaro” estis „nekapabla regi, ĉar ĝi estis nekapabla certigi al sia sklavo la ekzistadon eĉ ene de lia sklaveco, ĉar ĝi estis devigata lasi lin sinki al situacio, en kiu ĝi devas nutri lin anstataŭ esti nutrata de li”. Do, anstataŭ perlabori la profiton, kiu pelis la motoron de la kapitalismo, la laboristoj forkonsumis ĝin.

Sed, vide al la gigantaj ekonomiaj resursoj de la kapitalismo, kiun la *Manifesto* tiom imprese prezentas, kial estus neevitebla, ke la kapitalismo por la plej granda parto de sia laboranta klaso povu certigi eĉ ne plej mo-

28 Paŭperismo (angle: *pauperism*) kaj malriĉeco (angle: *poverty*) ne estu kompreneblaj sinonime. („Paŭpero” estas senrimeda persono, kiu estas subtenata per almozoj aŭ per publikaj atribuaĵoj” – tiel la difino en *Chamber's 20th Century Dictionary*.)

destan vivnivelon? Aŭ kial estus neevitebla, ke ĝi ne povos starigi prizorgan sistemon? Aŭ ke la paŭperismo evoluos „eĉ pli rapide ol loĝantaro kaj riĉaĵo”?²⁹ Se la kapitalismo havis antaŭ si longan vivon – kio baldaŭ post 1848 evidentiĝis –, tiam tio ne devis okazi kaj tio ankaŭ ne okazis.

El la vizio prezentita en la *Manifesto* pri la historia evoluo de la „burĝa socio” inkluzive de la laboranta klaso, kiu estas de ĝi kreita, *ne nepre* rezultis la konkludo, ke la proletaro faligos la kapitalismon kaj per tio liberigos la vojon por la komunismo, ĉar vizio kaj konkludo ne estis derivita el la sama analizo. La celo de la komunismo, kiun Markso faris sia, eĉ antaŭ ol fariĝi „marksisto”, ne estis derivita el la esenco kaj evoluo de la kapitalismo, sed el filozofio kaj lastanalize eŝatologia argumento pri la naturo kaj la sorto de la homoj. La ideo – ekde tiu momento por Markso baza –, ke la proletaro estas klaso, kiu ne povas liberigi sin mem sen samtempe liberigi la socion kiel tutaĵon, aperas unue kiel „filozofia derivaĵo kaj ne kiel rezulto de observado”.³⁰ George Lichtheim esprimis tion jene: „La proletaro aperas en la skribaĵoj de Markso unuafoje kiel la socia forto necesa por realigi la celojn de la germana filozofio”, tiajn kiajn Markso vidis ilin en la jaroj 1843-1844.³¹

La „pozitiva ebleco de la germana emancipiĝo” troviĝas – skribis li en la *Enkonduko al la Kritiko de la hegela jurfilozofio* – „en la formiĝo de klaso kun *radikalaj katenoj*”, de klaso, kiu estas „la dissolvo” de ĉiuj klasoj, „de sfero, kiu posedas universalan karakteron per siaj universalaj suferoj,

29 Estas paradokse: La marka argumentado el la jaro 1848 estas hodiaŭ – ekz-e de kapitalistoj kaj registaroj, kiuj vetas pri la libera merkato – grandparte uzata por pruvi, ke la ekonomioj de la ŝtatoj, kies malneta enlanda produkto seninterrompe ĉiujn kelkajn jarojn duobliĝas, bankrotus, se ili ne forigus la sistemon de transigaj pagoj (la prizorgoŝtaton ktp), kreitan en pli malriĉaj tempoj kaj per kiu tiuj, kiuj ricevas enspezojn per sia laboro, vivtenas la homojn nekapablajn labori.

30 *Leszek Kolakowski: Main Currents of Marxism*, vol. 1: *The Founders*, Oksfordo, 1978, p. 130.

31 *George Lichtheim: Marxism*, Londono, 1964, p. 45.

kaj *ne pretendas apartan rajton*, ĉar al ĝi ne estas farata *aparta maljusto*, sed *la maljusto ĝenerale* ... La dissolvo de la socio kiel aparta stato estas la *proletaro* ... La *emancipiĝo de la germano* estas la *emancipiĝo de la homo*. La *kapo* de tiu emancipiĝo estas la *filozofio*, ĝia *koro* la *proletaro*. La filozofio ne povas realiĝi sen la dialektika nuligo³² de la proletaro, la proletaro ne povas dialektike nuliĝi („sin aŭfhebi”) sen la realigo de la filozofio.”³³

En tiu tempo Markso sciis pri la proletaro apenaŭ pli ol ke ĝi komenciĝas „nur estiĝi por Germanujo per la enrompiĝanta *industria* movado”, kaj ĝuste en tio troviĝis ĝiaj resursoj kiel liberiga forto, ĉar malsame ol la malriĉaj amasoj de la tradicia socio ĝi estis la ido de la „*akuta dissolvo*” de la socio kaj pro tio ĝia ekzisto anoncis „*la dissolvon de la ĝisnuna mond-ordo*”. Li sciis eĉ ankoraŭ malpli pri la laboristaj movadoj, sed kompanse tiom pli pri la historio de la Franca Revolucio.

En Engelso li trovis kunulon, kiu enkondukis en la partnerecon la nocion „*industria revolucio*”, komprenon de la vicleco de la kapitalisma ekonomio, tia kia ĝi jam ekzistis en Anglujo, kaj la komencojn de ekonomia analizo,³⁴ kio entute kondukis al tio, ke li profetis estontan revolucion farendan de konkreta laborista klaso, pri kiu li, ĉar li estis komence de la 1840-aj jaroj en Anglujo vivinta kaj laborinta, ankaŭ tre multe sciis.

La proksimiĝoj de Markso kaj Engelso al „la proletaro” kaj al la komunismo kompletigis unu la alian. La samo validis pri ilia nocio de klasbatalo kiel motoro de la historio, ĉe Markso grandparte derivita el la esplorado de la periodo de la Franca Revolucio, ĉe Engelso el la sperto de sociaj movadoj

32 Alia esprimo por la germana *Aufhebung*, „dialektika nuligo”: *aufhebo*, kiu signifas samtempe nuligon kaj konservadon sur nova nivelo. -v1

33 Karlo Markso: Kontribuaĵo al la kritiko de la hegela jurfilozofio, Enkonduko. [...] MAS, 2010 (librofina librolisto n-ro 44), p. 22. -v1

– La vorto „stato” estas hodiaŭ erariga, pro tio mi preferas en la angla ĉi tie la tradukon de *Lichtheim* (l.c.), kiu tradukas ĝin per „klaso”.

34 Publikigita kiel *Umrisse einer Kritik der Nationaleconomie* (Konturoj de kritiko de la nacia ekonomio), en: MEW 1, p. 499-524.

en Anglujo post 1815. Ne estas surprizo, ke ĉe ili (laŭ Engelso) montriĝis „kompleta kongruo sur ĉiuj teoriaj kampoj”.³⁵ Engelso kunportis la elementojn de modelo, kiu demonstris la ŝanceliĝantan kaj memstabiligantan naturon de la efikmanieroj de la kapitalisma ekonomio – antaŭ ĉio la konturojn de teorio de la ekonomiaj krizoj³⁶ –, kaj empirian materialon pri al supreniro de la brita laborista movado kaj pri la revolucia rolo, kiun ĝi povas ludi en Britio.

En la jaroj post 1840 la konkludo, ke la socio troviĝas antaŭ tuj estonta revolucio, ne estis tute senbaza, ankaŭ ne la prognozo, ke la laborista klaso, malgraŭ sia nematureco, staros ĉe ĝia pinto. Malmultajn semajnojn post la apero de la *Manifesto* movado de parizaj laboristoj faligis la monarĥion kaj donis por la duona Eŭropo la signalon de la revolucio. Malgraŭ ĉio, la tendenco de la kapitalisma evoluo, produkti esence *revolucian* proletaron, ne dedukteblis el la analizo de la internaj leĝoj de la kapitalisma evoluo. Tio estis ja ebla konsekvenco de tiu evoluo, sed nenio pruvis, ke ĝi estis la sole ebla. Ankoraŭ malpli pruveblis, ke sukcesa faligo de la kapitalismo fare de la proletaro nepre liberigos la vojon al komunisma evoluo. (La *Manifesto* asertis nur, ke ĝi tiam enkondukos la procezon de tre iom-post-ioma ŝanĝo.³⁷) La ideo de Markso pri proletaro, kiu laŭ sia esenco estas destinita liberigi la homaron kaj per sia faligo de la kapitalismo ĉesigi la klasan regadon, esprimas esperon, kiun li enigis en sian analizon de la kapitalismo,

35 *Friedrich Engels: Zur Geschichte des Bundes der Kommunisten* (Frederiko Engelso: Kontribuajo al la historio de la Ligo de Komunistoj), MEW 21, p. 212.

36 *Umrisse einer Kritik der Nationalökonomie* (Konturoj de kritiko de nacia ekonomio), MEW 1, p. 514. Tio ŝajnas esti derivita el radikalaj britaj aŭtoroj, antaŭ ĉio de John Wade: *History of the Middle and Working Classes* (Londono, 1835), kiun Engelso en tiu kunteksto referencas.

37 Tio fariĝas ankoraŭ pli klara ĉe la formuladoj de Engelso en du tekstoj, kiuj estas envere antaŭskizoj por la *Manifesto: Entwurf eines Kommunistischen Glaubensbekenntnisses* (Skizo de Komunista Kredkonfeso), MEW 4, p. 361-380, kaj Principoj de komunismo (en: Karlo Markso, Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaŭo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj [librofina listo de MAS-libroj n-ro 25], p. 48. -vl).

sed ĝi ne estas konkludo, kiun tiu analizo devigas.

Sed aliflanke, tio kio ja sen ajna dubo povis rezulti el la analizo de la kapitalismo en la *Manifesto*, ĉefe se ĝi estas kompletigita per la marka analizo de la ekonomia koncentriĝo, kiun la *Manifesto* apenaŭ mencias, estis pli ĝenerala kaj malpli specifa konkludo pri la memdetruaj fortoj kiuj estas ennaskitaj en la kapitalisma evoluo. Tiu devas nepre iam atingi punkton – kaj tion en la jaro 1998 vidas certe ne nur marksistoj tiel –, ĉe kiu „la burĝaj produktad- kaj cirkulad-kondiĉoj, la burĝaj proprietkondiĉoj, la moderna burĝa socio, kiu elsorĉis tiom potencajn produktad- kaj cirkuladrimedojn, similas al la majstro sorĉisto, kiu jam ne kapablas regi la subterajn potencojn, kiujn li elsorĉis ... La burĝaj rilatoj fariĝis tro malvastaj por enteni la riĉaĵon de ili kreitan.”³⁸

Ekzistas bonaj kialoj por supozi, ke la imanentaj „kontraŭdiroj” de merkatsistemo, kiu baziĝas sur nenia alia ligo inter homo kaj homo ol la nuda intereso, ol la sensensa 'kontanta pago', de sistemo de ekspluatado kaj de senlima „akumulado” neniam supereblas; ke la evoluo de tiu sistemo, kiu altmezure tendencas al malstabiliĝo, kondukos al stato, kiun oni jam ne povas nomi kapitalismo. Aŭ, por citi la malfruan Markson, kiam „la centralizado de la produktadrimedoj kaj la sociigo de la laboro atingas punkton, kie ili fariĝas neakordigeblaj kun sia kapitalisma ŝelo. Tiu estas krevigata.”³⁹ Ne gravas, kian nomon oni donas al la sekvantaj kondiĉoj. Sed kiel la efikoj de la eksplodanta ekspansio de la mondekonomio sur la tutmonda medio montras, ili devas ricevi radikalan rompon: la forlason de la ĝisnuna privata dispono pri la produktadrimedoj favore al mondskala socia dispono.

Estas ekstreme malverŝajna, ke tia „postkapitalisma socio” similos al la tradiciaj modeloj de socialismo aŭ eĉ al la „reale ekzistanta” socialismo de

38 Malsupre p. 72. -v1

39 El la punkto 7 en la 24-a ĉapitro en: La kapitalo, vol. 1: „Historia tendenco de la kapitalisma akumulado”, Karlo Markso: La kapitalo [...], vol. 1 (librofina listo de MAS-libroj n-ro 68), p. 718.

la soveta erao. Kiajn formojn ĝi alprenos kaj ĝis kiom ili povus enkorpiĝi la humanismajn valorideojn de la komunismo reprezentataj de Markso kaj Engelso, tio dependus de la politika ago kiu alkondukos tiun ŝanĝon. Ĉar politika ago estas laŭ la literoj de la *Manifesto* esence grava por la elformado de la historia ŝanĝo.

5

Laŭ marksisma kompreno, sendepende de tio, kiel ni priskribas tiun historian momenton, en kiu la kapitalisma „ŝelo estas krevigata”, la politiko ludos esencan rolon. La *Manifesto* estis unuavice komprenata kiel dokumento de historia nepreco, kaj efektive granda parto de ĝia forto rezultis el la optimismo, kiun ĝi donis al siaj legantoj: La kapitalismo, laŭ tio, estas neeviteble kondamnita esti entombigita de la entombigistoj, kiujn ĝi mem produktis, kaj nun kaj en nenia alia erao de la historio maturiĝas la kondiĉoj por emancipiĝo. Tamen kaj kontraŭ tre vastiĝinta ideo necesas reteni: En la mezuro, en kiu la *Manifesto* eliras de la ideo, ke historia ŝanĝo estas alkondukata de homoj, kiuj faras sian propran historion, ĝi ne estas determinisma dokumento. La tomboj ne malfermiĝas per si mem, ili estas ŝovelendaj de homoj.

Ia determinismo estas tamen elvokata de la *Manifesto* mem. Oni asertis, ke Engelso pro sia naturo tendencis pli al determinismo ol Markso, kun gravaj konsekvencoj por la evoluo de la marka teorio kaj por la marksisma laborista movado post la morto de Markso. Sed kvankam oni citis la proprajn pli fruajn skizojn de Engelso mem kiel pruvon de tio,⁴⁰ tiu kompreno ne eblas en la teksto de la *Manifesto* mem. Tie, kie ĝi forlasas la nivelon de historia analizo kaj enpaŝas la estantecon, ĝi estas dokumento de alternativoj, de politikaj eblecoj kaj ne de verŝajnecoj aŭ eĉ de certecoj. Inter „hodiaŭ” kaj la neantaŭdirebla momento, en kiu „dum la paso de la evoluo ... ni havos asocion, kie la libera evoluo de ĉiu estas la kondiĉo por la libera evoluo de ĉiuj”⁴¹, troviĝas la spaco de politika agado.

Historia ŝanĝo per socia praktiko, per kolektiva agado, jen la kerna ideo. La *Manifesto* vidas la evoluon de la proletaro kiel la „organiziĝo de la proletoj al klaso kaj per tio al politika partio”. La „konkero de la politika

40 *George Lichtheim*, l.c., p. 58-60.

41 Malsupre p. 88. -vl

potenco fare de la proletaro” (la „elbatalado de la demokratio”) estas „la unua paŝo en la laborista revolucio”, kaj la estonteco de la socio dependas de la politikaj agoj de la nova reĝimo (de tio, por kio „la proletaro uzos sian politikan regadon”). La devigo je *politiko* estas tio, kio historie distingas la marksan socialismon disde la anarĥiistoj kaj la posteuloj de la socialistoj, kaj kontraŭ ties rifuzo de ĉia politika agado la *Manifesto* tute aparte argumentas. Eĉ antaŭ Lenino en la marka teorio ne temis simple pri tio, „kio el la historio rezultos por la estonteco”, sed ankaŭ pri tio, „kio farendas”. La sovetia sperto de la 20-a jarcento tamen ankaŭ instruis nin, ke sub historiaj cirkonstancoj, kiuj faras sukceson malebla, eble pli bonas ne fari tion, „kio farendas”. Sed tiun instruon oni povintus ankaŭ preni, se oni konsiderintus la implicaĵojn de la *Manifesto*.

Aliflanke la *Manifesto* – kaj tio ne estas la plej malgrava el ĝiaj rimarkindaj ecoj – estas dokumento, kiu ankaŭ konsideris sian fiaskiĝon. Ĝi atendis de la kapitalisma evoluo „revolucion transformadon de la tuta socio”, sed ne ekskludis, kiel ni vidis, la alternativon – „la komunan pereon de la batalantaj klasoj”. Multajn jarojn poste alia marksistino formulis tion alie kiel elekton inter socialismo kaj barbareco. Kiu el tiuj alternativoj venkos, estas demando, kies respondo estas rezervita al la 21-a jarcento.

Londono, en decembro de 1997

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio

Tradukita al Esperanto de la germana originalo laŭ la eldono de: Karl Marx/Friedrich Engels: Werke [MEW], Dietz Verlag, Berlino, volumo 4, 6-a eldono 1972, senŝanĝa represo de la 1-a eldono 1959, Berlino (GDR), p. 459 – 493; verkita en decembro 1847 ĝis januaro 1948; presita kaj kiel unuopa broŝuro aperinta en februaro/marto 1948 en Londono. Tiu eldono baziĝas sur la lasta de Frederiko Engelso prizorgita germana eldono de 1890.

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso:
Antaŭparolo
[al la „Manifesto de la Komunista Partio”
(germana eldono de 1872)]

La Ligo de la Komunistoj – internacia laborista organizaĵo, kiu sub la tiamaj kondiĉoj kompreneble povis esti nur sekreta – taskis en la kongreso de novembro 1847 en Londono la subskribintojn redakti por la publiko detalan teorion kaj praktikan partiprogramon. Tiel estiĝis la sekva „Manifesto”, kies manuskripto migris kelkajn semajnojn antaŭ la Februara Revolucio¹ por presado al Londono. Publikigita unue en la germana, ĝi estis represita en tiu lingvo en Germanujo, Anglujo kaj Usono en almenaŭ dek du diversaj eldonoj. En la angla ĝi aperis unue en 1850 en Londono en la „Red Republican”², tradukita de f-ino Helen Macfarlane [*helen mekfárlejn*] kaj en 1871 en almenaŭ tri diversaj tradukoj en Usono. En la franca unue en Parizo

-
- 1 La franca revolucio en februaro 1848. Post kiam la reĝo malpermesis kunvenon por reformo de la voĉdonrajto, ekde la 21-a de februaro 1848 okazis protestoj en Parizo, kiuj rapide etendiĝis al ribeloj kaj alprenis revolucionan karakteron. La 23-an kaj 24-an de februaro 1848 okazis akraj strataj kaj barikadaj bataloj inter laboristoj kaj burĝoj unuflanke kaj reĝaj trupoj aliflanke. La 24-an de februaro la malamata grandburĝa ĉefministro *François Guizot* [*frasŭá gizó*] devis demisii kaj mallonge poste la reĝo *Louis Philippe* [*luí filíp*] mem abdikis. Poste stariĝis provizora registaro sub la liberala politikisto *Alphonse de Lamartine* [*alfóns de lamartín*] kaj la respubliko estis proklamita. -v1
 - 2 *The Red Republican* [*se red ropábliken* (La Ruĝa Respublikano)] estis ĉartista semajngazeto, kiun J. Harney eldonis en Londono inter junio kaj novembro de 1850. La *Manifesto* aperis en la numeroj 21-24 de novembro de 1850. -ecs

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio” (germana eldono de 1872)]

Ĵus antaŭ la Junia Popolribelo de 1848³, lastatempe en „Le Socialiste”⁴ de Novjorko. Nova traduko estas preparata. Pola traduko aperis en Londono tuj post la unua germana eldono; rusa en Ĝenevo en la sesdekaj jaroj.⁵ Ankaŭ en la danan ĝi estis tradukita baldaŭ post sia apero.

Kiom ajn la kondiĉoj ŝanĝiĝis en la lastaj dudek kvin jaroj, la ĝeneralaj principoj disvolvitaj en tiu ĉi „Manifesto” restas entute ankaŭ hodiaŭ plene validaj. Ie kaj tie oni devus plibonigi detalojn. La „Manifesto” deklaras, ke la praktika aplikado de tiuj principoj dependas ĉie kaj ĉiam de la historiaj cirkonstancoj, kaj pro tio la revoluciaj disponoj proponitaj fine de la sekcio 2 ne estas aparte emfazitaj. Hodiaŭ tiu parto devus multrilate teksti alie. Vide al la grandega progreso de la granda industrio en la lastaj dudek kvin jaroj kaj al la kun ĝi progresanta partia organiziĝo de la laborista klaso, vide al la praktikaj spertoj, unue de la Februara Revolucio kaj ankoraŭ multe pli

-
- 3 Ribelo de la pariza proletaro. En la elektoj al konstituciiga asembleo, la 23-an de aprilo 1848, la maldekstro malvenkis kaj la konservativuloj kaj moderaj liberaluloj venkis. La 24-an de junio 1848 okazis denova ribelo de la laboristaro pro fermo de la francaj naciaj laborejoj, kiuj ĝis tiam donis laboron al senlaboruloj. Tiu pariza juni-ribelo, post akraj bataloj, estis sange subpremita de la franca armeo kaj de la nacia gvardio. Fine, tri mil laboristoj estis mortigitaj, proksimume 15.000 senditaj en transmarajn punkconcentrejojn. La junia ribelo estis historie ankaŭ la momento, en kiu la revolucia proletaro kaj la burĝaro disfendiĝis – okazo antaŭvidita de Karlo Markso. -vl
- 4 *Le Socialiste* [*le socialist* (La Socialisto)]: taggazeto, kiu aperis en la franca en Novjorko inter oktobro de 1871 kaj majo de 1873. Ĝi estis la organo de la francaj sekcioj de la Nordamerika Fedeeracio de la Internacio. Post la kongreso de Hago ĝi rompis kun la Internacio.
La menciita traduko al la franca de la *Manifesto de la Komunista Partio* aperis en la gazeto *Le Socialiste* en januaro ĝis marto de 1872. -ecs
- 5 Temas pri la unua rusa eldono de la *Manifesto de la Komunista Partio*, aperinta en 1869 en Ĝenevo, tradukita de Bakunino. Tiu en sia traduko tordis diversajn teksterojn de la *Manifesto*. La misoj de la unua eldono estis korektitaj en tiu, kiu aperis en Ĝenevo en 1882, tradukita de Pleĥanov. La pleĥanova traduko estis la bazo de granda disvastiĝo de la ideoj de la *Manifesto* en Ruslando. -ecs

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio” (germana eldono de 1872)]

de la Pariza Komunumo⁶, kie la proletaro por la unua fojo dum du monatoj havis la politikan potencon, vide al tio, tiu programo estas hodiaŭ en kelkaj punktoj arĥaiĝinta. Ekzemple, la Pariza Komunumo pruvis, ke „la laborista klaso ne povas simple ekposedi la pretan ŝtatmaŝinon kaj funkciigi ĝin por siaj propraj celoj”. (Vidu „La interna milito en Francujo. Mesaĝo de la Ĝenerala Konsilantaro de la Internacia Laborista Asocio”, kie tio estas pli detale disvolvita.)⁷ Krome estas memkomprenebla, ke la kritiko pri la socialista literaturo estas por hodiaŭ mankhava, ĉar ĝi pritraktis ĝin nur ĝis la jaro 1847; same, ke la rimarko pri la rilato de la komunistoj al la diversaj opoziciaj partioj (sekcio 4), kvankam en siaj ĝeneralaj trajtoj ĝi estas eĉ hodiaŭ ĝusta, tamen en sia detaligo ĝi estas hodiaŭ arĥaiĝinta jam ĉar la politika situacio komplete transformiĝis kaj la historia evoluo elmondigis la plej multajn el la tie menciitaj partioj.

Tamen, la „Manifesto” estas historia dokumento, kiun ŝanĝi ni jam ne rajtigas nin. Estonta eldono eble aperos kun enkonduko, kiu transpontu la tempospacon de 1847 ĝis nun; tiu ĉi represo venis al ni tro neatendite por lasi al ni la tempon por verki tian enkondukon.

Londono, la 24-an de junio 1872

Karlo Markso, Frederiko Engelso

6 La Pariza Komunumo, de la 26-a de marto 1871 ĝis la 28-a de majo 1871, estas konsiderata la unua revolucia registaro de la laboristaro kaj la unua provo de proletara revolucio kaj de diktatoreco de la proletaro. Vd Karlo Markso: La interna milito en Francio [...] (vd la sekvan piednoton). -vl

7 Karlo Markso: La interna milito en Francio (1871 La Pariza Komunumo) kun enkonduko de Frederiko Engelso, tradukis Vilhelmo Lutermano, *Mondial*, Nov-jorko, 2005, 137 p., ISBN 1-59569-025-5. -vl

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la dua rusa eldono de 1882

La unua rusa eldono de la „Manifesto de la Komunista Partio”, tradukita de Bakunin⁸, aperis komence de la sesdekaj jaroj⁹ en la presejo de la „Kolo-kol”¹⁰. La Okcidento povis tiam vidi en ĝi (la rusa eldono de la „Manifesto”) nur literaturan kuriozaĵon. Tia interpreto estus hodiaŭ malebla.

Kiom limigitan kampon tiam (decembro 1847) la proletara movado ankoraŭ okupis, tion plej klare montras la fina ĉapitro de la „Manifesto”: Pozicio de la komunistoj rilate al la diversaj opoziciaj partioj en la diversaj landoj.¹¹ Ĉar tie mankas ĝuste – Ruslando kaj Usono. Tiu estis la tempo, kiam Ruslando estis la lasta granda rezervo de la tuta eŭropa reakcio; kiam Usono sorbis la proletaran kromforton per enmigrado. Ambaŭ landoj provizis Eŭropon per krudmaterialoj kaj estis samtempe merkato por vendi la eŭropajn industriproduktojn. Ambaŭ landoj estis tiam do, tiel aŭ alie, kolonoj de la ekzistanta eŭropa ordo.

Kiom alie tio status hodiaŭ! Ĝuste la eŭropa enmigrado kapabligis Nord-amerikon je giganta kampkultura produktado, kies konkurenco ĝisfunde

8 Vd p. 12, pn 4*. -vl

9 Vd la pn 5. -vl

10 Temas pri la „Libera rusa presejo”, en kiu presiĝis la demokratia-revolucia gazeto *Kolokol* (Sonorilo), kiun eldonis *Aleksandr Herzen* (1812-1870) kaj *Nikolaj Ogarjov* (1813-1877). La presejo, fondita de Herzen, troviĝis en Londono ĝis 1865 kaj estis translokita al Genevo, kie ĝi presis la menciitan eldonon de la Manifesto. Vd pn 5. -ecs

11 Vd en tiu ĉi eldono p. 100. -vl

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la dua rusa eldono de
1882

ŝancelis la eŭropan grundproprieton – la grandan kiel la malgrandan. Ĝi krome kapabligis Usonon ekspluati siajn gigantajn rimedojn per tia energio kaj en tia skalo, ke tiuj devas post mallonga tempo rompi la ĝisnunan industrian monopolon de Eŭropo kaj speciale de Anglujo. Ambaŭ cirkonstancoj retroefikas revolucie al Usono mem. La malgranda kaj mezgranda grundproprietulo de la farmisto, la bazo de la tuta politika konstitucio, iom post iom subiĝas al la konkurenco de la gigantaj farmbienoj; en la industridistriktoj samtempe evoluas por la unua fojo amasa proletaro kaj neimagebla koncentriĝo de la kapitaloj.

Kaj nun Ruslando! Dum la revolucio de 1848-1849 ne nur la eŭropaj princoj, ankaŭ la eŭropaj burĝoj trovis en la rusa enmiksiĝo la solan savon antaŭ la ĵus vekiĝinta proletaro. La caro estis proklamita ĉefo de la eŭropa reakcio. Hodiaŭ li estas militkaptito de la revolucio en Gaĉino,¹² kaj Ruslando estas la avangardo de la revolucia agado en Eŭropo.

La „Komunista Manifesto” havis la taskon proklami la neeviteble baldaŭ okazontan dissolviĝon de la moderna burĝa proprietulo. Sed en Ruslando ni trovas, fronte al rapide ekfloranta kapitalisma trompo kaj al nur ĵus evoluinta burĝa grundproprietulo, la pli grandan duonon de la grundo en komuna posedo de la kampuloj. La demando estas nun: Ĉu la rusa *obŝĉina*, formo, kvankam forte subfosita, de la praa komuna grundposedo, povas rekte transiri en la pli altan formon de komunisma komuna posedo? Aŭ ĉu ĝi inverse devas unue trairi la saman dissolviĝan procezon, kiu karakterizas la historian evoluon de la Okcidento?

La sola hodiaŭ ebla respondo al tio, estas la jena: Se la rusa revolucio fariĝos la signalo de proletara revolucio en la Okcidento, tiel ke ambaŭ sin

12 Markso kaj Engelso aludas la situacion post la mortigo de la caro Aleksandro la Dua fare de membroj de la sekreta organizaĵo „Libereco de la popolo” la 1-an de marto 1881, kiam la caro Aleksandro la 3-a, jam kroniga, ne eliris el la kastelo Gaĉina (proksime de Sankt-Peterburgo) pro timo de kromaj atencoj de tiu organizaĵo. (laŭ) -ecs

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la dua rusa eldono de
1882

reciproke kompletigas, tiam la nuna rusa komuna grundposedo povos servi
kiel elirpunkto de komunisma evoluo.¹³

Londono, la 21-an de januaro 1882

Karlo Markso; Frederiko Engelso

13 Vd pri tiu demando: Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun *Klaus Gietinger*: La miskompreno (librofina librolisto n-ro 73). -vl

Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la germana eldono de 1883

La antaŭparolon al la nuna eldono mi devas bedaŭrinde subskribi sola. Markso, la viro, al kiu la tuta laborista klaso de Eŭropo kaj de Ameriko dankas pli ol al iu ajn alia – Markso kuŝas en la tombejo de Highgate kaj super lia tombo kreskas jam unua herbo.¹⁴ Depost lia morto eblas eĉ malpli pensi pri reverkado aŭ kompletigo de la „Manifesto”. Mi konsideras des pli necesa, ĉi tie refoje eksplicite konstati la jenon:

La baza ideo, kiu trairas la tutan „Manifeston”: ke la ekonomia produktado kaj la el ĝi nepre sekvanta socia strukturo de ĉia historia epoko estas la bazo por la politika kaj intelekta historio de tiu epoko; ke laŭ tio (ekde la dissolviĝo de la praa komuna posedo je grundo) la tuta historio estis historio de klasbataloj, bataloj inter ekspluatataj kaj ekspluatantaj, regataj kaj regantaj klaso sur diversaj ŝtupoj de la socia evoluo; ke tamen tiu batalo nun atingis ŝtupon, sur kiu la ekspluatata kaj subpremata klaso (la proletaro) jam ne povas liberigi sin el la ĝin ekspluatanta kaj subpremanta klaso (la burĝaro) sen samtempe por ĉiam liberigi la tutan socion el ekspluatado, subpremado kaj klasbataloj – tiu baza ideo apartenas sole kaj ekskluzive al Markso.¹⁵

14 Karlo Markso mortis la 14-an de marto 1883 kaj entombiĝis en la tombejo *Highgate* [*hajĝit*] en Londono. -vl

15 „Al tiu penso”, mi diras en la antaŭparolo al la angla traduko, „kiu laŭ mia opinio estas alvokita kaŭzi por la historia scienco la saman progreson, kiun la teorio de Darvino* kaŭzis por la naturscienco – al tiu penso ni ambaŭ iom post iom proksimiĝis jam dum pluraj jaroj antaŭ 1845. Kiom mi memstare progresis en tiu direkto, tion montras mia 'Situacio de la laboranta klaso en Anglujo'**. Sed kiam mi en la printempo de 1845 rerenkontis Markson en Bruselo, li estis ĝin jam prete ellaborinta kaj prezentis ĝin en preskaŭ same klaraj vortoj kiel tiuj, per kiuj mi supre resumis ĝin.” [Noto de Engelso poste aldonita al la germana eldono de 1890.]

* Karlo Darvino, orig. *Charles Robert Darwin* [ĉálz róbet dávin] (1809-1882),

Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la germana eldono de 1883

Mi jam ofte eldiris tion; sed ĝuste nun necesas, ke tio staru ankaŭ antaŭ la „Manifesto” mem.

Londono, la 28-an de junio 1883

Frederiko Engelso

brita natursciencisto. Aŭtoro de la teorio de la evolucio, per kiu li eltrovis la mutacion de la specioj kaj la naturan devenon de la homo. „La verko de Darvino [...], naturscienca bazo de la historia klasbatalo.” (Markso). „Darvino donis la plej fortan baton al la metafizika koncepto de la naturo.” „Mi akceptas de la darvinisma teorio la teorion de la evoluo [„evolucio”], sed konsideras la argumentan metodon uzatan de Darvino (la batalon por ekzistado, la naturan selektadon) kiel la unuan provizoran kaj malperfektan esprimon de ĵus malkovrita fakto [...]. La rilatoj kaj interdependecoj inter la naturaj vivaj kaj mortintaj organismoj implicas ne nur kolizion, sed ankaŭ harmonion, ne nur batalon, sed ankaŭ kunlaboradon”. Darvino ne konsideras, „ke ĉia progreso konkerita en la vojo de organika evoluo estas samtempe malprogreso, ĉar ĝi metas la evoluon en determinitan direkton kaj ekskludas la eblecon de evoluo en multaj aliaj direktoj”. Darvino „transplantas la burĝan ekonomian teorion kaj la teorion de la loĝantaro de Malthus de la socio al la vivanta naturo.” (Engelso).

Vd en Esperanto: Karolo Darvin: La origino de la specioj. Tradukis *Klivo London*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2009, 431 paĝoj. (Serio Sienca penso 1), ISBN 978-90-77066-40-9. -vl

*** „*The Condition of the Working Class in England in 1844*”. By *Frederick Engels*. Translated by *Florence K. Wischnewetzky*, New York, Lovell – London, W. Reeves, 1888. – La germana originalo: *Friedrich Engels: Lage der arbeitenden Klasse in England*. MEW, vol. 2, p. 225 – 506. -vl

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio” (angla eldono de 1888)]

La „Manifesto” estis publikigita kiel platformo de la Ligo de Komunistoj, internacia laborista asocio unue ekskluzive germana, kiu sub la politikaj kondiĉoj de la eŭropa kontinento antaŭ 1848 estis neeviteble sekreta organizaĵo. En la kongreso de la Ligo, kiu okazis en novembro 1847 en Londono, Markso kaj Engelso estis taskitaj prepari por publikigo kompletan teoriant kaj praktikan partiprogramon. Redaktita en la germana, la manuskripto estis en januaro 1848, malmultajn semajnojn antaŭ la franca revolucio de la 24-a de februaro, sendita al Londono por presiĝo. Franca traduko estis eldonita ĵus antaŭ la junia popolribelo de 1848 en Parizo. La unua angla traduko, de f-ino Helen Macfarlane [mekfárlejn], aperis en 1850 en la „Red Republican” de George Julian Harney [háрни] en Londono. Ankaŭ dana kaj pola eldono aperis.

La disbato de la pariza junia ribelo de 1848 – de tiu unua granda batalo inter proletaro kaj burĝaro – provizore reŝovis en la fonon la sociajn kaj politikajn aspirojn de la eŭropa laborista klaso. De tiam la batalo pri la dominanta pozicio ree okazis, kiel en la tempo antaŭ la februara revolucio, nur inter diversaj grupoj de la poseda klaso; la laborista klaso estis limigita al batalo por politika kubutlibereco kaj al la pozicio de plej ekstrema maldekstra alo de la radikala burĝaro. Kie sendependaj proletaj movadoj daŭre montris vivosignojn, ili estis senkompate disbatitaj. Ekzemple la prusa polico elspionis la Centran Oficejon de la Ligo de Komunistoj, kiu tiam havis sian sidejon en Kolonjo. La membroj estis arestitaj kaj post dekokmonata aresto, en oktobro 1852, venigitaj antaŭ tribunalo. Tiu fama „Kolonja komunistproceso” daŭris de la 4-a de oktobro ĝis la 12-a de novembro; sep el la malliberuloj estis kondamnitaj al punoj de mallibero de tri ĝis ses jaroj.

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunisto Partio”
(angla eldono de 1888)]

Tuj post la verdikto la Ligo estis formale malfondita de la restantaj membroj.¹⁶ La *Manifesto* siavice ŝajnis de tiam esti kondamnita al forgeso.

Kiam la eŭropa laborista klaso estis ree kolektinta sufiĉan forton por nova atako al la reganta klaso, estiĝis la Internacia Laborista Asocio. Sed tiu asocio, fondita eksplicite por la celo kunfandi la tutan bataleman proletaron de Eŭropo kaj Ameriko en unusolan organismon, ne povis tuj proklami la principojn formulitajn en la *Manifesto*. La Internacio devis havi programon sufiĉe larĝan por esti akceptebla por la anglaj sindikatoj („*Trade-Unions*”), por la francaj, belgaj, italaj kaj hispanaj adeptoj de Prudono¹⁷ kaj por la lasalanoj¹⁸ en Germanujo. Markso, kiu redaktis tiun programon je la

16 La Kolonja Komunist-proceso (de la 4-a de oktobro ĝis la 12-a de novembro de 1852) lanĉita kun provokaj celoj de la prusa registaro kontraŭ dek unu membroj de la Ligo de la Komunistoj. Akuzate de alta perfido sen pli da pruvoj ol falsaj dokumentoj kaj atestoj, sep estis kondamnitaj al mallibero en fortikaĵo 3 ĝis 6 jaroj. La fiaj provok-metodoj, kiujn uzis la prusa polic-ŝtato kontraŭ la internacia laborista movado estis denunciataj de Markso kaj Engelso en ilia artikolo „La ĵusa proceso de Kolonjo” kaj de Markso en „Malkaŝoj pri la kolonja komunist-proceso”. -ecs

17 Prudono (*Proudhon, Pierre Joseph* [prudón, pjér ĵozéf] 1809 – 1865). Etburĝa franca socialisto; unu el la teoriaj fondintoj de anarĥiismo. Prudono „nebuligas la ekonomiajn kategoriojn, transformante ilin en eternajn ideojn, por denove alveni, post tiu ĉirkaŭvojo, al la burĝa ekonomio”. „Kiel li neniam sciis, kio estas la vera scienca dialektiko, li ĉiam restis nur sofisto”. (Markso). La teorioj de Prudono, kiujn Markso refutis en sia verko „Mizero de la filozofio”* (1847), havis grandan influon en Francujo dum longa tempo, kaj la anarĥiistoj daŭre aliĝas al li. (Laŭ „Indekso de personaj nomoj” en: Karlo Markso: La kapitalo [n-ro 68 de la librofina librolisto], en la sekvo citota kiel „Indekso en *La kapitalo*”) -vl

* En Esperanto: Karlo Markso: La mizero de la filozofio. Respondo al Prudono ... (librofina librolisto n-ro 17) -vl

18 Lasalo* al mi persone deklaris sin disĉiplo de Markso, kaj kiel tia li staris sur la fundamento de la *Manifesto*. Tamen, en sia publika agitado en la jaroj 1862 – 1864 li restis nur ĉe la postuloj de produktadaj kooperativoj kun ŝtata kredito. -fe

* Lasalo, Ferdinando [*Lassalle, Ferdinand* (lasál, férdinant)] (1825 – 1864.

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio”
(angla eldono de 1888)]

kontento de ĉiuj partioj, plene fidis la intelektan evoluon de la laborista klaso, evoluon, kiu devis nepre sekvi el la kunigita agado kaj komuna diskutado. La okazaĵoj kaj sortoŝanĝoj en la batalo kontraŭ la kapitalo, la malvenkoj eĉ pli ol la venkoj, povis nur konsciigi la homojn pri la nesufiĉeco de siaj diversaj favorataj ĉarlatanaĵoj kaj prepari la vojon al kompleta kompreno de la realaj kondiĉoj por la emancipiĝo de la laborista klaso. Kaj Markso pravis. Kiam en la jaro 1874 la Internacio disfalis, ĝi postlasis la laboristojn jam en tute alia stato ol en kia ĝi trovis ĝin tempe de sia fondiĝo en la jaro 1864. La prudonismo en Francujo, la lasalismo en Germanujo estis formortantaj, kaj ankaŭ la konservativaj anglaj sindikatoj, kvankam ili en sia plimulto jam delonge rezignis siajn ligojn kun la Internacio, iom post iom proksimiĝis al la punkto, ĉe kiu ilia prezidanto¹⁹ pasintjare en Swansea en ilia nomo povis deklari: „La kontinenta socialismo perdis por ni siajn terurojn.” Efektive: La principoj de la *Manifesto* estis farintaj konsiderindajn progresojn inter la laboristoj de ĉiuj landoj.

Tiel la *Manifesto* mem regajnis aktualecon. La germana teksto post la jaro 1850 estis plurfoje represita en Svislando, en Anglujo kaj en Usono. En la jaro 1872 ĝi estis tradukita anglan, en Novjorko, kie la tradukaĵo estis publikigita en *Woodhull & Claflin's Weekly*. Surbaze de tiu angla versio oni

Fondinto de la Ĝenerala Ligo de Germanaj Laboristoj. Ĉe lia morto Engelso skribis, referencante lin: „Unu el la plej gravaj figuroj de Germanujo. En la aktualeco li estis, por ni, amiko sufiĉe malcerta, kiu poste devis transformiĝi sendube en la plej certan malamikon.” Post pli detala scio pri liaj rilatoj kun Bismarko, Markso formulis pri li ankoraŭ pli akran juĝon: „Lasalo vere perfidis la partion. Li faris formalan interkonsenton kun Bismarko.” Engelso diris, ke la tuta merito de Lasalo baziĝis sur tio, ke Markso permesis al li ornami sin dum multaj jaroj per la fruktoj de liaj esploraĵoj kvazaŭ ili estus liaj propraj, kaj krome, falsi ilin. La socialiston Lasalo akompanis ĉiam, kiel ombro al korpo, Lasalo la demagogo.” (laŭ „Indekso en *La kapitalo*” [n-ro 68 de la librofina librolisto]) -vI

19 Temas pri *W. Bevan*, la tiama prezidanto de la angla sindikato *Trade-Unions* [tréd júnjens]. Dum ties jara kongreso en la urbo *Swansea* [svonsí] en la jaro 1887 li faris la cititan deklaron. (laŭ) -ecs

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio”
(angla eldono de 1888)]

verkis ankaŭ francan version en *Le Socialiste* en Novjorko. Post tiam en Usono eldoniĝis krome almenaŭ du anglaj tradukoj, pli aŭ malpli malfidelaj, el kiuj unu estis represita en Anglujo. La unua rusa traduko, farita de Bakunino²⁰, estis eldonita proksimume ĉirkaŭ la jaro 1863 en la presejo *Kolokol* de Herceno²¹, en Ĝenevo; dua traduko, ankaŭ en Ĝenevo, farita de la heroa Vera Zasuliĉ²², en la jaro 1882. Nova dana eldono troviĝas en la *Socialdemokratisk Bibliotek*, Kopenhago 1885; nova franca traduko en *Le Socialiste*, Parizo, 1886.²³ Laŭ tiu ĉi oni preparis hispanan tradukon kaj publikigis ĝin 1886 en Madrido. La nombro de la germanaj represoj ne precize indikeblas, entute ili estis almenaŭ dek du. Traduko en la armenan,

20 Vd p. 12, pn 4*. -vl

21 *Aleksandr Hercen* (1812-1870), demokrata revoluciulo . Ekde 1855 li eldonis la almanahon *Poljarnaja Zvezda* („Polusa stelo”), kaj du jarojn poste li fondis la revuon *Kolokol* („Sonorilo”), kiu aperis inter 1857 kaj 1867. -vl

22 *Vera Ivanovna Zasuliĉ* (ankaŭ: *Sasuliĉ*) (1849-1919). En 1873 ŝi aliĝis en Kievo al la grupo Kievaj Ribeluloj, kiuj subtenis la anarĥiismajn ideojn de Miĥaelo Bakunino kaj fariĝis respektata gvida figuro de tiu movado. Post ŝia atenco kontraŭ la carista generalo *Teodore Trepov*, en januaro 1878, ŝi iris al Svislando, kie ŝi ekrlatis kun la tieaj marksistoj (Lenino ktp). Ŝi tradukis kelkajn verkojn de Markso, kun kiu ŝi korespondis (vd Karlo Markso: Respondo al V. I. *Sasuliĉ*, kun *Klaus Gietinger*: La miskompreno [librofina librolisto n-ro 73]). -vl

Tiu ĉi dua rusa traduko estas de *Pleĥanov** kaj ne de *V. Zasuliĉ*. Engelso mem en la postparolo al sia artikolo „Socialaĵoj el Ruslando”, verkita en 1894, mencias kiel aŭtoron de tiu dua rusa eldono Pleĥanov-on. Ankaŭ Pleĥanov indikas en la eldono de la Manifesto de 1900 ke li mem faris la tradukon. -ecs

*) Georgij Valentinoviĉ Pleĥanov (1856-1918) estis granda rusa marksisto, filozofo, elstara aganto de la rusia kaj internacia socialisma movado. Li estis unu el la fondintoj de la Rusia Socialdemokratia Laborpartio. Ekde 1880 li elmigris el Rusujo pro politika persekuto kaj loĝis ekster Ruslando ĝis 1917. Li rilatis negative al la Oktobra Revolucio, opiniante, ke Rusujo ankoraŭ ne maturiĝis por socialismo. Tamen, V. I. Lenin opiniis la filozofiajn verkojn de Pleĥanov nepre studendaj por ĉiu, kiu strebas esti marksisto. -jf

23 Tiu ĉi franca traduko aperis en *Le Socialiste* en la jaro 1885. (Noto de MEW, vol. 4) -ecs

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio”
(angla eldono de 1888)]

kiu devis antaŭ kelkaj monatoj aperi en Konstantinopolo²⁴, ne enmondiĝis, ĉar, kiel oni komunikis al mi, la eldonisto ne havis la kuraĝon eldoni libron sur kiu staras la nomo Markso, dum la tradukinto rifuzis nomi ĝin sia propra verko. Pri kromaj tradukoj al aliaj lingvoj mi ja aŭdis, sed ne vidis ilin. Tiel la historio de la *Manifesto* en alta grado spegulas la historion de la moderna laborista movado; nuntempe ĝi estas sendube la plej disvastiĝinta, plej internacia verko de la tuta socialisma literaturo, komuna programo, agnoskata de milionoj da laboristoj de Siberio ĝis Kalifornio.

Kaj tamen, kiam ĝi estis verkata, ni ne povintus nomi ĝin *socialista manifesto*. Sub socialistoj oni komprenis 1847 unuflanke la adeptojn de la diversaj utopiaj sistemoj: la ovenistojn²⁵ en Anglujo, la furieristojn²⁶ en Francujo, kiuj ambaŭ estis jam ŝrumpintaj al nuraj sektoj iom post iom formortantaj; aliflanke la plej diversajn socialajn ĉarlatanojn, kiuj per diversaj flikaĵoj, sen ajna danĝero por kapitalo kaj profito, promesis forigi la ĉiaspecajn sociajn misaĵojn – en ambaŭ kazoj homojn kiuj staris ekster la laborista movado kaj serĉis subtenon prefere ĉe la „kleraj” klasoj. Tiu parto de la laborista klaso, kiu konvinkiĝis pri la nesufiĉo de nur politikaj transformoj kaj postulis la neceson de totala transformado de la socio, tiu parto tiam nomis sin komunista. Tiu estis ankoraŭ kruda, ne polurita, pure in-

24 Unu el la antaŭaj nomoj de la nuna Istanbul. -vl

25 Adeptoj de Roberto Oveno (*Robert Owen* [róbet óŭven] 1771 – 1858), angla utopia socialisto. Profesie fabrikisto. La praktikaj spertoj kolektitaj en liaj fabrikoj kondukis lin al la komunista teorio. Li rifuzis ĉian perforton. Por skizi sian planon de la estonteco, li uzis la realajn konojn akiritajn en sia industria praktiko. Kiam li engaĝiĝis por la komunismo, la oficiala socio disiĝis de li. (Laŭ la indekso de Karlo Markso: La kapitalo, vol. 1 (n-ro 68 de la librofina librolisto), p. 744. -vl

26 Adeptoj de Furiero (*François Charles Fourier* [frasŭá ŝárl furié], 1772 – 1837), franca utopia socialisto. -vl „En Furiero ni renkontas akran kritikon, aŭtente francan, sed pro tio ne malpli tranĉan, de la ekzistantaj sociaj institucioj. Li senkompte nudigas la materian kaj moralan mizeron de la burĝa mondo.” -fe

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio”
(angla eldono de 1888)]

stinkta speco de komunismo; sed ĝi trafis la ĉefan punkton kaj estis en la laborista klaso sufiĉe forta por produkti la utopian komunismon, en Francujo tiun de Cabet²⁷, en Germanujo tiun de Vejtlingo²⁸. Do, en la jaro 1847 socialismo estis movado de la meza klaso, komunismo movado de la laborista klaso. La socialismo estis, almenaŭ sur la kontinento, „frequentebla”; la komunismo estis la preciza malo. Kaj ĉar ni jam dekomence opiniis, ke „la emancipiĝo de la laborista klaso devas esti la faro de la laborista klaso mem”, tial ne povis esti dubo pri kiun el la du nomoj ni elektu. Kaj eĉ pli, ankaŭ de tiam neniam venis al nia menso la ideo malkonfesi ĝin.

Kvankam la *Manifesto* estis la komuna laboro de ni ambaŭ, mi tamen pensas esti devigata konstati, ke la baza ideo, kiu konsistigas ĝian kernon, apartenas al Markso. Tiu ideo konsistas en jeno: ke en ĉiu historia epoko la dominanta ekonomia maniero produkti kaj interŝanĝi kaj la el ĝi nepre sekvanta socia strukturiĝo fariĝas la bazo, sur kiu la politika kaj la intelekta historio de tiu epoko konstruiĝas kaj el kiu ĝi sole klarigeblas; ke laŭ tio la tuta historio de la homaro (ekde la malapero de la primitiva genta socio kun sia komuna posedo de grundo) estis historio de klasbataloj; de bataloj inter ekspluatantaj kaj ekspluatataj, regantaj kaj subpremataj klasoj; ke la historio de tiuj klasbataloj prezentas serion de evoluado, kiu nuntempe atingis ŝtupon, kie la ekspluatata kaj subpremata klaso – la proletaro – ne povas atingi sian liberiĝon el la jugo de la ekspluatanta kaj reganta klaso – la burĝaro – sen samtempe liberigi la tutan socion unufoje por ĉiam el ĉia ekspluatado kaj subpremado, el ĉiaj klasaj diferencoj kaj klasbataloj.

Al tiu ideo, kiu miaopinie estas alvokita kaŭzi por la histori-scienco la

27 *Étienne Cabet* [etjén kabé], 1788-1856), franca teoriulo kaj politikisto. En sia *Vojaĝo al Ikario* (1842) li disvolvis komunisman utopion. -vl

28 *Wilhelm Weitling* [vîlhelm vâjtling] (1808-1871), germana revoluciulo, proponis kristanan komunismon, kontraŭis Markson, partoprenis en la revolucio de 1848. Li publikigis, en la jaro 1845, „Evangelio de malriĉa pekulo”. -vl

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio”
(angla eldono de 1888)]

saman progreson kiun la teorio de Darvino kaŭzis por la naturscienco – al tiu ideo ni ambaŭ iom post iom alproksimiĝis jam plurajn jarojn antaŭ 1845. Kiom mi mem sendepende estis progresinta en tiu direkto, tion plej bone montras mia „Situacio de la laboranta klaso en Anglujo”²⁹. Sed kiam mi printempe de 1845 reenkontis Markson en Bruselo, li estis jam tute ellaborinta ĝin kaj prezentis ĝin al mi per preskaŭ same klaraj vortoj kiel tiuj, per kiuj mi supre resumis ĝin.

El nia komuna antaŭparolo al la germana eldono de 1872 mi citas la jenon:

„Kiom ajn la kondiĉoj en la lastaj dudek kvin jaroj ŝanĝiĝis, la ĝeneralaj principoj disvolvita en tiu ĉi *Manifesto* konservas entute ankaŭ hodiaŭ sian plenan ĝustecon. Detaloj estus ie kaj tie plibonigendaj. La praktika aplikado de tiuj principoj, klarigas la *Manifesto* mem, dependos ĉie kaj ĉiam de la historie donitaj cirkonstancoj, kaj pro tio tute ne estas atribuita aparta graveco al la revoluciaj disponoj proponitaj fine de la sekcio 2. Tiu tekstero tekstus hodiaŭ multilate alie. Vide al la giganta evoluo de la granda industrio post 1848 kaj al la ĝin akompananta plibonigita kaj kreskinta organiziĝo de la laborista klaso³⁰, vide al la praktikaj spertoj, unue de la februara revolucio kaj eĉ multe pli de la Pariza Komunumo, kie la proletaro por la unua fojo dum du monatoj havis la politikan potencon, tiu ĉi programo estas hodiaŭ kelkloke arĥaiginta. Speciale la Komunumo liveris la pruvon, ke 'la laborista klaso ne povas simple ekposedi la ŝtatmaŝinon kaj funkciigi ĝin por siaj propraj celoj'. (Vidu *The Civil War in France. Address of the General Council of the International Working-Men's Association*, Londono,

29 *Friedrich Engels: Lage der arbeitenden Klasse in England*. MEW, vol. 2, p. 225 – 506. -vI O

30 En la teksto de 1872: „en la lastaj dudek kvin jaroj kaj la kun ĝi progresanta parti-organizado (anstataŭ: post 1848 kaj al la ĝin akompananta plibonigita kaj kreskinta organiziĝo). -mew

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la „Manifesto de la Komunista Partio”
(angla eldono de 1888)]

Truelove, 1871, p. 15, kie tio estas pli disvolvita.)³¹ Krome estas memkomprenebla, ke la kritiko de la socialista literaturo estas por hodiaŭ mankhava, ĉar ĝi atingas nur ĝis la jaro 1847; same, ke la rimarkoj pri la pozicio de la komunistoj rilate al la diversaj opoziciaj partioj (sekcio 4), kvankam en la bazaj trajtoj ankaŭ hodiaŭ ankoraŭ ĝustaj, tamen en sia redaktado estas hodiaŭ arĥaiĝintaj, jam ĉar la politika situacio totale transformiĝis kaj la historia evoluo elmondigis la plej multajn el la tie menciitaj partioj.

Tamen, la *Manifesto* estas historia dokumento, kiun ŝanĝi ni jam ne atribuas al ni la rajton.”

Tiu ĉi traduko estas farita de s-ro Samuel Moore, la tradukinto de la plej granda parto de la marka *Kapitalo*. Ni trarigardis ĝin kune, kaj mi aldonis kelkajn piednotojn por klarigo de historiaj aludoj.

Londono, la 30-an de januaro 1888

Frederiko Engelso

31 En Esperanto: Karlo Markso: La interna milito en Francujo (1871) (La Pariza Komunumo), kun enkonduko de Frederiko Engelso. Tradukis Vilhelmo Lutermano, Mondial, Novjorko, 2005, 137 paĝoj, ISBN 1-59569-025-5, p. 19s. -vl

Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la kvara germana eldono (1890)

Post kiam la supra teksto³² estis verkita, ree nova germana eldono de la *Manifesto* fariĝis necesa, kaj ankaŭ diversaj aliaj aferoj okazis pri la *Manifesto*, kiuj estas ĉi tie menciindaj.

Dua rusa traduko – de Vera Zasuliĉ³³ – aperis en 1882 en Ĝenevo; la antaŭparolo al ĝi estis verkita de Markso kaj mi. Bedaŭrinde mi perdis la germanan originalan manuskripton, mi devas do retraduki el la rusa, per kio la laboro tute ne pliboniĝas. Ĝi tekstas:³⁴

„La unua rusa eldono de la 'Manifesto de la Komunista Partio', en la traduko de Bakunino³⁵, aperis komence de la sesdekaj jaroj en la presejo de *Kolokol*. Tiam rusa eldono de tiu ĉi verko estis en la Okcidento en la plej bona kazo konsiderata kiel literatura kuriozaĵo. Hodiaŭ tia opinio ne plu eblas. Kiom limigita estis la regiono de disvastiĝo de la proletara movado tempe de la unua publikigo de la *Manifesto* (januaro 1848), tion montras plej bone la lasta ĉapitro: 'Pozicio de la komunistoj rilate al la diversaj opoziciaj partioj'. Tie mankas precipe Ruslando kaj Usono. Tiutempe Ruslando estis la lasta granda rezervo de la eŭropa reakcio kaj kie la elmigrado al Usono sorbis la senokupajn fortojn de la eŭropa proletaro. Ambaŭ landoj provizis Eŭropon per krudmaterialo kaj servis samtempe kiel merkatoj por vendi siajn industriproduktojn. Ambaŭ aperis do, en iu aŭ alia maniero, kiel apogoj de la eŭropa socia ordo.

Kiom ĉio ĉi hodiaŭ ŝanĝiĝis! Ĝuste la eŭropa elmigrado ebligis la gi-

32 Engelso celas sian antaŭparolon al la germana eldono de 1883. -vl

33 Pri Vera I. Zasuliĉ vd p. 47, pn 22. -vl.

Vd ankaŭ Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun Klaus Gietinger: La miskompreno (librofina librolisto n-ro 73). -vl

34 La originalo perdita de Engelso kaj redaktita de li kaj Markso por la rusa eldono de 1882 estis trovita kaj troviĝas en Moskvo. -ecs

35 Vd p. 12, pn 4*. -vl

Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la kvara germana eldono (1890)

gantant evoluon de la usona kampkulturo, kiu per sia konkurenco skuas la fundamentojn de granda kaj malgranda grundproprietoj en Eŭropo. Ĝi donis krome al Usono la eblecon komenci la ekspluatadon de siaj riĉaj industriaj helpfontoj, kaj tio okazas kun tiom da energio kaj tiaskale, ke tio post mallonga tempo devas ĉesigi la monopolon de la eŭropa okcidento. Kaj tiuj du cirkonstancoj retroefikas ankaŭ en revolucia direkto al Usono. La malgranda kaj granda grundproprietoj de la mem laborantaj farmistoj, la fundamento de la tuta politika ordo de Usono, pli kaj pli subiĝas al la konkurenco de la gigantaj farmoj, dum samtempe en la industridistriktoj por la unua fojo estiĝas multnombra proletaro apud fabele alta koncentriĝo de la kapitaloj.

Ni iru al Ruslando. Tempe de la revolucio de 1848-1849 ne nur la eŭropaj monarĥoj, sed ankaŭ la eŭropaj burĝoj vidis en la rusa interveno la solan savon kontraŭ la proletaro, kiu tiam nur komencis percepti siajn fortojn. Ili proklamis la caron kapo de la eŭropa reakcio. Hodiaŭ li sidas en Gaĉino kvazaŭ militkaptito de la revolucio,³⁶ kaj Ruslando estas la avangardo de la revolucia movado de Eŭropo.

La tasko de la 'Komunista manifesto' estis la proklamo de neeviteble proksima pereado de la hodiaŭa burĝaro. Sed en Ruslando ni trovas, apud la febre evoluanta kapitalisma ordo kaj la nur ĵus estiĝanta burĝa grundproprietato, la pli grandan duonon de la grundo en la proprieto de la kampuloj.

Leviĝas la demando: Ĉu la rusa kampula komunumo, tiu tamen jam tute ne integra formo de la praa komuna proprieto je grundo, povas transiri en pli altan komunisman formon de grundproprietato, aŭ ĉu ĝi devas antaŭe trairi la saman dissolviĝan procezon, kiu prezentiĝas en al historia evoluo de la Okcidento?

La sola hodiaŭ ebla respondo al tiu demando estas la jena. Se la rusa revolucio fariĝas la signalo de laborista revolucio en la Okcidento, tiel ke ambaŭ sin reciproke kompletigas, tiam la hodiaŭa rusa komuna proprieto

36 Vd p. 40, pn 12. -v1

Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la kvara germana eldono (1890)

povas servi kiel elirpunkto de komunisma evoluo.³⁷

Londono, la 21-an de januaro 1882.”

Nova pola traduko aperis proksimume samtempe en Ĝenevo: „Manifesto komunstyczny”.

Krome, nova dana traduko aperis en „Socialdemokratisk Bibliotek”, Kopenhago 1885. Bedaŭrinde ĝi ne estas tute kompleta; kelkaj esencaj teksteroj, kiuj ŝajnas esti kaŭzintaj malfacilaĵojn al la tradukinto, estas ellasitaj kaj ankaŭ cetere ie kaj tie rimarkeblas spuroj de neatentemo, kiuj okulfrapas des pli malagrabla, ĉar oni vidas ĉe la laboraĵo, ke la tradukisto per iom pli da zorgemo povintus atingi elstaran rezulton.

En la jaro 1886 aperis nova franca traduko en „Le Socialiste”, Parizo;³⁸ ĝi estas la plej bona ĝis nun aperinta.

Post ĝi en la sama jaro hispana traduko estis publikigita unue en la madrida „El Socialista” kaj poste kiel broŝuro: „Manifiesto del Partido Comunista” por Carlos Marx y F. Engels, Madrid, Administración de „El Socialista”, Hernán Cortés 8.

Kiel kuriozaĵon mi ankoraŭ menciuj, ke 1887 la manuskripto de armena traduko estis proponita al konstantinopola eldonisto; sed tiu bonulo ne havis la kuraĝon presi ion, sur kiu staras la nomo Markso, kaj li proponis, ke la tradukinto prefere nomu sin mem kiel aŭtoron, kion tiu tamen rifuzis.

Post kiam jen unu, jen alia el la pli aŭ malpli malĝustaj usonaj tradukoj estis plurfoje represitaj en Anglujo, fine aperis aŭtenta traduko en la jaro 1888. Ĝi estas farita de mia amiko Samuel Moore kaj antaŭ la presiĝo kontrollegita de ni ambaŭ. La titolo estas: „Manifesto of the Communist Party”, by Karl Marx and Frederick Engels. Authorized English Translation, edited and annotated by Frederick Engels, 1888, London, William Reeves, 185 Fleet

37 Vd pri tiu demando ankaŭ: Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ [...] (libro-fina librolisto n-ro 73). -v1

38 Tiu ĉi franca traduko aperis en *Le Socialiste* de 1885. -ecs

St. E.C. Kelkajn notojn de tiu eldono mi transprenis en tiun ĉi.

La „Manifesto” havis propran biografion. En la momento de ĝia apero entuziasme salutata de la tiam ankoraŭ malalta nombro de avangardo de la scienca socialismo (kion pruvas la tradukoj menciitaj en la unua antaŭparolo)³⁹, ĝi estis baldaŭ premata en la fonon pro la reakcio, kiu komenciĝis kun la malvenko de la parizaj laboristoj en junio 1848⁴⁰, kaj estis jure⁴¹ proskrita per la kondamno de la kolonjaj komunistoj, en novembro 1852⁴². Kune kun la laborista movado, kiu datiĝis de la februara revolucio, ankaŭ la „Manifesto” malaperis de la publika scenejo en la fonon.

Kiam la eŭropa laborista klaso sufiĉe refortiĝis por nova impeto kontraŭ la potenco de la regantaj klasoj, estiĝis la Internacia Laborista Asocio. Ĝi celis kunfandi la tutan bataleman laboristaron de Eŭropo kaj Usono al *unu* granda armea korpo. Pro tio ĝi ne povis *eliri* el la principoj skribitaj en la „Manifesto”. Ĝi devis havi programon, kiu ne fermu la pordon al la anglaj sindikatoj, al la francaj, belgaj, italaj kaj hispanaj prudonistoj nek al la germanaj lasalanoj.⁴³ Tiu programo – la argumentoj por la statutoj de la Internacio – estis skizitaj de Markso kun majstreco agnoskita eĉ de Bakunino kaj la anarĥiistoj. Por la fina venko de la principoj starigitaj en la „Manifesto” Markso fidis sole la intelektan evoluon de la laborista klaso, tian kia ĝi devis nepre rezulti el la unuigita agado kaj el la diskutado. La okazaĵoj kaj sortoŝanĝoj en la batalo kontraŭ la kapitalo, la malvenkoj eĉ pli ol la

39 Vd ĉi tie p. 36sj. -vl

40 Vd p. 37, pn 3. -vl

41 Originale: „*von Rechts wegen*”, „laŭ justeco” (esprimo kiu pretendas, ke tribunaj decidoj estas ne nur laŭjuraj, sed ankaŭ justaj – pro la duobla senco de la vorto *Recht* [juro kaj justo], do, „tribunale”, „jure”. Engelson, metante tiun esprimon inter citilojn, atentigas pri tiu duobla senco. -vl

42 Vd p. 45, pn 16. -vl

43 Lasalo al mi persone konfesis sin esti disĉiplo de Markso, kaj kiel tia li staris sur la fundamento de la *Manifesto*. Alie statas pri tiuj el liaj adeptoj, kiuj ne transiris lian postulon de produktadaj kooperativoj kun ŝtata kredito kaj kiuj dividis la tutan laboristan klason en ŝtathelpatojn kaj memhelpantojn. -fe

sukcesoj, ne povis ne klarigi al la batalantoj la nesufiĉon de iliaj ĝisnunaj ĉiokuracaj rimedoj kaj fari iliajn mensojn pli akceptemaj por pli ĝisfunda kompreno de la veraj kondiĉoj de la laborista emancipiĝo. Kaj Markso pravis. La laborista klaso de 1874, ĉe la malfondo de la Internacio, estis tute alia ol estis tiu de 1864, dum ĝia fondo. La prudonismo en la latinid-lingvaj landoj, la specifa lasalismo en Germanujo, estis formortantaj, kaj eĉ la tiamaj ĝisoste konservativaj anglaj sindikatoj iom post iom proksimiĝis al la punkto, ĉe kiu en la jaro 1887 la prezidanto de ilia kongreso en Swansea⁴⁴ povis diri en ilia nomo: „La kontinenta socialismo perdis siajn terurajn aspektojn por ni.” Sed la kontinenta socialismo, tiu estis en 1887 jam preskaŭ nur la teorio anoncita en la „Manifesto”. Kaj tiel la historio de la „Manifesto” certagrade respregulas la historion de la moderna laborista movado ekde 1848. Nuntempe ĝi estas sendube la plej disvastiĝinta, la plej internacia produkto de la tuta socialisma literaturo, la komuna programo de multaj milionoj da laboristoj de ĉiuj landoj de Siberio ĝis Kalifornio.

Kaj tamen, kiam ĝi aperis, ni ne rajtis nomi ĝin *socialista* manifesto. Sub socialistoj oni komprenis en 1847 du specojn de homoj. Unuflanke la adeptojn de la diversaj utopiaj sistemoj, speciale la ovenistojn⁴⁵ en Anglujo kaj la furieristojn⁴⁶ en Francujo, kiuj ambaŭ estis tiam jam ŝrumpintaj al nuraj, iom post iom formortantaj sektoj. Aliflanke la plej diversajn socialajn ĉarlatanajn, kiuj per siaj diversaj ĉiokuracaj rimedoj kaj per ĉia flikaĵo volas forigi la sociajn malbonaĵojn, sen eĉ nur iomete kaŭzi doloron al la kapitalo kaj al la profito. En ambaŭ kazoj: homoj, kiuj staris ekster la laborista movado kaj kiuj anstataŭe serĉis subtenon ĉe la „kleraj” klasoj. Sed tiu parto de la laboristoj, kiu, male, estis konvinkita pri la nesufiĉo de nur politikaj transformejoj, kiu postulis pli profundan transformon de la socio, tiu parto nomis sin tiam *komunista*. Ĝi estis komunismo nur krude prilaborita, nur

44 Vd p. 46, pn 19. -vl

45 Adeptoj de Oveno. Pri tiu vd p. 48, pn 25; p. 97, pn 91; p. 99, pn 92. -vl

46 Adeptoj de la ideoj de Furiero. Pri tiu vd p. 48, pn 26; p. 97, pn 90; p. 99, pn 92. -vl

Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la kvara germana eldono (1890)

instinkta, kelkfoje iom kruda; sed ĝi estis sufiĉe pova por produkti du sistemojn de la utopia komunismo, en Francujo la „ikaran” de Kabeto⁴⁷, en Germanujo tiun de Vejtlingo⁴⁸. Socialismo signifis en la jaro 1847 burĝan movadon, komunismo laboristan movadon. La socialismo estis, almenaŭ sur la kontinento, frekventebla, la komunismo estis la ĝusta malo. Kaj ĉar ni jam tiam tre decide opiniis, ke „la emancipiĝo de la laboristoj devas esti la faro de la laborista klaso mem”,⁴⁹ tial ni povis eĉ ne por momento dubi pri kiun el la du nomoj ni elektu. Ankaŭ de tiam ni ekhavis neniam la ideon rifuzi ĝin.

„Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!” Nur malmultaj voĉoj respondis, kiam ni elvokis tiujn vortojn en la mondon, antaŭ nun 42 jaroj, ĵus antaŭ la unua pariza revolucio, en kiu la proletaro elpaŝis kun siaj propraj pretendoj. Sed la 28-an de septembro 1864, proletoj de la plej multaj okcidenteŭropaj landoj unuiĝis al la Internacia Laborista Asocio de glora memoro. La Internacio mem tamen vivis nur naŭ jarojn. Sed ke la eterna Ligo de la proletoj de ĉiuj landoj, kiun ĝi fondis, ankoraŭ vivas, kaj pli forte vivas ol iam, por tio ne ekzistas pli bona atesto ol ĝuste la hodiaŭa tago. Ĉar hodiaŭ⁵⁰, dum mi skribas tiujn ĉi liniojn, la eŭropa kaj amerika proletaro inspektas siajn por la unua fojo mobilizitajn armeojn, mobilizitajn kiel *unu* armeon, sub *unu* flago kaj por *unu* plej proksima celo: la okhora norma labortago, proklamita jam

47 Etienne Cabet [*etjén kabé*] (1788-1856), franca utopia komunisto, verkis la libron „Vojaĝo al Ikario”. Vd p. 49, pn 27. -vl

48 Vd p. 49, pn 28. -vl

49 Tiu ĉi teoria tezo de Markso kaj Engelso estas disvolvita en serio da iliaj laboraĵoj ekde la 1840-aj jaroj, kaj en tiu ĉi formulo ĝi eniris la statutojn de la Internacia Asocio de Laboristoj. -ecs

50 Tiun ĉi antaŭparolon Engelso verkis la 1-an de majo 1890, la tagon, en kiu, per interkonsento de la Pariza Kongreso de la 2-a Internacio (julio de 1889) en diversaj landoj de Eŭropo kaj Ameriko okazos amasaj manifestacioj, strikoj kaj laboristaj mitingoj, kun la postulo de la okhora labortago kaj plenumo de ceteraj interkonsentoj de la kongreso. De tiam la laboristoj de ĉiuj landoj festas ĉiujare la 1-an de majo kiel tagon de batalemo de la revoluciaj fortoj kaj de internacia solidareco de la proletaro. -ecs

Frederiko Engelso: Antaŭparolo al la kvara germana eldono (1890)

de la ĝeneva kongreso de la Internacio en 1866 kaj ree de la pariza laborista kongreso en 1889⁵¹. Kaj la spektaklo de la hodiaŭa tago malfermos la okulojn al la kapitalistoj kaj grundmastroj de ĉiuj landoj, ke hodiaŭ la proletoj de ĉiuj landoj estas efektive unuiĝintaj.

Se nur Markso starus apud mi por vidi tion propraokule!

Londono, la 1-an de majo 1890

F. Engelso

51 La unua kongreso de la Internacia Laborista Asocio okazis de la 3-a ĝis la 8-a de septembro 1866 en Ĝenevo. La plej gravaj decidoj de la kongreso baziĝas sur la de Markso ellaboritaj „instrukcioj por la delegitoj de la Provizora Centra Konsilantaro pri la unuopaj demandoj”. La kongreso akceptis i.a. ses el la entute naŭ de Markso verkitaj punktoj, inter ili rezolucion pri limigo de la taga labortempo. La Internacia Socialista Kongreso en Parizo, kiu fariĝis la fondokongreso de la 2-a Internacio, okazis de la 14-a ĝis la 20-a de julio 1889. La kongreso ellaboris la bazon por internaciaj leĝoj por gardi la rajtojn de la laboristoj. La decido de la kongreso, la 1-an de majo 1890 en ĉiuj landoj organizi manifestaciojn por la okhora labortago kaj por internacia solicareco, fariĝis la naskiĝa horo de la bataltago de la laborista klaso. (laŭ -db) -v1

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la dua pola eldono (1892) de la „Manifesto de la Komunista Partio”]

La fakto, ke nova pola eldono de la „Komunista Manifesto” fariĝis necesa, donas la okazon por diversaj pripensoj.

Unue rimarkindas, ke la „Manifesto” lastatempe fariĝis kvazaŭ mezurilo por la grado de evoluo de la granda industrio sur la eŭropa kontinento. En la mezuro, kiel en iu lando la granda industrio etendiĝas, en la sama mezuro kreskas ankaŭ inter la laboristoj de la sama lando la aspiro je kleriĝo pri sia pozicio kiel laborista klaso fronte al la posedaj klasoj, disvastiĝas inter ili la socialisma movado kaj kreskas la postulo je la „Manifesto”. Tiel, ke ne nur la stato de la laborista movado, sed ankaŭ la evolugrado de la granda industrio en ĉiu lando mezureblas kun sufiĉe granda precizo laŭ la nombro de la ekzempleroj de la „Manifesto” disvastigitaj en la landa lingvo.

Laŭ tio, la nova pola eldono signas decidan progreson de la pola industrio. Kaj ke tiu progreso, ekde la lasta eldono aperinta antaŭ dek jaroj, reale okazis, pri tio ne povas esti dubo. Rusa Pollando, Kongres-Pollando⁵², fariĝis la granda industridistrikto de la rusa imperio. Dum la rusa granda industrio estas ie kaj tie dissemita – peco ĉe la Finna Golfo, peco en la centro (Moskvo kaj Vladimiro), tria ĉe la Nigra kaj la Azova Maroj, ankoraŭ aliaj aliloke dise –, la pola estas kunpremita en relative malgranda spaco kaj ĝuas la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiu koncentriĝo. La avantaĝoj estis rekonitaj de la konkurencantaj rusaj fabrikistoj, kiam ili postulis protektajn doganaĵojn kontraŭ Pollando, malgraŭ sia plej arda deziro transformi la polojn en rusojn. La malavantaĝoj – por la polaj fabrikistoj kaj por la rusa registaro – montriĝas en la rapida disvastiĝo de

52 Kongres-Pollando estis nomata tiu parto de Pollando, kiu, laŭ la decidoj de la Viena Kongreso de 1814-1815 estis oficiale aneksita de Ruslando, kun la nomo *Pola Regno*. -ecx

Frederiko Engelso: Antaŭparolo [al la dua pola eldono (1892) de la „Manifesto de la Komunista Partio”]

socialismaj ideoj inter la polaj laboristoj kaj en la kreskanta postulo de la „Manifesto”.

La rapida evoluo de la pola industrio, kiu eksuperis la rusan, estas tamen aliflanke pruvo por la nedetruibla vivforto de la pola popolo kaj nova garantio de ĝia baldaŭa nacia restariĝo. Sed la restarigo de sendependa forta Pollando estas afero, kiu koncernas ne nur la polojn, sed nin ĉiujn. Sincera internacia kunagado de la eŭropaj nacioj eblas nur, se ĉiu el tiuj nacioj estas en sia propra domo komplete aŭtonoma. La revolucio de 1848, kiu, sub proleta flago, igis proletajn batalantojn fari fine nur la laboron de la burĝaro, trudis, ankaŭ per siaj testamentaj ekzekuciistoj Louis Bonaparte kaj Bismar-ko, la sendependecon de Italujo, Germanujo, Hungarujo; sed Pollandon, kiu de 1792 faris por la revolucio pli ol ĉiuj ĉi tri kune, Pollandon oni lasis al ĝia propra forto, kiam ĝi en 1863 subiĝis al la dekobla rusa armea superforto.⁵³ La sendependecon de Pollando la nobelaro povis nek konservi nek batale reakiri; al la burĝaro ĝi estas hodiaŭ almenaŭ indiferenta. Kaj tamen ĝi estas necesa por la harmonia kunagado de la eŭropaj nacioj. Ĝi povas esti elbatalata nur de la juna pola proletaro, kaj en ties manoj ĝi estas sekura. Ĉar la laboristoj de la tuta cetera Eŭropo bezonas la sendependecon de Pollando same kiel la polaj laboristoj mem.

Londono, la 10-an de februaro 1892

F. Engelso

53 Temas pri la pola ribelo de nacia liberiĝo de 1863 ĝis 1864 kontraŭ la subpremado fare de la cara aŭtokratismo. Pro la malkonsekvenco de la partio de la „ruĝuloj”, etnobeloj, kiuj lasis la revolucion iniciaton preterpasi, la gvidado de la ribelo pasis en la manojn de la kampara aristokrataro kaj de la grandburĝaro, kiuj esperis avantaĝan kompromison kun la carista registaro. En la somero de 1864 la ribelo estis senkompate disbatita de la caristaj trupoj. -ecs

Frederiko Engelso: Al la itala leganto [Antaŭparolo al la itala eldono (1893)]

Laŭ la manskribo. El la franca.

La publikigado de la „Manifesto de la Komunista Partio” koincidis preskaŭ precize kun la 18-a de marto 1848, kun la revolucioj de Milano kaj Berlino, kie en la centro de la eŭropa kontinento unuflanke kaj de la mediteranea regiono aliflanke du nacioj leviĝis, kiuj ĝis tiam estis malfortiĝintaj pro teritoria diseriĝo kaj internaj kvereloj kaj pro tio submetitaj al fremda regado. Dum Italujo estis submetita al la imperiestro de Aŭstrujo (Ferdinando la 1-a), Germanujo, kvankam ne tiom rekte, devis porti la ne malpli pezan jugon de la caro de ĉiuj rusoj [Nikolao la 1-a]. La konsekvencoj de la 18-a de marto 1848 liberigis Italujon kaj Germanujon el tiu honto; se ambaŭ grandaj nacioj en la tempo de 1848 ĝis 1871 estis restarigitaj kaj, por tiel diri, redonitaj al si mem, tio okazis, kiel Karlo Markso diris, pro tio, ke la samaj homoj, kiuj frakasis la revolucion de 1848, poste malgraŭvole fariĝis la plenumantoj de ĝia testamento.

La revolucio estis tiam ĉie la faro de la laborista klaso; estis la laborista klaso, kiu starigis la barikadojn kaj riskis sian vivon. Nur la laboristoj de Parizo, kiam ili faligis la registaron, havis la eldiritan intencon faligi la burĝan reĝimon. Sed kiom ajn ili konsciis pri la neevitebla antagonismo ekzistanta inter ilia propra klaso kaj la burĝaro, nek la ekonomia progreso de la lando nek la intelekta evoluo de la francaj laboristaj amasoj atingis tiun gradon, kiu estus ebliginta transformadon de la socio. La fruktoj de la revolucio estis do fine kolektitaj de la kapitalista klaso. En la aliaj landoj, en Italujo, Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo, la laboristoj dekomence faris nenion alian ol enpotenciĝi la burĝaron. Sed en neniu lando la regado de la burĝaro eblas sen nacia sendependeco. La revolucio de 1848 devis do sekvigati la unuecon kaj sendependecon de tiuj nacioj, al kiuj ili ĝis tiam

Frederiko Engelso: Al la itala leganto [Antaŭparolo al la itala eldono (1893)

mankis: Italujo, Germanujo, Hungarujo; Pollando siatempe sekvos.

Kvankam la revolucio de 1848 do ne estis revolucio socialisma, ĝi tamen ebenigis la vojon al ĝi, preparis por ĝi la grundon. Kun la evoluo de la granda industrio en ĉiuj landoj la burĝa reĝimo en la lastaj 45 jaroj ĉie produktis multnombrajn, firme organizitan kaj fortan proletaron; ĝi produktis, por uzi esprimon de la „Manifesto”, siajn proprajn entombigistojn. Sen restarigo de la sendependeco kaj unueco de ĉiu eŭropa nacio, ne povintus okazi la internacia unuiĝo de la proletaro nek trankvila, saĝa kunagado de tiuj nacioj por atingi komunajn celojn. Imagu komunan internacian antaŭiradon de la italaj, hungaraj, germanaj, polaj, rusaj laboristoj sub la politikaj kondiĉoj de la tempo antaŭ 1848!

La bataloj de 1848 do ne estis vanaj, ne vanaj ankaŭ la 45 jaroj, kiuj disigas nin de tiu revolucia etapo. La fruktoj maturiĝas, kaj mi nur dezirus, ke la publikigado de tiu ĉi itala traduko de la „Manifesto” fariĝu bona antaŭsigno por la venko de la itala proletaro, kiel la publikigo de la originalo estis tia por la internacia revolucio.

La „Manifesto” plene rekonas la revolucion rolon, kiun la kapitalismo ludis en la pasinteco. La unua kapitalisma nacio estis Italujo. La fino de la feŭda mezepoko kaj la komenco de la moderna kapitalisma epoko estas stampita de granda figuro – de la italo Danto, kiu estis samtempe la lasta poeto de la mezepoko kaj la unua poeto de la nova epoko. Ĉu Italujo donacos al ni la novan Danto, kiu anoncos la naskiĝhoron de la proleta epoko?

Londono, la 1-an de februaro 1893

Frederiko Engelso

Manifesto de la Komunista Partio

Fantomo hantas en Eŭropo – la fantomo de komunismo. Ĉiuj potencoj de la malnova Eŭropo alianciĝis por sankta pelĉasado kontraŭ tiu fantomo, la papo⁵⁴ kaj la caro⁵⁵, Metternich⁵⁶ kaj Guizot⁵⁷, francaj radikaluloj kaj germanaj policistoj.

Kie estas la opozicia partio, kiu de siaj regantaj kontraŭuloj ne estus kalumniita kiel komunista, kie la opozicia partio, kiu ne estus reĵetinta la brulmarkan riproĉon de komunismo al la pli progresintaj opoziciuloj kaj al siaj reakciaj kontraŭuloj?

El tiu fakto sekvas du konstatoj.

La komunismo estas jam de ĉiuj eŭropaj potencoj agnoskata kiel poten-

-
- 54 Temas pri la papo Pio la 9-a (1792-1878, papeco de 1846 ĝis 1878). Lia papado (32 jaroj) estis la plej longa el ĉiuj, escepte de tiu de la apostolo sankta Petro, pri kiu oni cetere ne povas precize diri, kiam ĝi komenciĝis. En la jaro 1854 li deklaris la dogmon de la „senpeka koncipco de la Dipatrino”. En 1869 li kunvokis la unuan vatikanan koncilion, kiu interalie dekretis la principon de senerareco de la papo. Dum la ribeloj pri la unuigo de Italujo li rifuzis agnoski la novan italan ŝtaton kaj devis retirigi en Vatikanon. (Laŭ la E-a Vikipedio) -vl
- 55 Temas pri la caro Nikolao la 1-a (1796-1855). Li subpremis la polan ribelon de 1830-1831 kaj la hungaran revolucion de 1849, pro kio oni nomis lin la „ĝendarmo de Eŭropo”. -vl
- 56 *Klemens Lothar Wenzel* [klémens lótar véncel], grafo (ekde 1813 princo) de *Metternich* [méterniĥ] (1787-1874) estis ministro pri eksteraj rilatoj de la aŭstra imperio. Li fariĝis gvida politikisto de la eŭropa reakcio, agis por la monarĥisma principo kaj kontraŭbatalis la naciajn kaj liberalajn movadojn, kaj kompreneble la laboristajn. -vl
- 57 *François Guizot* [frasŭá gizó] (1787-1874), franca politikisto kaj historiisto; kiel ministro pri publika edukado (1832-1837) li organizis la bazlernejon. De 1840-1848 li estis ĉefministro de Francujo, sed falis (kaj kun li la monarĥio) en la revolucio de 1848. -vl

Manifesto de la Komunista Partio

co.

Urĝas la tempo, ke la komunistoj malkaŝe prezentu sian vidmanieron, siajn celojn, siajn tendencojn antaŭ la tuta mondo kaj kontraŭmetu al la fabelo pri fantomo de komunismo manifeston de la partio mem.

Por tiu celo komunistoj de plej diversa nacieco kunvenis en Londono kaj konceptis la sekvan manifeston, kiu estas publikigata en la angla, franca, germana, itala, flandra kaj dana lingvoj.

1. Burĝoj kaj proletoj⁵⁸

La historio de ĉia ĝisnuna socio⁵⁹ estas la historio de klasbataloj.

Liberulo kaj sklavo, patricio kaj plebano⁶⁰, barono kaj servutulo, gilda⁶¹ majstro kaj submajstro, mallonge, subpremantoj kaj subprematoj troviĝis reciproke en konstanta antagonismo, faris seninterrompan, jen kaŝitan, jen

58 Sub *burĝaro* estas komprenata la klaso de la modernaj kapitalistoj, kiuj estas la posedantoj de la sociaj produktadrimedoj kaj profitas el dunglaboro; sub *proletaro* la klaso de la modernaj dunglaboristoj, kiuj, ĉar ili ne posedas proprajn produktadrimedojn, dependas de tio ke ili vendas sian laborforton por povi vivi. [Noto de Engelso al la angla eldono de 1888]

59 Tio signifas, precize dirite, la historio transdonita *skribe*. En la jaro 1847 la prahistorio de la socio, la socia organizaĵo, kiu antaŭis ĉian skribe notitan historion, estis ankoraŭ preskaŭ nekonata. Poste Haxthausen* malkovris la komunan proprieton je grundo en Ruslando, Maurer** pruvis ĝin kiel la socian bazon, de kiu ĉiuj germanaj triboj historie eliris, kaj iom post iom oni trovis, ke vilaĝaj komunumoj kun komuna posedo estis la praformo de la socio de Hindio ĝis Irlando. Fine Morgan*** senŭualigis la internan strukturon de tiu praa komunisma socio en ĝia tipa formo per sia glora malkovro de la vera naturo de la gento kaj de ties pozicio en la tribo. Kun la dissolviĝo de tiuj praa komunumoj komenciĝas la disfendiĝo de la socio en apartajn klasojn kiuj fine fariĝis antagonismaj. Mi provis sekvi tiun procezon de dissolviĝo en „La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato” .**** [Noto de Engelso al la angla eldono de 1888]

*) *August Haxthausen* [*áŭgust háksthäuzen*] (1792-1866), prusa barono, kiu studis en Ruslando (1843-1844) kampkulturon kaj kamparan vivon. (laŭ -db) -vl

**) *Georg Ludwig Maurer* [*géork lúdvih máŭrer*] (1790-1872), germana ŝtatisto kaj historiisto, verkis pri konstitucioj kaj leĝoj en la antikveco kaj ĉe la antikvaj ĝermanoj. -vl

) *Lewis Henry Morgan* [*ljúis hénri mógen*] (1818 – 1881), usona etnografiisto, arĥeologiisto kaj historiisto, aŭtoro de „*Ancient Society, or Researches in the Lines of Human Progress from Savagery, through Bararism to Civilization*”, 1877, kies esplorrezultoj servis al Engelso kiel bazo de lia verko „La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato”.* -vl

****) Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato. MAS, 2010 (Librofina librolisto n-ro 26) -vl

1. Burĝoj kaj proletoj

malkaŝan batalon, batalon kiu ĉiufoje finiĝis per revolucia transformado de la tuta socio aŭ per la komuna pereco de la batalintaj klasoj.

En la antaŭaj epokoj de la historio ni trovas preskaŭ ĉie kompletan strukturiĝon de la socio en diversajn klasojn, diversajn tavolojn de la sociaj pozicioj. En la antikva Romo ni havas patriciojn, kavalirojn, plebanojn, sklavojn; en la mezepoko feŭdajn mastrojn, vasalojn, gildajn majstrojn, submajstrojn, servutulojn, kaj krome en preskaŭ ĉiuj ĉi klasoj apartajn tavolojn.

La moderna burĝa socio, kiu estiĝis el la pereco de la feŭda socio, ne forigis la klasajn antagonismojn. Ĝi nur metis novajn klasojn, novajn kondiĉojn de subpremado, novajn batalformojn en la lokon de la malnovaj.

Sed nia epoko, la epoko de la burĝaro, distingiĝas per tio, ke ĝi simpligis la klasajn antagonismojn. La tuta socio disfendiĝas pli kaj pli en du grandajn malamikajn tendarojn, en du grandajn klasojn starantajn rekte unu kontraŭ la alia: burĝaron kaj proletaron.

El la servutuloj de la mezepoko estiĝis la palisburĝoj⁶² de la unuaj urboj; el tiu palisburĝaro evoluis la unuaj elementoj de la burĝaro.

La malkovro de Ameriko, la ĉirkaŭvelado de Afriko kreis al la supreniĝanta burĝaro novan terenon. La orientindia kaj la ĉina merkatoj, la koloniigo de Ameriko, la interŝanĝo kun la kolonioj, la pliigo de la interŝanĝrimedoj, kaj de la varoj entute, donis al la komerco, al la ŝipveturado, al la industrio neniam spertitan impeton kaj per tio al la revolucia elemento en la disfalanta feŭda socio rapidan evoluon.

La ĝistiam feŭda aŭ gilda produktadmaniero de la industrio jam ne

60 Patricio: membro de la nobelaro en la antikva Romo, pli poste: privilegia urba civitano; plebano: en la antikva Romo, membro de la malriĉaj tavoloj. -vl

61 La vortoj *gildo* kaj *korporacio* estas uzataj sinonime. -vl

62 „Palisburĝoj estas] ĉiuj tiuj membroj de la kampara loĝantaro [...], kiuj troviĝis en ia dependecrilato al landa aŭ grunda sinjoro, [...] kaj tamen eniris rilatojn de civitana juro de urbo.” (laŭ la germanlingva Vikipedio) -vl

1. Burĝoj kaj proletoj

sufiĉis por la bezono kreskanta kun la novaj merkatoj. La manufakturo anstataŭis ĝin. La gildajn majstrojn anstataŭis la industria meza klaso; la labordivido inter la diversaj korporacioj malaperis, cedante al la labordivido en la unuopa laborejo mem.

Sed ĉiam kreskis la merkatoj, ĉiam altiĝis la bezono. Ankaŭ la manufakturo jam ne sufiĉis. Tiam la vaporo kaj la maŝinaro revoluciis la industrian produktadon. En la lokon de la manufakturo paŝis la moderna granda industrio, en la lokon de la industria meza klaso paŝis la industriaj miliardoj, la ĉefoj de tutaj industriaj armeoj, la modernaj burĝoj.

La grandindustrio produktis la mondmerkaton, kiun la malkovro de Ameriko preparis. La mondmerkato donis al la komerco, al la ŝipveturado, al la teraj komunikiloj senmezuran disvolviĝon. Tiu siavice reefikis al la etendo de la industrio, kaj en la sama mezuro, en kiu industrio, komerco, ŝipveturado, fervojoj etendiĝis, en la sama mezuro disvolviĝis la burĝaro, tiu pliigis siajn kapitalistojn, ŝovis en la fonon ĉiujn klasojn, kiuj devenis el la mezepoko.

Ni vidas do, ke la moderna burĝaro mem estas la produkto de longa evoluo, de serio da transformegoj en la produktad- kaj cirkulad-maniero.

Ĉiu el tiuj evoluŝtupoj de la burĝaro estis akompanata de respektiva politika progreso. Kiel subpremata klaso sub la regado de la feŭdaj mastroj, armita kaj sin mem administranta asocio en la komunumo⁶³, jen sendependa urba respubliko, jen tria impostodeva klaso de la monarĥio, poste dum la tempo de la manufakturo kontraŭpezo kontraŭ la nobelaro en la diversklasa

63 „Komunumo” nomiĝis la urboj estiĝantaj en Francujo, eĉ antaŭ ol ili kapablis eltrudi de siaj feŭdaj mastroj kaj majstroj lokan memadministradon kaj politikajn rajtojn kiel „tria klaso”. Generale dirite, ni menciis ĉi tie kiel tipan landon por la ekonomia evoluo de la burĝaro Anglujon, por ĝia politika evoluo Francujon. [Noto de Engelso al la angla eldono de 1888]

Tiel la urbaj civitanoj de Italujo kaj Francujo nomis sian urban komunumon, post kiam ili elaĉetis aŭ eltrudis de siaj feŭdaj mastroj la unuajn rajtojn je memadministrado. [Noto de Engelso al la germana eldono de 1890]

1. Burĝoj kaj proletoj

aŭ en la absoluta monarĥio, ĉefa bazo de la grandaj monarĥioj entute, fine ekde la estigo de la grandindustrio kaj de la mondmerkato en la moderna reprezenta ŝtato ĝi elbatalis por si la ekskluzivan politikan regadon. La moderna ŝtatpotenco estas nur komisiono, kiu administras la komunajn aferojn de la tuta burĝa klaso.

La burĝaro ludis en la historio plej revolucian rolon.

La burĝaro, kie ĝi enpotenciĝis, detruis ĉiujn feŭdajn, partriarkajn, idiliajn kondiĉojn. Ĝi senkompatate disŝiris la plej diversajn feŭdajn ligojn, kiuj ligis la homon al lia natura superulo kaj lasis nenian alian ligon inter homo kaj homo ol la nudan intereson, ol la senaniman „kontantan pagon”. La sanktajn ekstazojn de pia revemo, de kavalira entuziasmo, de filistra sentimentaleco ĝi dronigis en la glacia akvo de egoisma kalkulo. Ĝi dissolvis la personan dignon en la interŝanĝvaloro kaj metis en la lokon de la sennombraj garantiitaj kaj bone akiritaj liberecoj la solan senkonsciencan liberecon de komerco. Per unu vorto, ĝi metis en la lokon de ekspluatado vualita per religiaj kaj politikaj iluzioj la malkaŝan, impertinentan, rektan, sekan ekspluatadon.

La burĝaro forprenis la glorkronon de ĉiuj ĝis nun honorindaj kaj kun pia respekto rigardataj agadoj. Ĝi transformis la kuraciston, la juriston, la pastron, la poeton, la scienculon en siajn pagatajn dunglaboristojn.

La burĝaro deŝiris la kortuŝe-sentimentalan vualon de la familia rilato kaj reduktis ĝin al pura monrilato.

La burĝaro malkaŝis, ke la brutala fortelmontro, kiun la reakciularo tiom admiras ĉe la mezepoko, trovis sian taŭgan kompletigon en la plej malvigla nenifarado. Ĝi pruvis la unua, kion la agado de homoj povas efektiviĝi. Ĝi faris tute aliajn mirindaĵojn ol egiptiajn piramidojn, romajn akvoduktojn kaj gotikajn katedralojn, ĝi faris tute aliajn migradojn ol popolmigradojn kaj krucmilitojn⁶⁴.

64 Krucmilitoj: militiroj por kolonii la Orienton faritajn de la grandaj feŭdistoj de

1. Burĝoj kaj proletoj

La burĝaro ne povas ekzisti sen konstante revolucii la produktadinstrumentojn, do la produktadkondiĉojn, do ĉiujn sociajn kondiĉojn. Senŝanĝa konservado de la malnova produktadmaniero estis, male, la unua ekzistkondiĉo de ĉiuj antaŭaj industriaj klasoj. La konstanta transformego de la produktado, la seninterrompa ŝancelado de ĉiuj sociaj kondiĉoj, la eterna malsekureco kaj moviĝo distingas la burĝan epokon antaŭ ĉiuj aliaj⁶⁵. Ĉiuj firmaj rigidiĝintaj kondiĉoj kun sia sekvantaro de honore respektataj imagoj kaj konceptoj estas dissolvataj, ĉiuj nove formitaj arĥaikiĝas antaŭ ol povi rigidiĝi. Ĉio stata kaj stagna forvaporiĝas, ĉio sankta profaniĝas, kaj la homoj estas fine devigataj rigardi sian pozicion en la vivo, siajn reciprokajn rilatojn per sobraj okuloj.

La bezono de ĉiam pli etendita vendo de siaj produktoj pelas la burĝaron ĉirkaŭ la tutan terglobon. Ĉie ĝi devas ennestiĝi, ĉie alkonstrui, ĉie starigi interrilatojn.

La burĝaro per sia ekspluatado de la mondmerkato formis la produktadon kaj konsumadon de ĉiuj landoj kosmopolite. Je la granda bedaŭro de la reakciuloj ĝi fortiris la nacian grundon el sub la piedoj de la industrio. La praaj naciaj industrioj estis neniigitaj kaj daŭre estas ĉiutage neniigataj. Ili estas forŝovataj de novaj industrioj, kies enkonduko fariĝas nepre por la vivo de ĉiuj civilizitaj nacioj, de industrioj, kiuj transformas jam ne enlandajn krudmaterialojn, sed krudmaterialojn el la plej foraj zonoj de la mondo kaj kies fabrikoj konsumiĝas ne nur en la lando mem, sed samtempe en ĉiuj mondpartoj.

Okcidenteŭropo, de kavaliroj kaj de la italaj komercaj urboj en la 11-a ĝis 13-a jarcentoj sub la religia flago de liberigo de la kristanaj sanktejoj Jerusalemo kaj de aliaj „sanktejoj” en la potenco de la islamanoj. La ideologiistoj kaj inspirantoj de la krucmilitoj estis la katolika eklezio kaj la papo, motivataj de sia aspiro konkeri mondan dominadon, kaj la ĉefa forto estis la kavaliroj. En la ekspedicioj partoprenis ankaŭ kamparanoj dezirantaj emancipiĝi el la feŭda jugo. La konkeroj de la krucmilitistoj ĉe la orienta Mediteraneo estis efemeraj, kaj iliaj posedaĵoj baldaŭ refalis en la manojn de la islamanoj. -ecs

65 En la eldonoj de 1848, 1872 kaj 1883: ĉiuj antaŭaj. -mew

1. Burĝoj kaj proletoj

En la lokon de la malnovaj bezonoj, kontentigitaj de enlandaj produktoj, venas novaj, kiuj bezonas por sia kontentigo la produktojn de la plej malproksimaj landoj kaj klimatoj. En la lokon de la malnovaj lokaj kaj naciaj memsufiĉeco kaj izoliteco paŝas ĉiuflanka trafiko, ĉiuflanka interdependeco de la nacioj. Kaj kiel en la materia, tiel ankaŭ en la intelekta produktado. La intelektaj produktoj de la unuopaj nacioj fariĝas komuna havaĵo. La nacia unuflankeco kaj limiteco fariĝas pli kaj pli malebla kaj el la multaj naciaj kaj lokaj literaturoj formiĝas mondliteraturo.

Per la rapida plibonigo de ĉiuj produktadinstrumentoj, per la senfine plifaciligita komunikado, la burĝaro tiras ĉiujn, ankaŭ la plej barbarajn naciojn, en la civilizacion. La malaltaj prezoj de ĝiaj varoj estas la peza artilerio, per kiu ĝi dispafas ĉiajn ĉinajn muregojn, per kiu ĝi devigas kaptulaci la plej obstinan fremdulmalamon de la barbaroj. Ĝi devigas ĉiujn naciojn alproprigi al si la produktadmanieron de la burĝaro, se ili ne volas pereji; ĝi devigas ilin enkonduki la tiel nomatan civilizacion ĉe si mem, t.e. fariĝi burĝoj. Per unu vorto, ĝi kreas al si mondon laŭ sia propra imago.

La burĝaro submetis la kamparon al regado fare de la urbo. Ĝi kreis urbegojn, ĝi altgrade pliigis la nombron de la urba loĝantaro kompare kun la kampara kaj tiel elŝiris gravan parton de la loĝantaro el la izoliteco, en kiu la homoj en la kamparo vivis disde la multflanka socio. Kiel ĝi dependigis la kamparon de la urbo, tiel ĝi dependigis la barbarajn kaj duonbarbarajn landojn de la civilizitaj, la kampulajn popolojn de la burĝaj popoloj, la Orienton de la Okcidento.

La burĝaro pli kaj pli forigas la dissplitecon de la produktadrimedoj, de la posedaĵo kaj de la loĝantaro. Ĝi aglomeris la loĝantaron, centrigis la produktadrimedojn kaj koncentris la proprietaĵon en malmultajn manojn. La necesa sekvo de tio estis la politika centrigo. Sendependaj, preskaŭ nur aliancitaj provincoj kun diversaj interesoj, leĝoj, registaroj kaj doganaĵoj estis kunpremitaj en unu nacion, unu registaron, unu leĝon, unu nacian klasintereson, unu doganlimon.

1. Burĝoj kaj proletoj

La burĝaro en sia apenaŭ centjara klasregado kreis pli amasajn kaj pli kolosajn produktadfortojn ol ĉiuj antaŭaj generacioj kune. Subjugado de la naturfortoj, maŝinaro, aplikado de la ĥemio al industrio kaj kampkulturo, vaporŝipoj, fervojoj, elektraj telegrafoj, pretigado de tutaj mondpartoj al kampkulturo, navigebligo de riveroj, tutaj loĝantaroj kvazaŭ elsorĉitaj el la tero – kia antaŭa jarcento supozis, ke tiaj produktadfortoj dormetis en la sino de la socia laboro.

Ni do vidis: La produktad- kaj cirkulad-rimedoj, sur kies bazo la burĝaro elformiĝis, estis produktitaj en la feŭda socio. Sur certa ŝtupo de la evoluo de tiuj produktad- kaj cirkulad-rimedoj la kondiĉoj, en kiuj la feŭda socio produktadis kaj interŝanĝadis, la feŭda organizado de kampkulturo kaj manufakturo, per unu vorto la feŭdaj produktadkondiĉoj ne plu taŭgis por la jam disvolvigitaj produktadfortoj. Ili malhelpis la produktadon anstataŭ subteni ĝin. Ili transformiĝis en same multajn katenojn. Ili estis rompendaj, ili estis rompigitaj.

En ĝian lokon venis la libera konkurenco kun la socia kaj politika konstitucio taŭga por ĝi, kun la ekonomia kaj politika regado de la burĝa klaso.

Antaŭ niaj okuloj okazas simila moviĝo. La burĝaj produktad- kaj cirkulad-kondiĉoj, la burĝaj proprietkondiĉoj, la moderna burĝa socio, kiu elsorĉis tiom potencajn produktad- kaj cirkulad-rimedojn, similas al la majstro sorĉisto, kiu jam ne kapablas regi la subterajn potencojn, kiujn li elsorĉis. De jardekoj la historio de la industrio kaj de la komerco estas nur la historio de ribelado de la modernaj produktadfortoj kontraŭ la modernaj produktadkondiĉoj, kontraŭ la proprietkondiĉoj, kiuj estas la vivkondiĉoj de la burĝaro kaj de ties regado. Sufiĉas nomi la komercajn krizojn, kiuj en sia perioda reveno ĉiam pli minace dubindigas la ekziston de la tuta burĝa socio. En la komercaj krizoj granda parto ne nur de la estigitaj produktoj, sed de la jam kreitaj produktadfortoj estas regule neniigata. En la krizoj eksplodas socia epidemio, kiun ĉiuj antaŭaj epokoj taksintus absurda – la epidemio de superproduktado. La socio subite retroviĝas en stato de mo-

1. Burĝoj kaj proletoj

menta barbareco; malsatmizero, ĝenerala neniiga milito ŝajnas al ĝi esti fortranĉinta ĉiujn vivrimedojn; la industrio, la komerco ŝajnas esti neniigitaj, kaj kial? Ĉar ĝi posedas tro da civilizacio, tro da vivrimedoj, tro da industrio, tro da komerco. La produktadfortoj, pri kiuj ĝi disponas, jam ne servas por progresigi la burĝajn proprietkondiĉojn; male, ili fariĝis tro potencaj por tiuj kondiĉoj, ili estas malhelpataj de ili, kaj ekde kiam ili superas tiun malhelpon, ili malordigas la tutan burĝan socion, endanĝerigas la ekziston de la burĝa proprieto. La burĝaj rilatoj fariĝis tro malvastaj por enteni la riĉaĵon de ili produktitan. – Per kio la burĝaro superas la krizojn? Unuflanke per la deviga neniigo de amaso da produktadfortoj; aliflanke per la konkero de novaj merkatoj kaj per la pli ĝisfunda ekspluatado de malnovaj merkatoj. Per kio do? Per tio, ke ĝi preparas pli ĉiuf flankajn kaj pli potencajn krizojn kaj malpliigas la rimedojn antaŭmalhelpi la krizojn.

La armiloj, per kiuj la burĝaro teren batis la feŭdismon, nun direktas sin kontraŭ la burĝaro mem.

Sed la burĝaro ne nur forĝis la armilojn kiuj alportos al ĝi la morton; ĝi ankaŭ generis la virojn, kiuj portos tiujn armilojn – la modernajn laboristojn, la *proletojn*.

En la sama mezuro, en kiu evoluas la burĝaro, t.e. la kapitalo, en la sama mezuro evoluas la proletaro, la klaso de la modernaj laboristoj, kiuj vivas nur tiom longe, kiom ili trovas laboron, kaj kiuj trovas laboron nur tiom longe, kiom ilia laboro pliigas la kapitalon. Tiuj laboristoj, kiuj devas vendi sin popece, estas varo kiel ĉiu alia komercaĵo kaj pro tio same elmetitaj al ĉiaj sortoŝanĝoj de la konkurenco, al ĉiaj fluktuadoj de la merkato.

Per la etendo de la maŝinaro kaj per la labordivido la laboro de la proletoj perdis ĉian memstarecon kaj per tio ĉian logon por la laboristo. Li fariĝas nura akcesoraĵo de la maŝino, de kiu oni postulas nur la plej simplan, plej monotonan, plej facile lerneblan manmovon. La kostoj, kiujn la laboristo kaŭzas, limiĝas do preskaŭ nur al la vivrimedoj, kiujn li bezonas por sia vivtenado kaj por plugenerado de sia raso. Sed la prezo de varo, do ankaŭ

1. Burĝoj kaj proletoj

de la laboro⁶⁶, egalas al ĝiaj produktadkostoj. En la sama mezuro, en kiu la abomeneco de la laboro kreskas, do malkreskas la salajro. Eĉ pli, en la sama mezuro, en kiu maŝinaro kaj labordivido pliiĝas, en la sama mezuro pliiĝas ankaŭ la amaso de laboro, ĉu per pliigo de la laborhoroj, ĉu per pliigo de la laboro postulata en donita tempo, per pli rapida funkciado de la maŝinoj, ktp.

La moderna industrio transformis la etan laborejon de la patriarĥa majstro en la grandan fabrikon de la industria kapitalisto. Laboristaj amasoj, kunpremitaj en la fabriko, estas organizataj soldate. Kiel simplajn industrisoldatojn oni metas ilin sub la kontroladon de kompleta hierarĥio de suboficiroj kaj oficiroj. Ili estas ne nur servistoj de la burĝaro, de la burĝa ŝtato, ili estas ĉiutage kaj ĉiuhore servutigataj de la maŝino, de la kontrolisto kaj ĉefe de la unuopaj fabrikantaj burĝoj mem. Tiu despoteco estas des pli etanima, malica, amara, ju pli malkaŝe ĝi proklamas la profiton⁶⁷ kiel sian⁶⁸ celon.

Ju malpli la manlaboro postulas lertecon kaj fortesprimon, do ju pli la moderna industrio evoluas, des pli la laboro de viroj estas anstataŭata de laboro de virinoj⁶⁹. Seksaj kaj aĝaj diferencoj jam ne havas socian validon por la laborista klaso. Ekzistas jam nur laborinstrumentoj, kiuj kaŭzas diversajn kostojn laŭ aĝo kaj sekso.

Kiam la ekspluatado de la laboristo fare de la fabrikisto estas tiom finita, ke li ricevas sian laborsalajron per kontanta pago, tiam la aliaj partoj de la burĝaro atakas lin, la domposedanto, la komercisto, la lombardisto, ktp.

66 En siaj postaj laboraĵoj Markso kaj Engelso ne plu uzis la terminojn „valoro de la laboro” kaj „prezo de la laboro”. Anstataŭe ili uzis konceptojn pli precizajn, proponitajn de Markso: „valoro de la laborforto” kaj „prezo de la laborforto” (vd la enkondukon de Engelso al la marka verko „Dunglaboro kaj kapitalo, en Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo (*librofina librolisto n-ro 11*). (laŭ) -ecs

67 En la germana originalo: *Erwerb* (laŭvorte „akiradon, akiraĵon”) tradukita jen kiel „profiton” (*Baker, Pfeffer*), jen kiel „gajnon” (*Blanke*). -vl

68 En la eldonoj de 1848, 1872, 1883: sian lastan celon. -mew

69 En la eldonoj de 1848: de virinoj kaj infanoj. -mew

1. Burĝoj kaj proletoj

La ĝisnunaj malaltaj meztavoloj, la etindustriistoj, komercistoj kaj rentuloj, la metiistoj kaj kampuloj, ĉiuj ĉi klasoj falas suben en la proletaron, parte per tio, ke ilia malgranda kapitalo ne sufiĉas por funkciigi grandan industrion kaj subiĝas al la konkurenco kun la pli grandaj kapitalistoj, parte per tio, ke ilia lerteco estas senvalorigata de novaj produktadmanieroj. Tiel la proletaro rekrutiĝas el ĉiuj klasoj de la loĝantaro.

La proletaro trairas diversajn evoluŝtupojn. Ĝia batalo kontraŭ la burĝaro komenciĝas kun ĝia ekzisto.

En la komenco batalas la unuopaj laboristoj, poste la laboristoj de fabriko, poste la laboristoj de laborbranĉo en iu loko kontraŭ la unuopa burĝo, kiu ekspluatas ilin rekte. Ili direktas siajn atakojn ne nur kontraŭ la burĝaj produktadkondiĉoj, ili direktas ilin kontraŭ la produktadinstrumentoj mem; ili neniiĝas la fremdajn konkurencantajn varojn, ili disbatas la maŝinojn, ili fajrigas la fabrikojn, ili provas reakiri la pereintan pozicion de la mezepoka laboristo.

Sur tiu ŝtupo la laboristoj konsistigas amason dissemitan tra la tuta lando kaj displititan de la konkurenco. Amasa kunteniĝo de la laboristoj estas ankoraŭ ne la sekvo de ilia propra unuiĝo, sed la sekvo de la unuiĝo de la burĝaro, kiuj por atingi siajn proprajn politikajn celojn devas kaj provizore ankoraŭ povas movi la tutan proletaron.

Sur tiu ŝtupo la proletoj do ankoraŭ ne kontraŭbatalas siajn malamikojn, sed la malamikojn de siaj malamikoj, la restojn de la absoluta monarĥio, la grundproprietulojn, la neindustriajn burĝojn, la etburĝojn. La tuta historia movado estas tiel koncentrita en la manoj de la burĝaro; ĉiu venko tiel elbatalita estas venko de la burĝaro.

Sed kun la evoluo de la industrio la proletaro ne nur pliiĝas; ĝi estas kunpremata en pli grandaj amasoj, ĝia forto kreskas, kaj ĝi sentas tion ĉiam pli. La interesoj, la vivkondiĉoj ene de la proletaro ĉiam pli ekvilibriĝas, per tio ke la maŝinaro pli kaj pli forviŝas la diferencojn de la laboro kaj subigas

1. Burĝoj kaj proletoj

la salajron preskaŭ ĉie al same malalta nivelo. La kreskanta konkurenco de la burĝoj inter si kaj la el ĝi estiĝantaj komercaj krizoj ĉiam pli ŝancelas la salajron de la laboristoj; la ĉiam pli rapide evoluanta, senĉesa plibonigo de la maŝinaro ĉiam pli malcertigas ilian tutan dumvivan pozicion; la kolizioj inter la unuopa laboristo kaj la unuopa burĝo alprenas ĉiam pli la karakteron de kolizio de du klasoj. La laboristoj komencas starigi koaliciojn kontraŭ la burĝoj; ili kuniĝas por defendi sian salajron. Ili kreas eĉ konstantajn asociojn, por provizi sin por la okazaj ribeloj. Kelkloke la batalo eksplodas ribele.

De tempo al tempo la laboristoj venkas, sed nur provizore. La vera rezulto de iliaj bataloj estas ne la rekta sukceso, sed la ĉiam pli vastiĝanta unuiĝo de la laboristoj. Ĝi estas helpata de la kreskantaj komunikiloj, kiujn la granda industrio produktas kaj kiuj interligas la laboristojn de la diversaj lokoj inter si. Sed necesas nur la ligiĝo por centralizi la multajn salajro-batalojn de ĉie sama karaktero al nacia, al klasbatalo. Sed ĉiu klasbatalo estas politika batalo. Kaj la unuiĝon, por kiu la burĝoj de la mezepoko per siaj primitivaj vojoj bezonis jarcentojn, la modernaj proletoj per la fervojoj sukcesas en malmultaj jaroj.

Tiu organiziĝo de la proletoj al klaso, kaj per tio al politika partio, estas ĉiumomente rompata de la konkurenco inter la laboristoj mem. Sed ĝi estiĝas ĉiam ree, pli forta, pli firma, pli potenca. Ĝi trudas la agnoskon de unuopaj postuloj de la laboristoj en leĝa formo, per tio ke ĝi uzas la internajn fendiĝojn de la burĝaro. Ekzemplo pri tio estas la leĝo pri la dekhora labortago⁷⁰ en Anglujo.

La kolizioj de la malnova socio entute diversmaniere progresigas la disvolviĝon de la proletaro. La burĝaro troviĝas en konstanta batalo: komence kontraŭ la aristokrataro; poste kontraŭ tiuj partoj de la burĝaro mem, kies interesoj fariĝas kontraŭaj al la progreso de la industrio; ĉiam kontraŭ la burĝaro de ĉiuj eksteraj landoj. En ĉiuj ĉi bataloj ĝi vidas sin devigata

70 Leĝo pri limigo de la labortago al dek horoj en Anglujo ekde la jaro 1847. -vl

1. Burĝoj kaj proletoj

alvoki la proletaron, uzi ties helpon kaj tiel treni ĝin en la politikan movadon. Do, ĝi mem provizas la proletaron per la elementoj de ties propra politika kaj ĝenerala kleriĝo, tio signifas per armiloj kontraŭ si mem.

Krome, kiel ni vidis, per la progreso de la industrio tutaj partoj de la reganta klaso estas deĵetataj en la proletaron aŭ almenaŭ iliaj vivkondiĉoj estas minacataj. Ankaŭ ili provizas la proletaron per multaj elementoj de klerigo kaj de progreso.

Fine en epoko, dum kiu la klasbatalo proksimiĝas al decido, la dissolviga procezo ene de la reganta klaso, ene de la tuta malnova socio, alprenas tiom fortan, akran karakteron, ke malgranda parto de la reganta klaso forlasas ĝin kaj aliĝas al la revolucia klaso, al la klaso, kiu portas la estontecon en siaj manoj. Do, same kiel antaŭe parto de la nobelaro transiris al la burĝaro, tiel nun parto de la burĝaro transiras al la proletaro, kaj nome parto de tiuj burĝaj ideologiistoj, kiuj per studado levis sin al la nivelo de teoria kompreno de la tuta historia movado.

El ĉiuj klasoj, kiuj hodiaŭ kontraŭstaras al la burĝaro, nur la proletaro estas vere revolucia klaso. La ceteraj klasoj degeneras kaj pereas pro la granda industrio, la proletaro estas ĝia plej esenca produkto.

La mezaj klasoj, la etindustriisto, la etkomercisto, la metiisto, la kampkulturisto, ili ĉiuj batalas kontraŭ la burĝaro por protekti sian ekziston kiel mezaj klasoj kontraŭ pereco. Ili do ne estas revoluciaj, sed konservativaj. Eĉ pli, ili estas reaciaj, ili provas retroturni la radon de la historio. Se ili estas revoluciaj, ili estas tiaj pro sia estonta transiro en la proletaron, kaj tiam ili defendas ne siajn nunajn, sed siajn estontajn interesojn, ili forlasas sian propran starpunkton por alpreni tiun de la proletaro.

La ĉifonproletaro⁷¹, tiu pasiva putraĵo de la plej malsupraj tavoloj de la

71 Tiu termino (germane *Lumpenproletariat*) estis unue uzata en „Germana ideologio” de Markso kaj Engelso. Parolante pri la plebanoj en la antikva Romo: „La plebanoj, kiuj troviĝis inter la liberuloj kaj sklavoj, neniam sukcesis esti pli ol ĉifonproletaro.” (*Deutsche Ideologie* [Germana ideologio], MEW, vol. 3, p. 39).

1. Burĝoj kaj proletoj

malnova socio, per proletara revolucio estas ie kaj tie enĵetata en la movadon, sed laŭ sia tuta vivsituacio ĝi estos pli ema subaĉetiĝi por reakciaj intrigoj.

La vivkondiĉoj de la malnova socio estas jam neniigitaj en la vivkondiĉoj de la proletaro. La proleto estas senpropieta; lia rilato al edzino kaj infanoj havas jam nenion komunan kun la burĝa familia rilato; la moderna industria laboro, la moderna subjugigo sub la kapitalon, la sama en Anglujo kiel en Francujo, en Usono kiel en Germanujo, forprenis de ĝi ĉian nacian karakteron. La leĝoj, la moralo, la religio estas por li same multaj burĝaj antaŭjuĝoj, malantaŭ kiuj kaŝiĝas same multaj burĝaj interesoj.

Ĉiuj antaŭaj klasoj, kiuj konkeris la regadon, provis certigi sian jam akiritan vivpozicion per submetado de la tuta socio al la kondiĉoj de sia alproprigado. La proletoj povas konkeri por si la sociajn produktadfortojn nur per tio, ke ili forigas sian propran ĝisnunan alproprigmanieron kaj per tio la tutan ĝisnunan alproprigmanieron. La proletoj havas neniom da propraĵo, kiun ili devus sekurigi, ili devas detrui ĉiujn ĝisnunajn privatajn sekurecojn kaj privatajn asekurojn.

Ĉiuj ĝisnunaj movadoj estis movadoj de malplimultoj aŭ en la intereso de malplimultoj. La proletara movado estas la memstara movado de la giganta plimulto en la intereso de la giganta plimulto. La proletaro, la plej malsupra tavolo de la nuna socio, ne povas leviĝi nek ekstari, sen ke la tuta superstrukturo de la tavoloj, kiuj konsistigas la oficialan socion, estu eksplodigita.

Laŭ la formo, kvankam ne laŭ la enhavo, la batalo de la proletaro kontraŭ la burĝaro estas unue nacia. La proletaro de ĉiu lando kompreneble devas unue fini la aferon kun sia propra burĝaro.

Skizante la plej ĝeneralajn fazojn de la evoluo de la proletaro, ni sekvis la pli aŭ malpli kaŝitan internan militon ene de la ekzistanta socio ĝis la

1. Burĝoj kaj proletoj

punkto, kie ĝi eksplodos en malkaŝan revolucion kaj per la perforta faligo de la burĝaro la proletaro fondos sian regadon.

Ĉia ĝisnuna socio baziĝis, kiel ni vidis, sur la antagonismo⁷² de subpremantaj kaj subpremataj klasoj. Sed por povi subpremi klason, necesas ke estu al ĝi certigata kondiĉoj, ene de kiuj ĝi povas almenaŭ daŭre vivi dum sia servuteca ekzistado. La servutulo en sia servuteco levis sin al membro de la komunumo kiel la etburĝo al burĝo sub la jugo de la feŭda absolutismo. La moderna laboristo, male, anstataŭ leviĝi kun la progreso de la industrio, ĉiam pli malleviĝas sub la kondiĉojn de sia propra klaso. La laboristo fariĝas mizerulo, kaj la mizero⁷³ evoluas ankoraŭ pli rapide ol loĝantaro kaj riĉaĵo.

Per tio klare montriĝas, ke la burĝaro ne kapablas daŭre resti la reganta klaso de la socio kaj trudi al la socio la vivkondiĉojn de sia klaso kiel regulantan leĝon. Ĝi estas nekapabla regi, ĉar ĝi ne kapablas certigi al sia sklavo la ekzistadon eĉ ene de lia sklaveco, ĉar ĝi estas devigata faligi lin en situacion, en kiu ĝi devas nutri lin anstataŭ esti nutrata de li. La socio ne povas plu vivi sub ĝi, t.e. ĝia vivo ne estas plu akordigebla kun la socio.

La esenca kondiĉo por la ekzistado kaj por la regado de la burĝa klaso estas la amasigo de la riĉaĵo en la manoj de privatuloj, la estigo kaj pliigo de la kapitalo; la kondiĉo de la kapitalo estas la salajra laboro. La salajra laboro baziĝas ekskluzive sur la konkurenco de la laboristoj inter ili. La progreso de la industrio, kies senvola kaj senrezista portanto estas la burĝaro, substituas al la izoliteco de la laboristoj pro la konkurenco ilian revolucion unuiĝon per la asocio. La evoluo de la granda industrio do fortiras sub la piedoj de la burĝaro la bazon mem, sur kiu ĝi produktas kaj alproprigas al si la produktojn. Ĝi produktas antaŭ ĉio sian propran entombigiston. Ĝia pereoj kaj la venko de la proletaro estas same neeviteblaj.

72 En la senco de principa kontraŭeco. -vl

73 En aliaj tradukoj: paŭperulo, paŭperismo, respektive. Kp p. 27, pn 28. -vl

2. Proletoj kaj komunistoj

2. Proletoj kaj komunistoj

En kia rilato staras la komunistoj al la proletoj entute?

La komunistoj ne estas aparta partio fronte al la ceteraj laboristaj partioj.

Ili ne havas interesojn disajn de la interesoj de la tuta proletaro.

Ili ne starigas apartajn principojn, laŭ kiuj ili volas modli la proletaran movadon.

La komunistoj distingiĝas de la ceteraj proletaj partioj nur per tio ke iliak unuflanke en la diversaj naciaj bataloj de la proletoj emfazas kaj respektigas la komunajn interesojn de la tuta proletaro sendependajn de la nacieco, aliflanke per tio, ke ili en la diversaj evoluŝtupoj, kiujn la batalo inter proletaro kaj burĝaro trairas, ĉiam reprezentas la intereson de la tuta movado.

La komunistoj estas do praktike la plej decida, ĉiam antaŭen pelanta parto de la laboristaj partioj de ĉiuj landoj; ili havas teorie kiel avantaĝon antaŭ la cetera amaso de la proletaro la komprenon de la kondiĉoj, de la irado kaj de la ĝeneralaj rezultoj de la proletara movado.

La plej proksima celo de la komunistoj estas la sama kiel tiu de ĉiuj ceteraj proletaj partioj: formado de la proletaro al klaso, faligo de la burĝa regado, konkero de la politika potenco fare de la proletaro. La teoriaj eldiroj de la komunistoj tute ne baziĝas sur ideoj aŭ principoj inventitaj aŭ malkovritaj de iu aŭ alia mondplibonigisto.

Ili estas nur ĝeneralaj esprimoj de faktaj kondiĉoj de ekzistanta klas-batalo, de historia movado okazanta antaŭ niaj okuloj. La forigo de ĝisnunaj proprietrilatoj ne estas io aparte propra al la komunistoj.

Ĉiuj proprietrilatoj estis submetitaj al konstanta historia ŝanĝo, al konstanta historia aliigo.

La Franca Revolucio ekz-e forigis la feŭdan proprieton favore al la burĝa proprieto.

2. Proletoj kaj komunistoj

Sed la moderna burĝa privata proprieto estas la lasta kaj plej perfekta esprimo de la produktado kaj alproprigo de la produktoj, kiu baziĝas sur klasaj antagonismoj, sur la ekspluatado de iuj – la plimulto – fare de la aliaj – la malplimulto.

En tiu senco la komunistoj povas resumi sian teorion en tiu ĉi sola esprimo: forigo de la privata proprieto.

Oni riproĉis al ni komunistoj, ke ni volas forigi la persone akiritan, mem ellaboritan proprieton; la proprieton kiu estas laŭdire la bazo de ĉia persona libereco, agado kaj sendependeco.

Mem ellaborita, akirita, mem gajnita proprieto! Ĉu vi parolas pri la etburĝa, etkampula proprieto, kiu ekzistis antaŭ la burĝa proprieto? Ni ne bezonas forigi ĝin, la evoluo de la industrio forigis ĝin kaj forigas ĝin ĉiutage.

Aŭ ĉu vi parolas pri la moderna burĝa privata proprieto?

Sed ĉu la dunglaboro, la laboro de la proleto, kreas al li proprieton? Tute ne. Ĝi kreas la kapitalon, t.e. la proprieton, kiu ekspluatas la dunglaboron, kiu povas pliiĝi nur sub la kondiĉo ke ĝi kreas novan dunglaboron por denove ekspluati ĝin. La proprieto en sia hodiaŭa formo moviĝas en la antagonismo de kapitalo kaj dunglaboro. Ni rigardu la du flankojn de tiu antagonismo.

Esti kapitalisto, signifas alpreni ne nur tute personan, sed socian pozicion en la produktado. La kapitalo estas komuna produkto kaj povas esti funkciigata nur per komuna agado de multaj membroj, lastanalize eĉ nur de la komuna agado de ĉiuj membroj de la socio.

La kapitalo estas do ne persona, ĝi estas socia potenco.

Do, se la kapitalo estas transformata en komunan proprieton apartenantan al ĉiuj membroj de la socio, tiam ne persona proprieto transformiĝas en socian. Ŝanĝiĝas nur la socia karaktero de la proprieto. Ĝi perdas sian klasan karakteron.

2. Proletoj kaj komunistoj

Ni venu al la dunglaboro:

La mezuma prezo de la dunglaboro estas la minimumo de la salajro, t.e. la sumo de la vivrimedoj necesaj por vivteni la laboriston kiel laboriston. Do, tio kion la dunglaboristo alproprigas al si per sia agado, sufiĉas nur por reprodukti lian nuran vivon. Ni tute ne volas forigi tiun personan alproprigon de la laborproduktoj por reproduktado de la nura vivo, alproprigon, kiu restigas nenian puran enspezon kiu povus doni potencon super fremda laboro. Ni volas nur forigi la mizeran karakteron de tiu alproprigo, en kiu la laboristo vivas nur por pliigi la kapitalon, vivas nur tiom, kiom la intereso de la reganta klaso bezonas tion.

En la burĝa socio la viva laboro estas nur rimedo por pliigi la akumulitan laboron. En la komunisma socio la akumulita laboro estas nur rimedo por ampleksigi la vivprocezon de la laboristoj, por riĉigi kaj antaŭenigi ĝin.

En la burĝa socio regas do la pasinteco super la estanteco, en la komunism la estanteco super la estinteco. En la burĝa socio la kapitalo estas sendependa kaj persona, dum la aganta individuo estas dependa kaj nepersona.

Kaj la forigon de tiu rilato la burĝaro nomas forigo de la personeco kaj libereco! Kaj prave. Tamen temas pri la forigo de la personeco, sendependeco kaj libereco burĝaj.

Sub libereco oni komprenas ene de la nunaj burĝaj produktadkondiĉoj la liberan komercon, la liberajn aĉeton kaj vendon.

Sed se falas la negoco, tiam falas ankaŭ la libera negoco. La retoriko pri libera negoco, kiel ĉiuj ceteraj fanfaronajoj de nia burĝaro pri libereco havas sencon, se entute, nur rilate al la limigita negoco, rilate al la subigita negocisto de la mezepoko, sed ne rilate al la komunisma forigo de la negoco, de la burĝaj produktadkondiĉoj kaj de la burĝaro mem.

Vi teruriĝas pri tio, ke ni volas forigi la privatan proprieton. Sed en via ekzistanta socio la privata proprieto de naŭ dekonjoj de ĝiaj membroj estas forigita, ĝi ekzistas ĝuste per tio, ke ĝi por naŭ dekonjoj ne ekzistas. Vi do

2. Proletoj kaj komunistoj

riproĉas al ni, ke ni volas forigi proprieton, kiu premias la senproprietecan de la giganta plimulto de la socio kiel nepran kondiĉon.

Per unu vorto, vi riproĉas al ni, ke ni volas forigi la proprieton vian. Ĝuste tiel, tion ni volas.

Ekde la momento, en kiu la laboro jam ne transformeblas en kapitalon, monon, grundrenton, mallonge, en monopoligeblan socian potencon, t.e. ekde la momento, kiam la persona proprieto jam ne povas transformiĝi en burĝan, ekde tiu momento, deklaras vi, la persono estas forigita.

Vi do konfesas, ke vi komprenas sub „persono” neniun alian ol la burĝon, la burĝan proprietulon. Kaj tiu persono jes ja estas forigenda.

La komunismo forprenas de neniuj la povon alproprietigi al si sociajn produktojn, ĝi prenas nur la povon, per tiu alproprigo subjugigi fremdan laboron.

Oni kontraŭargumentis, ke per la forigo de la privata proprieto ĉesos ĉia agado kaj disvastiĝos ĝenerala mallaboremo.

Laŭ tio, la burĝa socio devintus jam delonge pereji pro inerto; ĉar tiuj, kiuj en ĝi laboras, ne akiras, kaj tiuj, kiuj akiras, ne laboras. La tuta riproĉo kondukas al la taŭtologio, ke ne ekzistos plu dunglaboro, kiam ne ekzistos plu kapitalo.

Ĉiuj argumentoj direktataj kontraŭ la komunisma alproprig- kaj produktad-maniero de la materiaj produktoj estis same etenditaj al la alproprigo kaj produktado de la intelektaj produktoj. Kiel por la burĝo la ĉeso de la klasa proprieto estas la ĉeso de la produktado mem, tiel por li la ĉeso de la klasa klergado identas kun la ĉeso de klerigado entute.

La klerigado, kies perdon li bedaŭras, estas por la giganta plimulto nur trejnado por agi kiel maŝino.

Sed ne disputu kun ni mezurante la forigon de la burĝa proprieto laŭ viaj burĝaj ideoj pri libereco, klereco, juro ktp. Viaj ideoj mem estas produktoj de la burĝaj produktad- kaj propriet-rilatoj, kiel via juro estas nur la leĝigita

2. Proletoj kaj komunistoj

volo de via klaso, volo, kies enhavo estas donita en la materiaj vivkondiĉoj de via klaso.

La egoisman koncepton, laŭ kiu vi transformas viajn produktad- kaj propriet-rilatojn el historiaj rilatoj, kiuj dum la evoluo de la produktado fariĝas provizoraj, en eternajn naturajn kaj raciajn leĝojn, tiun koncepton vi dividas kun ĉiuj regintaj klasoj. Kion vi ja komprenas pri la antikva proprieto, kion vi ja komprenas pri la feŭda proprieto, tion vi jam ne rajtas kompreni pri la burĝa proprieto.

Forigo de la familio! Eĉ la plej akraj radikaluloj incitiĝas pri tiu fia intenco de la komunistoj.

Sur kio baziĝas la nuna, la burĝa familio? Sur la kapitalo, sur la privata akiro. Komplete evoluinta ĝi ekzistas nur por la burĝaro; sed ĝi trovas sian kompletigon en la devigata senfamilieco de la proletoj kaj en la publika prostituado.

La familio de la burĝoj kompreneble malaperos kun la malapero de tiu ĝia kompletigo, kaj ambaŭ malaperos kun la malapero de la kapitalo.

Ĉu vi riproĉas al ni, ke ni volas forigi la ekspluatadon de la infanoj fare de iliaj gepatroj? Ni konfesas tiun krimon.

Sed, diras vi, vi nuligas la plej intimajn rilatojn, per tio ke vi metas en la lokon de la hejma edukado la publikan.

Kaj ĉu ne ankaŭ via edukado estas determinata de la socio? De la sociaj kondiĉoj, ene de kiuj vi edukas, per la pli rekta aŭ pli malrekta enmiksiĝo de la socio, per la lernejo ktp? La komunistoj ne inventas la influon de la socio al edukado; ili nur ŝanĝas ĝian karakteron, ili eltiras la edukadon el la influo de la reganta klaso.

La burĝaj diroj pri familio kaj edukado, pri la intima rilato de gepatroj kaj infanoj fariĝas des pli naŭzaj, ju pli pro la granda industrio ĉiuj familiaj ligoj de la proletoj disŝiriĝas kaj la infanoj transformiĝas en simplajn komercaĵojn kaj laborinstrumentojn.

2. Proletoj kaj komunistoj

Sed vi komunistoj volas enkonduki la komunan intimrilaton kun virinoj, ĥore kriegas al ni la tuta burĝaro.

La burĝo vidas en sia edzino nuran produktadinstrumenton. Li aŭdas, ke la produktadinstrumentoj estu ekspluatataj komune, kaj li kompreneble ne povas pensi alie, ke la sorto de komuneco trafos same la virinojn.

Li eĉ ne supozas, ke temas ĝuste pri tio, forigi la pozicion de la virinoj kiel nuraj produktadinstrumentoj.

Cetere nenio estas pli ridinda ol la alte morala hororo pro la laŭdire oficiala komuna intimrilato kun virinoj planita de la komunistoj. La komunistoj ne bezonas enkonduki la komunan intimrilaton kun virinoj, ĝi ekzistis preskaŭ ĉiam.

Niaj burĝoj, ne kontentaj per tio, ke ili disponas pri la virinoj kaj filinoj de siaj proletoj, por tute ne paroli pri la publika prostituado, ili trovas ĉefan plezuron en reciproka delogado de siaj edzinoj.

La burĝa geedzeco estas en la realo la komuna intimrilato kun la edzinoj. Oni povus, se entute, riproĉi al la komunistoj, ke ili volas enkonduki, anstataŭ la hipokrite kaŝita, oficialan, sinceran komunan intimrilaton kun virinoj. Cetere estas memkomprenebla, ke kun la nuligo de la nunaj produktadkondiĉoj malaperos tiu komuna intimrilato kun virinoj, kiuj rezultas el ĝi, t.e. la oficiala kaj neoficiala prostituado.

Oni krome riproĉis al la komunistoj, ke ili volas forigi la patrujon, la naciecon. La laboristoj ne havas patrujon. Ne eblas forpreni de ili, kion ili ne havas. Ĉar la proletaro devas unue konkeri la politikan regadon, leviĝi al nacia klaso, konsistigi sin mem kiel nacion, ĝi estas mem ankoraŭ nacia, kvankam tute ne en la burĝa senco.

La naciaj apartiĝoj kaj kontraŭecoj de la popoloj malaperas pli kaj pli jam kun la evoluo de la burĝaro, kun la liberkomerco, la mondmerkato, la samformeco de la industria produktado kaj de la vivkondiĉoj kongruaj kun ĝi.

2. Proletoj kaj komunistoj

La regado de la proletaro ankoraŭ pli malaperigos ilin. Unueca agado, almenaŭ de la civilizitaj landoj, estas unu el la unuaj kondiĉoj de ĝia liberigo.

Laŭgrade kiel estos forigita la ekspluatado de unu individuo fare de alia, same finiĝos la ekspluatado de unu nacio fare de alia. Kun la falo de la antagonismo de la klasoj ene de nacio malaperos ankaŭ la malamika sinteno de la nacioj inter si.

La akuzoj kontraŭ la komunismo, kiuj leviĝas el religiaj, filozofiaj kaj ĝenerale ideologiaj vidpunktoj, ne meritas detalan diskutadon.

Ĉu necesas profundaj ekkonoj por kompreni, ke kun la vivkondiĉoj de la homoj, kun iliaj sociaj rilatoj, kun sia socia estado ŝanĝiĝas ankaŭ iliaj konceptoj, opinioj kaj nocioj, per unu vorto ankaŭ ilia konscio?

Kion alian la historio de la ideoj pruvas ol ke la intelekta produktado transformiĝas kun la materia? La regantaj ideoj de epoko estis ĉiam nur la ideoj de la reganta klaso.

Oni parolas pri ideoj, kiuj revolucias la tutan socion; per tio oni nur eldiras la fakton, ke ene de la malnova socio formiĝis la elementoj de nova, ke kun la dissolviĝo de la malnovaj vivkondiĉoj iras sampaŝe la dissolviĝo de la malnovaj ideoj.

Kiam la antikva mondo estis pereanta, la antikvaj religioj estis venkataj de la kristana. Kiam la kristanaj ideoj en la 18-a jarcento subiĝis al la raciismaj ideoj, la feŭda socio agonie luktis kontraŭ la tiam revolucia burĝaro. La ideoj de pensa kaj religia libereco esprimis nur la regadon de la konkurenco en la kampo de la scioj.

„Nu”, oni diros, „religiaj, moralaj, filozofiaj, politikaj, juraj ktp ideoj ja modifiĝas en la historia evoluo. Sed la religio, la moralalo, la filozofio, la politiko kaj la juro mem ĉiam konserviĝis en tiu ŝanĝiĝo. Krome ekzistas eternaj veroj, kiel libereco, justeco ktp, kiuj estas komunaj al ĉiuj sociaj kondiĉoj. Sed la komunismo forigas la eternajn verojn, ĝi forigas la religion,

2. Proletoj kaj komunistoj

la moralon, anstataŭ modifi ilin; ĝi do kontraŭdiras al ĉiaj ĝisnunaj historiaj evoluoj.”

Al kio tiu akuzo reduktiĝas? La historio de la tuta ĝisnuna socio⁷⁴ moviĝis en klasaj antagonismoj, kiuj havis en diversaj epokoj diversajn formojn. Sed kian ajn formon ili alprenis, la ekspluatado de unu parto de la socio fare de la alia estas fakto komuna al ĉiuj antaŭaj jarcentoj. Ne mirige do, ke la socia konscio de ĉiuj jarcentoj, spite al ĉia plureco kaj diverseco, moviĝas en certaj komunaj formoj, en formoj de konscio, kiuj komplete dissolviĝas nur kun la kompleta malapero de tiu klasa antagonismo.

La komunisma revolucio estas la plej radikala rompo de la tradiciaj proprietrilatoj; ne mirige, ke en ĝia evoluo oni plej radikale rompas la tradiciajn ideojn.

Sed ni lasu la objetojn de la burĝaro kontraŭ la komunismo.

Ni vidis jam supre, ke la unua paŝo en la laborista revolucio estas la leviĝo de la proletaro al reganta klaso, la elbatalado de la demokratio.

La proletaro uzos sian politikan regadon por iom post iom elŝiri de la burĝaro ĉian kapitalon, centrigi ĉiujn produktadinstrumentojn en la manoj de la ŝtato, t.e. de la proletaro organizita kiel reganta klaso, kaj kiom eble plej rapide pliigi la amason da produktadfortoj.

Kompreneble tio povas unue okazi nur per despotaj intervenoj en la proprietrajton kaj en la burĝajn produktadkondiĉojn, do per disponoj, kiuj ŝajnas ekonomie nesufiĉaj kaj neteneblaj, sed kiuj dum la evoluo de la movado kreskas super sin mem kaj kiel rimedo por la transformego de la tuta produktadmaniero estas neeviteblaj.

Tiuj disponoj kompreneble estos diversaj laŭ la diverseco de la landoj.

Por la plej progresintaj landoj tamen la sekvaj povas aplikiĝi sufiĉe ĝenerale.

74 Vd tamen la noton de Engelso en la unua ĉapitro de tiu ĉi *Manifesto*, p. 64, pn 43. -vl

2. Proletoj kaj komunistoj

1. Senproprietigo de la grundposedo kaj uzado de la grundrento por ŝtataj elspezoj.
2. Forte laŭgrada imposto⁷⁵.
3. Forigo de la heredrajto.
4. Konfiskado de la proprieto de ĉiuj elmigrintoj⁷⁶ kaj ribeluloj.
5. Centralizo de la kredito en la manoj de la ŝtato per ŝtata banko kun ŝtata kapitalo kaj ekskluziva monopolo.
6. Centralizo de la transporto en la manoj de la ŝtato.
7. Pliigo de la ŝtataj fabrikoj, produktadinstrumentoj, kultivado kaj plibonigo de ĉiuj grundoj laŭ komuna plano.
8. Sama labordevigo por ĉiuj, starigo de industriaj armeoj, speciale por la kampkulturo.
9. Kunligado de la laboroj de kampkulturo kaj industrio, strebado al iom-post-ioma forigo de la diferenco de urbo kaj kamparo.
10. Publika kaj senpaga edukado de ĉiuj infanoj. Forigo de fabriklaboro por infanoj en ĝia hodiaŭa formo. Kunligado de la edukado kun la materia produktado ktp.

Se dum la evoluo la klasaj diferencoj estos malaperintaj kaj kiam ĉia produktado troviĝas en la manoj de la asociiĝintaj individuoj, tiam la publika potenco perdas la politikan karakteron. La proprasenca politika potenco estas la organizita forto de klaso por subpremado de alia. Kiam la proletaro batalanta kontraŭ la burĝaro nepre unuiĝas al klaso, per revolucio fariĝos klaso reganta kaj kiel reganta klaso perforte forigas la malnovajn produktadkondiĉojn, tiam ĝi forigos kun tiuj produktadkondiĉoj la ekzistadkondiĉojn de la klasa antagonismo, la klasojn entute, kaj per tio sian propran regadon kiel klaso.

75 Imposto kun proporcie kreskantaj kvotoj por pli grandaj enspezoj aŭ riĉaĵoj. -vl

76 Grandbienuloj kaj kapitalistoj fuĝintaj eksterlanden, ĝenerale sabotante la ekonomion. -ecs

2. Proletoj kaj komunistoj

En la lokon de la malnova burĝa socio kun ĝiaj klasoj kaj klasaj antagonismoj venos asocio, en kiu la libera evoluo de ĉiu estas la kondiĉo por la libera evoluo de ĉiuj.

3. Socialista kaj komunistika literaturo

3.1. La reakcia socialismo

3.1.1. La feŭda socialismo

La franca kaj angla aristokrataroj estis laŭ sia historia pozicio alvokitaj verki pamfletojn kontraŭ la moderna burĝa socio. En la franca junia revolucio de 1830 kaj en la angla reformmovado⁷⁷ ĝi estis refoje venkita de la malamata parvenuo. Jam ne eblis paroli pri serioza politika batalo. Restis al ĝi nur la batalo literaturo. Sed ankaŭ sur la kampo de literaturo la malnovaj diroj de la restaŭra epoko⁷⁸ fariĝis neakcepteblaj. Por vekti simpatiojn, la aristokrataro devis ŝajne neglekti siajn interesojn kaj formuli sian akuzon

77 Temas pri la movado por reformo de la elektosistemo, sub la premo de la amasoj aprobita de la ĝenerala ĉambro de la parlamento en la jaro 1831 kaj definitive aprobita de la nobela ĉambro de la parlamento en junio 1832. La reformo iris kontraŭ la politika monopolo de la kampkultura kaj financa aristokrataro kaj malfermis la pordojn de la parlamento al la industria burĝaro. La proletaro kaj la etburĝaro, kiuj estis la precipaj fortoj de la batalo por la reformo, vidis sin trompitaĵoj de la burĝaro liberala kaj ne atingis la rajton je voĉdonado. -ecs

78 Tio celas ne la anglan restaŭran epokon de 1660 ĝis 1689*, sed la francan de 1840 ĝis 1830. [Noto de Engelso al la angla eldono de 1888]

*) *La restaŭrado de 1660 ĝis 1689*: periodo de la dua reĝado de la Stuartoj en Anglujo, faligita de la angla burĝa revolucio en la 17-a jarcento. *La restaŭrado de 1814 ĝis 1830*: periodo de la dua reĝado de la burbonoj en Francujo. Tiu reakcia reĝimo de la burbonoj, kiu reprezentis la interesojn de la kortumo kaj de la klerikaro, estis faligita de la revolucio de julio 1830. -ecs

3. Socialista kaj komunista literaturo

kontraŭ la burĝaro nur el la interesoj de la ekspluatata laborista klaso. Ĝi tiel kontentigis sin kantante mokkantojn pri sia nova reganto kaj flustri al li en la orejon pli aŭ malpli terurajn profetaĵojn.

Tiamaniere estiĝis la feŭda socialismo, duone plorkanto, duone satiro, duone eĥo el la pasinteco, duone minaco de la estonteco, kelkfoje trafanta la burĝaron en la koron per amara, sprite neniiga juĝo, kiu ĉiam efikis komika pro kompleta nekapablo kompreni la iradon de la moderna historio.

La aristokratoj flirtigis kiel flagon en la mano la proletan almozsakon, por kolekti la popolon malantaŭ si. Sed ĉiam, kiam ĝi sekvis ilin, ĝi rimarkis sur ilia postaĵo la malnovajn feŭdajn blazonojn kaj diskuris kun laŭta kaj malrespekta ridaĉo.

Tiun spektaklon prezentis parto de la francaj „legitimistoj”⁷⁹ kaj la „Juna Anglujo”⁸⁰.

Kiam la feŭdistoj pruvas, ke ilia maniero de ekspluatado estis alia ol la burĝa ekspluatado, tiam ili nur forgesas, ke ili ekspluatis sub tute aliaj kaj nun arĥaigintaj kondiĉoj. Kiam ili pruvas, ke sub ilia regado la moderna proletaro ne ekzistis, ili nur forgesas, ke ĝuste la moderna burĝaro estis neevitebla ido de ilia sociordo.

Cetere ili tiom malmulte kaŝas la reakciecon de sia kritiko, ke ilia ĉefa

79 *Legitimistoj*: apogantoj de la dinastio „laŭleĝa” de la burbonoj, faligita en 1830, kiu reprezentis la interesojn de la hereda grandproprieto de la grundo. En la batalo kontraŭ la reĝanta dinastio de la orleanoj (1830-1848), kiu apogis sin sur la financa aristokrataro kaj sur la grandburĝaro, parto de la legitimistoj ofte uzis socialan demagogion, ŝajnigante defendi la laboristojn kontraŭ la burĝaj ekspluatistoj. -ecs

80 *Juna Anglujo*: grupo de anglaj konservativaj politikistoj kaj literaturistoj apartenantaj al la partio de la *tories*; ĝi fondiĝis komence de la 1840-aj jaroj. Esprimante la malkontenton de la grundposeda aristokrataro pro la kresko de la ekonomia kaj politika potenco de la burĝaro, la membroj de la *Juna Anglujo* uzis demagogiajn metodojn por submeti la laboristan klason al sia influo kaj uzi ĝin en sia propra batalo kontraŭ la burĝaro. -ecs

3.1. La reakcia socialismo

akuzo kontraŭ la burĝaro konsistas ĝuste en tio, ke sub ties reĝimo evoluas klaso, kiu eksplodigos la tutan malnovan sociordon.

Ili riproĉas al la burĝaro eĉ pli, ke ĝi produktas revolucian proletaron, ol ke ĝi entute produktas proletaron.

En la politika praktiko ili pro tio partoprenas en ĉiuj perfortaj disponoj kontraŭ la laborista klaso, kaj en la ordinara vivo, spite al ĉiuj siaj bombastaj diroj, ili finfine bonvolis kolekti la orajn pomojn defalintajn el la arbo de la industrio kaj interŝanĝi fidelon, amon, honoron per marĉandado kontraŭ ŝaflano, furaĝbetoj kaj terpoma brando.⁸¹

Kiel la pastro ĉiam iris man-en-mane kun la feŭdulo, tiel la pastra socialismo iras kun la feŭdisma.

Nenio pli facila ol doni al la kristana asketismo socialisman farbon. Ĉu ne ankaŭ la kristanismo agitis kontraŭ la privata proprieto, kontraŭ la geedzeco, kontraŭ la ŝtato? Ĉu ĝi ne predikis anstataŭigi ilin per almozdonado kaj malriĉeco, per fraŭleco kaj per voluptomortigo, per vivo en monaĥ(in)a ĉelo kaj eklezio?

La kristana socialismo estas nur la sankta akvo, per kiu la pastro benas la ĉagrenon de la aristokrato.

3.1.2 *Etburĝa socialismo*

La feŭda aristokrataro ne estas la sola klaso faligita de la burĝaro kaj

81 Tio koncernas precipe Germanujon, kie la kampara nobelaro kaj la junkraro* proprakoste mastrumigas al siaj administrantoj grandan parton el siaj bienoj kaj krome estas grandproduktistoj de betsukero kaj de terpoma brando. La pli riĉaj anglaj aristokratoj ankoraŭ ne degeneris tiom; sed ankaŭ ili scias, kiel oni povas kompensi la malaltiĝon de la rento per disponigo de sia nomo al pli aŭ malpli dubindaj fondantoj de akciosocietoj. [Noto de Engelso al la angla eldono de 1888.]

*) *Junkraro*: en la strikta senco de la vorto ĝi estis la klaso de grundproprietuloj en Orienta Prusujo; vastasence ĝi celas la klason de germanaj grundproprietuloj. -ecs

3. Socialista kaj komunista literaturo

kies vivkondiĉoj en la burĝa socio velkis kaj formortis. La mezepoka palisburĝaro kaj la etkampularo estis la antaŭuloj de la moderna burĝaro. En la malpli industrie kaj komerce evoluintaj landoj tiu klaso daŭre vegetas apud la leviĝanta burĝaro.

En la lando, kie la moderna civilizacio evoluis, estiĝis nova etburĝaro, kiu ŝvebas inter la proletaro kaj la burĝaro kaj kiel kompletiga parto de la burĝa socio ĉiam denove estiĝas, sed kies membroj estas konstante de la konkurenco deĵetataj en la proletaron kaj kiuj kun la evoluo de la granda industrio vidas eĉ proksimiĝi momenton en kiu ili tute malaperos kiel mestara parto de la moderna socio kaj en kiu ili en la komerco, en la manufakturo, en la kampkulturo anstataŭiĝos per laborkontrolistoj kaj servistoj.

En landoj kia Francujo, kie la kampula klaso estas multe pli ol la duono de la loĝantaro, estis nature, ke verkistoj, kiuj elpaŝis por la proletaro kontraŭ la burĝaro, kritikis la burĝan reĝimon laŭ etburĝaj kaj etkampulaj kriterioj kaj poziciigis favore al la laboristoj el la starpunkto de la etburĝaro. Tiel estiĝis la etburĝa socialismo. Sismondi⁸² estas la kapo de tiu literaturo ne nur por Francujo, sed ankaŭ por Anglujo.

Tiu skolo de socialismo plej sagace dissekis la kontraŭdirojn en la modernaj produktadkondiĉoj. Ĝi senvaligis la hipokritajn apologiojn de la ekonomikistoj. Ĝi pruvis nerefuteble la detruajn efikojn de la maŝinaro kaj

82 *Jean Charles Léonard Sismondi* [já ŝárl leonár sismondí] (1773-1842), svisa ekonomikisto kaj historiisto. Li kritikis la klasikan ekonomikon el la vidpunkto de la ekonomia romantikismo. „Li konsciiĝas, speciale pri la fundamenta kontraŭdiro inter la limigita evoluo de la produktadfortoj kaj la kresko de la riĉaĉo samtempe estigata en formo de varoj kaj kiu do, kiel varoj, estas transformenda en monon, kaj aliflanke, kiel bazo, la limigo de la nepraj vivrimedoj por la amaso de produktistoj” (Markso). „Li entute distingiĝas disde la klasikuloj en tio, ke li montras la kontraŭdirojn de la kapitalismo. Tio estas unu el la flankoj; aliflanke li ne sukcesas, kaj des malpli antaŭenigas (kion li eĉ ne intencas) la analizon de la klasikuloj, kaj en tio limigas sin al sentimentala kritiko de la kapitalismo el la vidpunkto de etburĝo” (Lenino). (laŭ „Indekso en *La kapitalo*” [n-ro 68 de la librofina librolisto]) -v1

3.1. La reakcia socialismo

de la labordivido, la koncentriĝon de la kapitaloj kaj de la grundposedo, la superproduktadon, la krizojn, la nepran pereon de la etburĝoj kaj etkampuloj, la mizeron de la proletaro, la anarĥion en la produktado, la akrajn malegalecojn en la disdivido de la riĉaĵo, la industrian neniig-militon de la nacioj inter si, la dissolviĝon de la malnovaj moroj, de la malnovaj familiaj rilatoj, de la malnovaj naciecoj.

Sed laŭ sia pozitiva enhavo tia socialismo volas aŭ restarigi la malnovajn produktad- kaj cirkulad-rimedojn kaj kun ili la malnovajn proprietrilatojn kaj la malnovan socion, aŭ ĝi volas perforte reenfermi la modernajn produktad- kaj cirkulad-rimedojn en la kadron de la malnovaj proprietrilatoj, kiuj estis krevigitaj, ja devis esti krevigitaj. Ambaŭkaze ĝi estas reakcia kaj utopia semtempe. Gilda sistemo en la manufakturo kaj ege postrestinta ekonomio en la kamparo, jen ĝiaj lastaj vortoj.

En sia plua evoluo, kiam la obstinaj historiaj faktoj forvaporigis ĉian ebriecon de memtrompo, tiu formo de socialismo dissolviĝis en mizeran lamentadon.⁸³

3.1.3 La germana aŭ „vera” socialismo

La socialista kaj komunista literaturo de Francujo, kiu estiĝis sub la premo de reganta burĝaro kaj estas la literatura esprimo de la batalo kontraŭ tiu regado, enkondukiĝis en Germanujon en epoko, kiam la burĝaro ĵus komencis sian batalon kontraŭ la feŭda absolutismo.

Germanaj filozofoj, duonfilozofoj kaj beletristoj avide alproprigis al si tiun literaturon kaj nur forgesis, ke ĉe la enmigrado de tiuj verkoj el Francujo la francaj vivkondiĉoj ne estis samtempe enmigrintaj en Germanujon. Pri la germanaj kondiĉoj la franca literaturo perdis ĉian rekte praktikan signifon kaj alprenis pure literaturan aspekton. Ĝi devis aperi kvazaŭ senutila spekulado pri la realigo de la homa esteco. Ekzemple, por la germanaj

83 Tiu ĉi frazo laŭ la eldono de 1888. -vl

3. Socialista kaj komunista literaturo

filozofoj de la 18-a jarcento, la postuloj de la unua franca revolucio havis nur la sencon esti postuloj de la „praktika racio”⁸⁴ ĝenerale, kaj la, volesprimo de la franca burĝaro signifis en iliaj okuloj la leĝojn de la pura volo, de la volo, kia ĝi devas esti, de la vere homa volo.

La laboro de la germanaj literaturistoj konsistis ekskluzive en la klopodo harmoniigi la novajn francajn ideojn kun sia malnova filozofia konscienco aŭ pli ĝuste, alproprigi al si la francajn ideojn el sia filozofia starpunkto.

Tiu alproprigo okazis same kiel oni entute alproprigas al si ion fremdan: per traduko.

Estas konate, kiel la monaĥoj skribis sur manuskripojn, en kiuj la klasikaj verkoj de la malnova pagana epoko estis notitaj, banalajn katolikajn historiojn de sanktuloj. La germanaj literaturistoj procedis inverse pri la profana franca literaturo. Ili skribis sian filozofian sensecaĵon sub la francan originalon. Ekz-e sub la francan kritikon de la monrilatoj ili skribis „fremdiĝo de la heimco”, sub la francan kritikon de la burĝa ŝtato ili skribis „nuligo de la regado de la abstrakta ĝeneralajaĵo”, ktp.

La subŝovon de tiuj filozofiaj dirmanieroj sub la francajn tekstojn ili nomis „filozofio de la ago”, „vera socialismo”, „germana scienco de socialismo”, „filozofia fondado de socialismo”, ktp.

La franca socialista-komunista literaturo estis tiel vere kastrita. Kaj ĉar ĝi en la mano de la germano ĉesis esprimi la batalon de klaso kontraŭ alia, tial la germano havis la konscion ke li superis la „francan unuflankecon”, ke li reprezentis anstataŭ verajn bezonojn la bezonon de la vero kaj anstataŭ la interesojn de la proletaro la interesojn de la homa naturo, de la homo entute, de la homo, kiu apartenas al neniu klaso, kiu neniel apartenas al la realo, sed nur al la nebuloj de la filozofia fantazio.

Tiu germana socialismo, kiu konsideris siajn mallertajn lerneknabajn

84 Aludo al la *Kritiko de la praktika racio*, de Kantio, publikigita en la jaro 1788 ĵus antaŭ la Franca Revolucio de 1789. -ecs

3.1. La reakcia socialismo

ekzercojn tiom seriozaj kaj solenaj kaj distrustpetis ilin tiom reklame, tamen iom post iom perdis sian pedantan senkulpecon.

La batalo de la germana, speciale la prusa burĝaro kontraŭ la feŭduloj kaj kontraŭ la absolutismo, mallonge, la liberala movado, fariĝis pli serioza.

La „vera” socialismo tiel kaptis la bonvenan okazon kontraŭmeti al tiu politika movado la socialisman postulon, la tradiciajn anatemojn kontraŭ la liberalismo, kontraŭ la reprezenta ŝtato⁸⁵, kontraŭ la burĝa konkurenco, burĝa gazetara libereco, burĝa juro, burĝaj libereco kaj egaleco kaj prediki al la popolamaso, ke ĉe tiu burĝa movado ĝi povas nenion gajni, sed ĉion perdi. La germana socialismo ĝustatempe forgesis, ke la franca kritiko, kies senspirita eĥo ĝi estis, premisis la modernan burĝan socion kun la respektivaj materiaj vivkondiĉoj kaj la kun ĝi kongrua politika konstitucio, dum en Germanujo ĉiuj ĉi premisoj estis ankoraŭ elbatalendaj.

Ĝi servis al la germanaj absolutaj registaroj kun ilia sekvantaro de pastr-oj, instruistoj, junkroj kaj burokratoj kiel dezirata birdotimigilo kontraŭ la minace leviĝanta burĝaro.

Ĝi servis kiel dolĉa kompletigo al la maldolĉaj vipobatoj kaj pafilaj kugloj, per kiuj la samaj registaroj pritraktis la germanajn laborist-ribelejn.

Dum la „vera” socialismo tiel fariĝis armilo en la mano de la registaroj kontraŭ la germana burĝaro, ĝi reprezentis ankaŭ rekte reakcian intereson, la intereson de la germana filistraro. En Germanujo, la etburĝaro, devena el la 16-a jarcento kaj de tiam en diversaj formoj ĉiam denove aperanta, estas la vera bazo de la ekzistantaj cirkonstancoj.

Konservi ĝin signifas konservi la ekzistantajn germanajn cirkonstancojn. De la industria kaj politika regado de la burĝaro la etburĝaro timas sian certan pereon, unuflanke pro la koncentriĝo de la kapitalo, aliflanke pro la apero de revolucia proletaro. La „vera” socialismo ŝajnis al ĝi mortigi du

85 Ŝtata organizita tiel ke la popolo per kunveno de siaj elektitaj delegitoj partoprenas en la estigo de la leĝoj. -vl

3. Socialista kaj komunista literaturo

muŝojn per unu frapo. Ĝi disvastiĝis kvazaŭ epidemio.

La teksaĵo, farita el spekulativa araneaĵo, brodita per beletraj ornamoj, trempita en amsufoka sentimentaleco, tiu bombasta teksaĵo, en kiun la germanaj socialistoj envolvis siajn malmultajn ostecajn „eternajn verojn”, kompreneble pliigis la vendon de ilia varo ĉe tia publiko.

La germana socialismo siavice ĉiam pli vidis sian destinon esti la bombasta reprezentanto de tiu etburĝa filistraro.

Ĝi proklamis la germanan nacion la normala nacio kaj la germanan filistran la normala homo. Ĝi donis al ĉiu lia fiaĵo kaŝitan, pli altan, socialisman sencon, en kiu ĝi signifis la rektan malon de ĝia vera senco. Ĝi tiris sian lastan konsekvencon per tio, ke ĝi elpaŝis rekte kontraŭ la „krude detrua” tendenco de la komunismo kaj anoncis sian senpartian superecon super ĉiaj klasbataloj. Kun tre malmultaj esceptoj ĉiuj laŭaserte socialistaj kaj komunistaj skribaĵoj, kiuj en Germanujo cirkulas, apartenas al la sfero de tiu kota, nervdetrua literaturo.⁸⁶

3.2 La konservativa aŭ burĝa socialismo

Parto de la burĝaro deziras forigi la socialajn maljustaĵojn, por certigi la pluan ekzistadon de la burĝa socio.

Al tiu parto apartenas: ekonomikistoj, filantropoj, humanuloj, , plibonigistoj de la situacio de la laborantaj klasoj, organizantoj de bonfaradoj,

86 La revolucia ŝtormo de 1848 forbalais ĉi tutan aĉan tendencon kaj forprenis al ĝiaj adeptoj la emon daŭre umi socialisme. La ĉefa reprezentanto kaj klasika tipo de tiu tendenco estas s-ro Karl Grün*. [Noto de Engelso al la germana eldono de 1890]

*) *Karl Theodor Ferdinand Grün* [kárl téodor férdinant grín] (1817 -1887); pseŭdonomo: *Ernst von der Haide*. Germana ĵurnalisto, filozofo kaj maldekstra demokrata politikisto. Pro siaj radikalaj ideoj li estis persekutata de la prusa registaro kaj vivis de 1844 plej ofte eksterlande. En Parizo li dense rilatis kun Prudono. Fine li vivis en Vieno, kie li eldonis la postlasaĵon de Ludoviko Fojerbaŭo. (Laŭ la germanlingva Vikipedio) -vl

3.2 La konservativa aŭ burĝa socialismo

forigantoj de bestturmentado, fondantoj de asocioj por moderiĝo, plej diversaj etreformistoj. Kaj tiu burĝa socialismo estis ankaŭ ellaborita al tutaj sistemoj.

Ni citu kiel ekzemplon la „Philosophie de la misère” de Prudono.⁸⁷

La socialistaj burĝoj volas la vivkondiĉojn de la moderna socio sen la nepre el ĝi estiĝantaj bataloj kaj danĝeroj. Ili volas la ekzistantan socion sen la elementoj kiuj revolucias kaj dissolvas ĝin. Ili volas la burĝaron sen la proletaro. La burĝaro imagas al si la mondon, en kiu ĝi regas, kompreneble kiel la mondon plej bonan. La burĝa socialismo ellaboras tiun konsolan imagon al duona aŭ tuta sistemo. Kiam ĝi instigas la proletaron realigi tiajn sistemojn kaj eniri la novan paradizon, tiam ĝi postulas envere nur, ke ĝi restu en la nuna socio, sed demetu siajn malicajn imagojn pri ĝi.

Dua, malpli sistema, nur pli praktika formo de tia socialismo provis malŝatigi al la laborista klaso ĉian revolucionan moviĝon, pruvante ke ne tiu aŭ alia politika ŝanĝo, sed nur ŝanĝo de la materiaj vivkondiĉoj, de la ekonomiaj kondiĉoj, povus utili al ĝi. Sed sub ŝanĝo de la materiaj vivkondiĉoj tiu socialismo komprenas tute ne la forigon de la burĝaj produktadkondiĉoj, kiu eblas nur revolucie, sed administratajn plibonigojn, kiuj okazu surbaze de tiuj ĉi produktadkondiĉoj, kiuj do ŝanĝus neniom pri la rilato inter kapitalo kaj dunglaboro, sed en la plej bona kazo malaltigus al la burĝaro la kostojn de ĝia regado kaj simpligus la mastrumadon de ĝia ŝtata buĝeto.

La burĝa socialismo atingas sian adekvatan esprimon nur tie, kie ĝi fariĝas nura retorika figuro.

Liberkomercon! – en la intereso de la laboranta klaso; protektajn dogan-impostojn! – en la intereso de la laboranta klaso; aliajn malliberejojn! – en la intereso de la laboranta klaso; jen la lasta, la sole serioze intencata vorto de la burĝa socialismo.

87 Karlo Markso analizis tiun prudonan verkon en: La mizero de la filozofio, res-
pondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparolo de Frede-
riko Engelso; Pri J. B. Prudono. (*Librofina librolisto n-ro 17*) -v1

3. Socialista kaj komunista literaturo

La socialismo de la burĝaro konsistas simple en la aserto, ke la burĝoj estas burĝoj – en la intereso de la laboranta klaso.

3.3 La kritike utopiecaj socialismo kaj komunismo

Ĉi tie ni ne parolas pri la literaturo, kiu en ĉiuj grandaj modernaj revolucioj esprimis la postulojn de la proletaro (la skribaĵoj de Babeuf⁸⁸ ktp).

La unuaj provoj de la proletaro, en tempo de ĝenerala ekscitiĝo, en la periodo de faligo de la feŭda socio rekte trudi sian propran klasan intereson, nepre fiaskis pro la ne evoluinta formo de la proletaro mem kaj pro la manko de materiaj kondiĉoj de ĝia liberiĝo, kiuj estas ja nur la produkto de la burĝa epoko. La evolucia literaturo, kiu akompanis tiujn unuajn moviĝojn de la proletaro, estas enhave nepre reakcia. Ĝi instruas ĝeneralan asketismon kaj krudan egaligon.

La envere socialismaj kaj komunismaj sistemoj, la sistemoj de Sensimono⁸⁹, Furiero⁹⁰, Owen⁹¹ ktp, aperas en la unua, neevoluinta periodo de la

88 *François Noël Babeuf* [frasŭá noél babéf] (1760-1797), nomata *Gracchus* [grakís] (ŝanĝinte mem sian personan nomon al tiu de famaj romaj sociaj reformistoj), franca revoluciulo. Li estis ekzekutita pro partopreno en ribelo kontraŭ la „direktorio” kun la celo daŭrigi la revolucion. Historiistoj konsideras lin la unua aktiva kaj revolucia socialisto. (Laŭ Vikipedio) -vl

89 *Claude Henri, Duc de Saint-Simon* [klód arí dík de sensimón] (1760-1825). Franca utopia socialisto. „Unu el la tre grandaj utopiistoj, kiuj agis en la servo de la interesoj de la proletaro [...] Lia akra vido kaŭzas, ke en liaj verkoj troviĝas ĝerme jam kvazaŭ ĉiuj ideoj ne strikte ekonomiaj de la posta socialismo.” (Engelso, laŭ „Indekso en *La kapitalo*” [n-ro 68 de la *librofina librolisto*]) -vl

90 *François Charles Fourier* [frasŭá ŝárl furié] (1772-1837), franca utopia socialisto. „En Furiero ni renkontas akran kritikon, aŭtente francan, sed ne malpli trafan, de la ekzistantaj sociaj institucioj. Li senindulge nudigis la materian kaj moralan mizeron de la burĝa mondo.” (Engelso, (laŭ „Indekso en *La kapitalo*” [n-ro 68 de la *librofina librolisto*]) -vl

91 *Robert Owen* [róbet óŭen] (1771-1868), angla utopia socialisto. Fabrikisto. Liaj praktikaj spertoj el liaj fabrikoj kondukis lin al la tereno de komunisma teorio.

3.3 La kritike utopiecaj socialismo kaj komunismo

batalo inter proletaro kaj burĝaro, kiun ni supre prezentis (vidu „Burĝaro kaj proletaro”).

La inventintoj de tiuj sistemoj vidas la antagonismon de la klasoj kaj la agadon de la dissolvantaj elementoj ja en la reganta socio mem. Sed ili vidas ĉe la proletaro nenian historian iniciaton, nenian al ĝi propran politikan movadon.

Ĉar la evoluo de la klasa antagonismo iras sampaŝe kun la evoluo de la industrio, ili ankaŭ ne trovas la materiajn kondiĉojn por la liberigo de la proletaro kaj serĉas socian sciencon, sociajn leĝojn, por krei tiujn kondiĉojn.

Anstataŭ socian agadon ili devas uzi sian persone inventan agadon, anstataŭ la historiajn kondiĉojn de liberigo, fantastajn, anstataŭ la iom post iom okazantan organiziĝon de la proletaro al klaso, mem elkovitan organizadon de la socio. La estonta mondhistorio por ili reduktiĝas en propagandon kaj praktikan plenumadon de iliaj planoj pri la socio.

Ili ja konscias, ke ili en siaj planoj reprezentas ĉefe la intereson de la laboranta klaso kiel la klaso plej suferanta. La proletaro ekzistas por ili nur sub tiu vidpunkto de plej suferanta klaso.

Sed la ne evoluinta formo de la klasbatalo kaj ilia propra vivsituaĵo sekvigas, ke ili kredas esti multe superaj al tiu klasa antagonismo. Ili volas plibonigi la vivsituaĵon de ĉiuj socianoj, ankaŭ de tiuj en la plej bona pozicio. Ili do konstante alvokas la tutan socion sendistinge kaj eĉ prefere la regantan klason. Oni bezonas ja nur kompreni ilian sistemon por agnoski ĝin kiel la plej bonan planon de la plej bona socio.

Li rifuzis ĉian perforton. Liaj provoj fondi en Nordameriko komunistajn koloniojn fiaskis. Vidante tion, „li dediĉis sin rekte al la laborista klaso, ene de kiu li daŭre laboris dum tridek jaroj. Ĉiuj sociaj movadoj kaj ĉiuj realaj procezoj kiuj en Anglujo progresis en la intereso de la laboristoj estis asociitaj kun la nomo de Oveno.” (Engelso, (laŭ „Indekso en *La kapitalo*” [n-ro 68 de la *librofina librolisto*]) -v1

3. Socialista kaj komunista literaturo

Pro tio ili refutas ĉian politikan, nome ĉian revolucionan agon, ili volas atingi sian celon sur paca vojo kaj provas per etaj, kompreneble fiaskantaj eksperimentoj, per la forto de la ekzemplo malfermi la vojon al la nova socia evangelio.

Tiu fantazia priskribo de la estonta socio estiĝis en tempo, kiam la proletaro estis ankoraŭ tre neevoluinta kaj do eĉ mem komprenis sian propran pozicion ankoraŭ fantazie; ĝi estiĝis en la unua imaga impulso de la proletaro pri ĝenerala transformado de la socio.

Sed la socialistaj kaj komunistaj eldonaĵoj konsistas ankaŭ el kritikaj elementoj. Ili atakas ĉiujn bazojn de la ekzistanta socio. Pro tio ili liveris plej valoran materialon por klerigo de la laboristoj. Iliaj pozitivaj proponoj pri la estonta socio, ekz-e forigo de la kontraŭeco inter urbo kaj kamparo, de la familio, de la privata akiro, de la dunglaboro, la proklamo de la socia harmonio, la transformo de la ŝtato en nuran mastrumadon de la produktado – ĉiuj ĉi iliaj proponoj esprimas nur la forigon de la klasa antagonismo, kiu ĵus nur komencis evolui kaj kiun ili konis nur en ĝia unua senforma malklareco. Tiuj proponoj mem havas do ankoraŭ pure utopiecan karakteron.

La graveco de la kritike utopieca socialismo aŭ komunismo estas inverse proporcia al la historia evoluo. En la sama mezuro, en kiu la klasbatalo evoluas kaj formiĝas, tiu fantazia leviĝo super ĝi, tiu fantazia batalo kontraŭ ĝi perdas ĉian praktikan valoron, ĉian teorion pravecon. Pro tio, kvankam la aŭtoroj de tiuj sistemoj estis multilate revoluciaj, iliaj disĉiploj ĉiufoje konsistigas reakciajn sektojn. Ili konservas la malnovajn konceptojn de la majstroj malgraŭ la historia progreso de la proletaro. Pro tio ili konsekvence provas malakrigi la klasbatalon kaj peri inter la antagonismoj. Ili daŭre revas pri la prova realigo de siaj sociaj utopioj, pri fondo de diversaj falansteroj, fondo de hejmkolonioj, starigo de malgranda Ikario⁹² – miniatura

92 Falansteroj estis la nomo de la socialismaj kolonioj planitaj de Karlo Furiero; Ikario la nomo, kiun Cabet* donis al sia utopio kaj poste al sia komunisma kolonio en Ameriko. [Noto de Engelso al la angla eldono de 1888]

3.3 La kritike utopiecaj socialismo kaj komunismo

eldono de la Nova Jerusalemo⁹³ —, kaj por la konstruado de ĉiuj ĉi aerkasteloj ili devas alvoki la homamon de la burĝaj koroj kaj monuoj. Iom post iom ili apartenas al la kategorio de la supre priskribitaj reaciaj aŭ konservativaj socialistoj kaj distingiĝas de ili jam nur per sia pli sistema pedanteco, per sia fanatika superstiĉo pri la miraklaj efikoj de sia socia scienco.

Pro tio ili fanatike kontraŭagas ĉian politikan movadon de la laboristoj, kiu, laŭ ili, povas estiĝi nur el la blinda nekredemo je la nova evangelio.

La ovenistoj en Anglujo, la furieristoj en Francujo reagas jen kontraŭ la ĉartistoj⁹⁴, jen kontraŭ la reformistoj⁹⁵.

4. Pozicio de la komunistoj rilate al la diversaj opoziciaj partioj

Laŭ la sekcio 2 la rilato de la komunistoj al la jam starigitaj laboristpartioj estas memkomprenebla, do ilia rilato al la ĉartistoj en Anglujo kaj al la

*) Vd p. 49, pn 27; p. 57, pn 47. -vl

Hejmkolonioj (enlandaj kolonioj) Oveno nomas siajn komunismajn modelsocietojn. *Falansteroj* estis la nomo de la sociaj palacoj planitaj de Furiero. Ikario nomiĝis la utopia lando de fantazio, kies komunismajn instituciojn priskribis Cabet. [Noto de Engelso al la germana eldono de 1890]

- 93 La *Nova Jerusalemo* (ankaŭ nomata *Ĉiela Jerusalemo*) fontas el vizio en la 21-a ĉapitro de la novtestamenta libro *Revelacio de Johano*, laŭ kiu fine de la apokalipso estiĝos nova urbo, venanta el la ĉielo, la nova Jerusalemo. Laŭ tiu libro, tio okazos, post kiam la malnova ĉielo kaj la malnova Tero estos pereintaj. La aŭtoroj de la *Manifesto* uzas tiun esprimon metafore en la senco de „estonta socio elrevata sen reala bazo”.

Pri la supre citita novtestamenta teksto vd Frederiko Engelso: La libro de revelacio (La apokalipso de Johano) (*librofina librolisto n-ro 101*). -vl

- 94 Ĉartistoj estis angla laborista partio, kiu de 1830 ĝis 1850 celis la ŝanĝon de la konstitucio (disvastigon de la elektraĵo, ktp) parte sur revolucia vojo, kiel per amasa peticio, manifestacio, ĝenerala striko. -ep
- 95 Temas pri etburĝaj respublikanaj demokratoj kaj etburĝaj socialistoj, adeptoj de la pariza gazeto „*La Réforme*” (kiu aperis inter 1843 kaj 1950), kiuj aĝitis por starigo de respubliko kaj por realigo de demokratiaj kaj socialaj reformoj. -ecs

4. Pozicio de la komunistoj rilate al la diversaj opoziciaj partioj

kampkulturaj reformistoj en Nordameriko.

Ili batalas por atingi la rekte aktualajn celojn kaj interesojn de la laborista klaso, sed ili reprezentas en la nuna movado samtempe la estontecon de la movado. En Francujo la komunistoj aliĝas al la social-demokrata partio⁹⁶ kontraŭ la konservativa kaj radikala burĝaro, sen ĉe tio rezigni pri la rajto kondukti kritike al la frazoj kaj iluzioj devenaj el la revolucia tradicio.

En Svislando ili subtenas la radikalulojn, sen ignori ke tiu partio konsistas el kontraŭdiraj elementoj, parte el demokratiaj socialistoj en la franca senco, parte el radikalaj burĝoj.

Inter la poloj la komunistoj subtenas la partion, kiu faras kampanon revolucion la kondiĉo de nacia liberigo, la saman partion, kiu estigis la Krakovan Ribelon de 1846⁹⁷.

96 La partio, kiu estis tiam reprezentata en la parlamento de *Ledru-Rollin* [ledrí rolén]*, en la literaturo de *Louis Blanc* [luí blán]** kaj en la artikoloj de la ĵurnalo *La Réforme* [larefórm]. La nomo „socialdemokrataro” ĉe tiuj ĝiaj inventoj signifis sektion de la demokrata aŭ respublikana partio kun pli aŭ malpli socialisma tendenco. [Noto de Engelso al la angla endono de 1888]
La partio, kiu tiam en Francujo nomis sin socialista-demokrata estis tiu, kiun *Ledru-Rollin* politike kaj *Louis Blanc* literature reprezentis; ĝi estis do abisme malsama ol la hodiaŭa germana socialdemokrataro. [Noto de Engelso al la germana eldono de 1890]

*) *Alexandre-Auguste Ledru-Rollin* [aleksádr-ogíst ledrí-rolé] (1807-1874), franca juristo kaj politikisto, fondis la gazeton *La Réforme* [La reformo]. -vl

**) *Jean-Joseph-Charles-Louis Blanc* [já-ĵozéf-ŝárl-luí blá] (1811-1882), franca utopia socialisto kaj fondinto de la socialdemokratio. Li provis mildigi la efikojn de la kapitalismo, ekz-e la senlaborecon, per reformo de la ekonomio bazita sur la politika dominado de la laborista klaso. En lia ĉefverko aperinta en 1839, *La organizado de la laboro* (*L'organisation du travail*) aperas por la unua fojo la postulo de rajto je laboro kiel civitana rajto kaj homrajto. (Laŭ la franca Vikipedio) -vl

97 En februaro de 1846 prepariĝis la ribelo en polaj regionoj por konkeri la nacian emancipiĝon de Pollando. La precipaj iniciatintoj de la ribelo estis la polaj

4. Pozicio de la komunistoj rilate al la diversaj opoziciaj partioj

En Germanujo la Komunista Partio, ekde kiam la burĝaro elpaŝas revolucie, batalas komune kun la burĝaro kontraŭ la absoluta monarĥio, la feŭda grundproprietaro kaj la etburĝaro.

Sed ĝi eĉ por momento ne preterlasas esti ĉe la laboristoj kiom eble plej klaran konscion pri la malamika kontraŭeco inter burĝaro kaj proletaro, por ke la germanaj laboristoj povu tuj turni la sociajn kaj politikajn kondiĉojn, kiujn la burĝaro devas kun sia regado alkonduki, kiel same multajn armilojn kontraŭ la burĝaron, por ke, post la faligo de la reaciaj klasoj en Germanujo, tuj komencu la batalo kontraŭ la burĝaro mem.

La komunistoj direktas sian atenton precipe al Germanujo, ĉar Germanujo staras rekte antaŭ burĝa revolucio kaj ĉar ĝi plenumos tiun transformegon sub pli progresintaj kondiĉoj de la eŭropa civilizacio entute kaj kun multe pli evoluinta proletaro ol Anglujo en la 17-a kaj Francujo en la 18-a jarcento, do ĉar la germana burĝa revolucio povas esti nenio alia ol la rekta antaŭludo al proletara revolucio.

Per unu vorto, La komunistoj subtenas ĉie ĉiun revolucionan movadon kontraŭ la ekzistantaj sociaj kaj politikaj cirkonstancoj.

En ĉiuj ĉi movadoj ili emfazas la demandon pri la proprieto, kian ajn pli aŭ malpli evoluintan formon tiu demando alprenis, kiel bazon de la movado.

La komunistoj, fine, laboras ĉie por la komunikado kaj interkompreniĝo de la demokratraj partioj de ĉiuj landoj.

La komunistoj malŝatas kaŝi siajn opiniojn kaj intencojn. Ili deklaras

revoluciaj demokratoj (*Dembovski* kaj aliaj). Sed pro la perfido de elementoj de la nobelaro kaj la aresto de la gvidantoj de la ribelo fare de la prusa polico, la ĝenerala ribelo ne okazis, escepte de kelkaj revoluciaj eksplodoj. Nur en Krakovo, submetita al la komuna regado de Aŭstrujo, Ruslando kaj Prusujo, la ribelantoj la 22-an de februaro sukcesis venki kaj starigi nacian registaron, kiu publikigis manifeston pri la abolo de la feŭdaj ŝarĝoj. La krakova ribelo estis disbatita komence de marto 1846. En novembro de la sama jaro, Aŭstrujo, Prusujo kaj Ruslando subskribis interkonsenton pri anekso de Krakovo al la aŭstra imperio. -ecs

4. Pozicio de la komunistoj rilate al la diversaj opoziciaj partioj

malkaŝe, ke iliaj celoj atingeblas nur per la perforta faligo de ĉia ĝisnuna sociordo. Tremu la regantaj klasoj pro komunista revolucio. La proletoj povas en ĝi nenion perdi krom siajn katenojn. Ili povas gajni mondon.

Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!

Postparolo de la tradukinto

La lasta Esperanta traduko de tiu fama teksto aperis libroforme unue antaŭ dudek kvar jaroj: *Karl Marx kaj Friedrich Engels*: Manifesto de la Komunista Partio, Esperanta traduko kaj postparolo de *Detlev Blanke*, Progreso, Moskvo, 1990, ISBN 5-01-002341-5.¹ Tiu libro, unu el la lastaj de la fama – bedaŭrinde malaperinta – moskva eldonejo, aperis kun belaj bildoj. Tiu eldono, kvankam presita en la respektinda eldonkvanto de 6.545 ekz-eroj, estas intertempe elĉerpita kaj ĉe la libroservo de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) jam ne havebla.

La sama teksto troviĝis – ĝis meze de 2009 – en la reto en la formo de „e-libro”, enpaĝigita de Franko *Luin* en la jaro 2002 kaj sub la ISBN-numero 91-7303-142-9, tiam libere elŝutebla ĉe <<http://www.omnibus.se/inko/>>.

La sama teksto – do en la formo aranĝita de Franko *Luin* – troviĝas nun en la retejo de multlingvaj eldonoj de marksaj kaj marksismaj verkoj: <<http://www.marxists.org/>>.

Tiu teksto estas reproduktita en la libro *Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908) (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo ...* (librofina librolisto n-ro 52). La korektoj de kelkaj evidentaj eraroj en la teksto de *Blanke* estas tie unuope menciitaj en piednotoj.²

1 Kursivigoj de mi, Vilhelmo Lutermano.

2 Eblas trovi la dokumentitajn korektojn en la menciita eldono de pluraj tradukoj (librofina librolisto n-ro 52). – Ĉi tie estas okazo senkulpigi nin ĉe Franko *Luin*: en la supre referencita libro ni supozis, ke la eraroj en la teksto de *Blanke* eble okazis ĉe lia ciferecigo; sed poste evidentiĝis, ke ĉiuj trovitaj eraroj estis jam en la libro eldonita ĉe *Progreso*. Fakte Franko *Luin* enretigis la tekston precize tia kia ĝi estis en la originala versio de *Progreso*.

Postparolo de la tradukinto

La traduko de *Blanke* entenas cetere ankaŭ legindan eseon pri la apartaj malfacilaĵoj de la tradukado de la originala teksto, en kiu li montras la diversajn solvojn de malfacile tradukeblaj teksteroj ĉe la diversaj tradukintoj – en la ĵus menciita libro (librofina librolisto n-ro 52), p. 85-90.

Tiu tre meritplena traduko de *Detlev Blanke* estis senkonteste la plej sukcesinta el la tri respektive kvar ĝis tiam disponeblaj Esperantaj versioj: ĝi estas ne nur kompleta – ĝi aperis, alie ol la antaŭaj tradukoj, kun ĉiuj antaŭparoloj de la du aŭtoroj (aŭ, post la morto de Markso, nur de Engelso) – ĝi krome kaj precipe evitis multajn erarojn de la antaŭaj tradukintoj kaj ties tiutempajn lingvajn kapricojn kaj estis entute multe pli flue legebla ol la antaŭaj versioj. Permesu al mi esprimi mian profundan admiron al la traduko de *Detlev Blanke*. Ĝi montras preskaŭ ĉiupaŝe, ke ĝi estas rezulto de tre zorgema kaj ĝisfunda pripensado, kiu igas ĝin klare supera al ĉiuj antaŭaj tradukoj de tiu grava dokumento. La malfacilon traduki la *Manifeston* notis cetere Engelso mem: Estas „senespere malfacila” traduki la *Manifeston*,³ „ĉar temas pri tute nova enhavo, por kies terminoj tiam ankoraŭ ne ekzistis ekvivalentoj en ĉiuj lingvoj. Kaj ĉar tiu nova enhavo estis prezentita eksterordinare dense, en tre bela stilo, ĉiuj ceteraj malfacilaĵoj de traduko de literatura teksto aldoniĝis.”⁴ Kaj por traduko al nia lingvo, tiuj malfacilaĵoj prezentiĝis ne nur por *Baker*, *Pfeffer* kaj *Veder*, sed, fine de la lasta jarcento, tute simile ankaŭ por *Blanke*, kiu suverene superis ilin.

Tamen *Blanke* ne povis profiti la intertempe okazintajn diskutojn pri lingvaĵoj, ekz-e en la diskutejo de la reta vortaro *ReVo* aŭ en aliaj diskutejoj. Krome kaj ĉefe, intertempe aperis nialingve relative granda kvanto da verkoj de Markso, Engelso, Lenino kaj de sufiĉe multaj nuntempaj marksistoj, kies tradukadoj alportis novajn spertojn kaj iom solidigis la uzadon de terminoj, de esprimoj kaj de nomoj, tiel ke fariĝis dezirinda renkonti ankaŭ en

3 Letero de Frederiko Engelso al *Friedrich Adolph Sorge* [frídriĥ ádolf zórge], la 29-an de junio 1883, en: MEW, vol. 36, p. 45.

4 *Martin Hundt: Wie das „Manifest” entstand* [Kiel la „Manifesto” estiĝis]. *Dietz Verlag*, Berlino (GDR), 1973, p. 131.

Postparolo de la tradukinto

la *Manifesto* la tie uzatan lingvon. Ankaŭ pro tio mi decidis prezenti ĉi tie komplete novan tradukon de tiu ĉi klasikaĵo.

Mi tradukis la tekston rekte el la germana originalo, sen konsulti iun el la antaŭaj tri (respektive kvar) tradukoj. Post la fino de mia traduko mi komparis mian rezulton kun la antaŭaj versioj kaj ĉe tio ŝanĝis kelkajn esprimojn, kiujn mi opinias pli bonaj en iu aŭ alia de la tri antaŭaj versioj. Tiujn ŝanĝojn mi dokumentas fine de tiu ĉi libro en la ĉapitro „Elpruntoj el antaŭaj versioj”. Tie videblas ke, post mia tradukado, mi plibonigis mian solvon plej ofte favore al tiu de *Blanke*.

Ŝajnas al mi tute klare, ke traduko kiom eble plej zorge farita kaj adaptita al la aktualaj bezonoj tamen ne estas senerara kaj senmakula. Pro tio mi petas la leganton indiki siajn korektojn aŭ ŝanĝproponojn en la diskutejo pri tiaj problemoj: kapitalrondo@yahoogroups.com, kun la vorto „manifesto” en la temlinio de sia mesaĝo.

La ĉi tie prezentata eldono de la *Manifesto* estas akompanata de enkonduko verkita de la antaŭ nelonge forpasinta *Eric Hobsbawm*, kiu interalie montras al la nunaj generacioj la valoron de tiu ĉi klasikaĵo por ilia propra klopodado trovi la vojon al pli homtaŭga socio.

Ĝuste ankaŭ por helpi tiun klopodadon aperas tiu ĉi eldono.

Principoj de tiu ĉi traduko

La leganto rimarkos, ke tiu ĉi traduko de la *Manifesto* prezentiĝas en siaj sintakso kaj terminaro alie ol la antaŭaj tri (parte kvar) tradukoj; krome rimarkeblas ankaŭ kelkaj principoj, kiujn mi sekvis ĉe la tradukado de tiu ĉi fama teksto. Mi nomu kelkajn el ili:

– Ĉe elekto inter sinonimaj esprimoj laŭeble preferi tiun, kiu estas Fundamenta aŭ almenaŭ plej oficiala (la principo, kiun sekvas ankaŭ la tradukskipo de *Le Monde diplomatique en Esperanto*, kaj ĝenerale la eldon-

Principoj de tiu ĉi traduko

aĵoj de la Monda Asembleo Socia (MAS);

– sistemeco de famaj propraj nomoj, kiuj krome ofte ripetiĝas. En la antaŭaj tradukoj ili aperas sufiĉe ĥaose: Ekz-e *Blanke* nomas la aŭtorojn *Karl Marx* kaj *Friedrich Engels*, sed ĉiam uzas *marksismo*, ĉe la adjektivo: *Marx'a, Engels'a*; *Pfeffer* skribas *Karlo Marks, Frederiko Engels*; *Baker* skribas *Karolo Marks, Frederiko Engels*, foje *Frederick Engels*. Mi decidis uzi ilian Esperantan formon konforme al la Plena Ilustrita Vortaro (PIV) kaj al la kutimoj en aliaj libroj de kaj pri marksismo aperintaj ĉe MAS; do, en la kazo de niaj aŭtoroj: *Karlo Markso* kaj *Frederiko Engelso*; same pri pluraj aliaj famaj nomoj, ekz-e *Darvino, Kantio*. Aliaj propraj nomoj, malmulte konataj aŭ malpli ofte uzataj en tiu ĉi teksto, aperas laŭeble en sia origina formo aŭ en formo kutima en latinlitera skribo; ili estas konsiderataj fremd-vortoj (vortoj, kiuj ne apartenas al nia lingvo) kaj do aperas ĉi tie kursive;

– konformeco de multaj terminoj kun la vortuzo de aliaj marksaj kaj marksismaj verkoj, ekz-e *produktadrimedoj; dunglaboristoj*;

– sistemeco de elparol-indikoj [*inter rektaj krampoj, minuskle kaj kursive, kun akcento sur la akcentata vokalo*];

– mallongigoj adaptitaj al aliaj eldonaĵoj de MAS, ekz-e „ekz.” -> ekz-e (ekzemple); „i. a.” -> i.a. (interalie); „ktp.” -> ktp (kaj tiel plu, sen punkto);

– reuzado de la Fundamenta ĥ, ekz-e *meĥanismo* anstataŭ „*mekanismo*” *monarĥio* anstataŭ „*monarkio*”;

– uzado de la Fundamentaj formoj de landnomoj, ekz-e *Germanujo, Rusujo* aŭ *Ruslando*, anstataŭ *Germanio, Rusio*, ktp;

– vortformoj aktuale interkonsentitaj de multaj vortaristoj en la Reta Vortaro (ReVo), ekz-e reuzado de *diktatoreco* anstataŭ „*diktaturo*” (diktatoreco ne estas eco de diktatoro, same kiel homaro ne estas aro da homoj!);

– anstataŭigo de romaj ciferoj (*III* -> 3.);

– uzado de la dekuma sistemo;

Principoj de tiu ĉi traduko

– plurfoja uzado de antaŭaj variantoj de la germana originalo favore al pli da klareco (ekz-e de la eldonoj de 1848, 1872 aŭ de 1888);

– multaj klarigoj en piednotoj de okazaĵoj aŭ de nomoj, kiujn nuntempaj legantoj, precipe (sed ne nur!) ekstereŭropaj, ne povas koni.

Mi dankas al MAS-anoj, kiuj kontribuis per diversaj ŝanĝproponoj al plibonigo de la Esperanta versio de tiu ĉi grava teksto.

Principoj de prezentado

La piednotoj de Engelso aŭ Markso estas markitaj kiel tiaj aŭ per la respektiva siglo (-fe), pri la ceteraj sigloj vidu *Sigloj*, p. 94.

Kursivigoj aŭ aliaj emfazoj en la teksto de la „Manifesto” estas tiuj de la aŭtoroj; en tekstoj de aliaj aŭtoroj kursiviĝis krom emfazoj ankaŭ la ne esperantaj vortoj aŭ vortformoj, ekz-e *Highgate*, *Hobsbawm*, *Blanke*, ktp.

Depruntoj el antaŭaj tradukoj

Post mia tradukado mi komparis la rezulton kun la antaŭaj tri (respektive kvar) tradukoj de la *Manifesto* kaj ankaŭ kun partoj de la teksto tradukitaj de Lanti⁵. Ĉe tiu kontrollegado mi transprenis plurajn esprimojn el antaŭaj tradukoj, kiujn mi taksis pli bonaj ol miajn. Por honori la intelektajn atingojn de la antaŭaj tradukintoj, mi ĉi-sube listigos laŭvice ĉiujn ŝanĝojn (en la sekva listo: mia origina solvo -> transprenita solvo, paĝo en tiu ĉi libro, tradukinto).

fabela -> neimagebla, p. 40 (de *Blanke*)

eltrovis -> elspionis, p. 43 (de *Blanke*)

foriĝo -> malapero, p. 48 (de *Blanke*)

5 E. Lanti: Manifesto de la Sennaciistoj kaj Dokumentoj pri Sennaciismo, tria eld., S.A.T., 1970.

Depruntoj el antaŭaj tradukoj

kronanta -> glora, p. 64 (de *Blanke*)

pli fruaj -> antaŭaj, p. 65 (de *Blanke*)

sensentan -> senaniman, p. 67 (de *Blanke*)

revado -> entuziasmo, p. 67 (de *Baker*)

kulturado de tutaj mondpartoj al kampkulturo -> *pretigado* ..., p. 69 (de *Baker*)

pidubigas -> dubindigas, p. 70 (de *Blanke*)

komerca artiklo -> komercaĵo, p. 71 (de *Baker*)

per sia laboro -> per studado, p. 75 (de *Blanke*)

propra produkto -> plej esenca produkto, p. 75 (de *Baker*)

Jes ja -> Ĝuste tiel, p. 80 (de *Blanke*)

Oni objctis -> Oni kontraŭargumentis, p. 81 (de *Blanke*)

spiritalaj produktoj -> intelektaj produktoj, p. 81, (de *Blanke*)

la malneŭtralan ideon -> la egoisman koncepton, p. 81 (de *Baker* kaj *Blanke*)

Ĉu necesas profundaj komprenoj -> ... ekkonoj (p. 84 de *Blanke*)

iliaj ideoj -> konceptoj (p. 84 de *Blanke*)

sciado -> scioj (p. 84 de *Blanke*)

Per tio, ke la proletaro ... -> Ĉar la proletaro (p. 83 de *Lanti*)

en la senco de la burĝaro -> en la burĝa senco (p. 83, de *Lanti*)

Proporcie al ... -> Laŭgrade kiel ... (p. 83 de *Lanti*)

en la okaziĝo de la movado -> dum la evoluo de la movado (p. 85 de *Blanke*)

pozicio -> sinteno (p. 83 de *Lanti*)

almozpetado -> malriĉeco (p. 89 de *Baker*)

Depruntoj el antaŭaj tradukoj

karnomortigo -> voluptomortigo (p. 89 de *Blanke*)
benas la koleron -> ... la ĉagrenon (p. 89 de *Blanke*)
necesa -> neevitebla (p. 88 de *Blanke*)
kompletigaĵo -> kompletiga parto (p. 89 de *Blanke*)
Tiu socialismo -> Tiu skolo de socialismo (p. 90 de *Baker*)
beligojn -> apologiojn (p. 90 de *Blanke*)
distribuado -> disdivido (p. 90 de *Blanke*)
kiun ili krevigis, nepre krevigis -> kiuj estis krevigitaj per tiuj rimedoj,
devis esti krevigitaj (p. 90 de *Blanke*)
per monaĥa vivo -> per vivo en monaĥ(in)a ĉelo (p. 89 de *Blanke*)
kondiĉoj -> cirkonstancoj (p. 93 kaj 100 de *Blanke*)
ĝi -> la etburgaro (p. 100 de *Blanke*)
lernej-ekzercojn -> lernejknaĵojn ekzercojn (p. 92 de *Blanke*)
homa esto -> homa naturo (p. 92 de *Blanke*)
kampo -> sfero (p. 93 de *Pfeffer*)
aĉa, nerve elĉerpanta -> kota, nervdetrua (p. 93 de *Blanke*)
laŭdire -> laŭaserte (p. 93 de *Blanke*)
memagadon -> iniciaton (p. 96 de *Blanke*)
eldiris -> esprimis (p. 95 de *Blanke*)
sencon -> karakteron (p. 97 de *Baker*)
utopiista -> utopieca (p. 97 de *Blanke*)
ekzistkialon -> pravecon (p. 98 de *Blanke*)
ege malsama -> abisme malsama (p. 99 de *Blanke*)

La supre menciitaj pruntaĵoj el tekstoj de antaŭaj tradukintoj estas prenitaj el la libro Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista

Depruntoj el antaŭaj tradukoj

Partio en la tradukoj de *Detlev Blanke* (1990), *Emil Pfeffer* (1923), *Arturo Baker* (1908), (*T. Veder* [1933]) kaj la germana originalo (librofina librolisto n-ro 52) kaj de Lanti (vd p. 106s, pn 5).

Mallongigoj

divl.	diversloke
EKRELO	Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo
ekz-e	ekzemple
ekz-ero	ekzemplero
ekz-o	ekzemplo
i.a.	inter aliaj, interalie
Indekso en <i>La kapitalo</i> :	Indekso de propraj nomoj, en: Karlo Markso: <i>La kapitalo</i> (n-ro 68 de la librofina librolisto), p. 728-753
k.s.	kaj simila(j); kaj simile
ktp	kaj tiel plu
l.c.	loko citita
MAS	Monda Asembleo Socia
MEW	<i>Karl Marx Friedrich Engels Werke</i> [Karlo Markso, Frederiko Engelso: Verkoj], eld. de la <i>Institut für Marxismus-Leninismus beim ZK der SED, Dietz Verlag</i> , Berlino (GDR)
n-ro	numero
p.	paĝo(j)
pn	piednoto(j)

Mallongigoj

resp.	respektive (-a, -aj)
ReVo	Reta Vortaro < www.reta-vortaro.de/revo/ >
s(j)	sekva(j) (post paĝindiko)
saml.	samloke
s.d.	sen datindiko
s.j.	sen jarindiko
s.l.	sen lokindiko
s.l.k.d.	sen indiko de loko nek dato
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda (laŭstatute: S.A.T.)
t.e.	tio estas
t.n.	tiel nomata(n, j, jn)
t.s.	tio signifas
v.c.	verko citita
vd	vidu
vol.	volumo

Sigloj

de tradukintoj

-ab Arturo Baker

Sigloj

- db Detlev Blanke
- ep Emil Pfeffer
- vl Vilhelmo Lutermano

aliaj sigloj

- ecs Editorial de Ciencias Sociales (Piednotoj el la libro Carlos Marx; Frederico Engels: Manifiesto Comunista, Editorial de Ciencias Sociales, Havano, 2009)
- fe Frederiko Engelso
- jf Jurij Finkel
- mev la redaktejo de *Marx-Engels Werke (MEW)*, la germana eldono de la verkaro de Markso kaj Engelso

Havano, en januaro de la jaro 2015

Vilhelmo Lutermano

La Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto *Le Monde diplomatique en Esperanto* (<http://eo.mondediplo.com>) – reta, laŭokaze ankaŭ papera – volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retroŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado tekstojn kunigitajn en la ĉi tie listigita libro „*Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...*” (*n-ro 10 en la sekva librolisto*). Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: <http://mas-eo.org> enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – jen en la vico de ilia apero:

1. – C. F. Ramuz: Aline (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-0-2

2. – Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verktoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 127 p., ISBN 918-2-9529537-2-6

3. – Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2007, 59 p., ISBN 978-2-9529537-1-9

4. – Kubaj infanrakontoj, trad. de Jozefo de *Jesús Campos Pacheco* kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, MAS, 2007, 120 p., ISBN 978-2-9529537-4-0

5. – GBEGLO Koffi: Esperantujismo, MAS, 2008, 72 p., ISBN 978-2-9529537-5-7

6. – Johano Besada: Eseoj, MAS, 2008, 92 p., ISBN 978-2-9529537-3-3

7. – [Karlo Markso] Markso hodiaŭ -- Nerefuteblaj citaĵoj, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2008, p. 91 p., ISBN 978-2-9529537-8-8

8. – Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj (2 paroladoj), elhispanigita de Amparado Cisnero, MAS, 2009, 84 p., ISBN 978-2-9529537-7-1

9. – Dominique Vidal kun Sébastien Boussois: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn 1947-1949, elfrancigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 361 p., ISBN 978-2-9529537-6-4

10. – Unuiĝintaj Nacioj: Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la

Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj – trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 230 p., ISBN 978-2-9529537-9-5

11. – Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-00-7

12. – Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 52 p., ISBN 978-2-918300-02-1

13. – Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso, trad. de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 44 p., ISBN 978-2-918300-03-8 (2-a eld.: 978-2-918300-21-2)

14. – Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo, MAS, 2009, 103 p., ISBN 978-2-918300-05-2

15. – Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio. Tri infanteatraĵoj. Elhispanigitaj de Jozefo de *Jesús Campos Pacheco* kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 112 p., ISBN 978-2-918300-04-5

16. – Kien Ĉinio? Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj. *François Jullien*: Ĉinscienco en sakrato – Ĉinio en la spegulo de Okcidento; *Manfred Szameitat*: Sukcesa, sed ne socialisma; *Ingo Nentwig*: Naciaj malplimultoj kaj politiko pri naciaj malplimultoj en la PR Ĉinio; *Barry Sautman*: Protestoj kaj separismo en Tibeto; *Michael Parenti*: La mito de Tibeto; *Enfu Cheng*: Fundamentaj trajtoj de la socialisma merkatekonomio; *Jian Xinhua*: Harmonia socio, salajrolaboro kaj klasbataloj; *Theodor Bergmann*: La socialisma disvolvo-strategio de la PR Ĉinio; *Rolf Berthold*: Pri la interna kaj ekstera politiko de la KP de Ĉinio; *Li Bingyan*: Ĉinio sub influo de la novliberalismo; *Helmut Peters*: Popolrespubliko Ĉinio: 30 jaroj da reform- kaj malferm-politiko; *Jean-Louis Rocca*: Ĉu la ĉina meza klaso estas revolucia? Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 142 p., ISBN 978-2-918300-06-9

17. – Karlo Markso: La mizero de la filozofio, respondo al J. B. Prudono: „La filozofio de la mizero”; kun antaŭparoloj de Frederiko Engelso; **Pri J. B. Prudono**. Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 196 p., ISBN 978-2-918300-08-3

18. – Jörg Goldberg k.a.: Ekonomia krizo – Analizoj n-ro 1, *Jörg Goldberg*: La historia pozicio de la nuna ekonomia krizo – pli da demandoj ol respondoj, *Horst Hensel*: La nomoj de la mono – kontribuado al karakterizo de la nuna kapitalismo, *Harald Werner*: Notoj pri la psiĥologio de la krizo, *Sarah Wagenknecht*: Brulfaristoj kiel fajrobrigado – Kritiko de la krizmastrumado, Elgermanigoj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 57 p., ISBN 978-2-918300-09-0

19. – Salim Lamrani (komp.): La terorismo de Usono kontraŭ Kubo – La Kuba Kvinopo, Howard Zinn: La radikoj de la politiko de Usono rilate Kubon, *Noam Chomsky*: Kubo kaj Usono – preskaŭ duonjarcento da teroro, *William Blum*: La nepardonebla revolucio, *Michael Parenti*: Agreso kaj propagando kontraŭ Kubo, *Piero Glejeses*: Kubo, Afriko kaj la

kvin kubanoj, **Ignacio Ramonet**: Miamo, nesto de teroristoj, **Salim Lamrani**: La Kuba-Usona Nacia Fondaĵo (KUNF) kaj la internacia terorismo, **Leonard Weinglass** : La proceso kontraŭ la Kuba Kvinopo, **Wayne Smith**: Trista paĝo en la historio de usona juro, **Saul Landau**: Kvin kubanoj en malliberejo: viktimoj de la obsedo de Bush, **Michael S. Smith**: Raporto pri du procesoj, **James Petras**: La Kvin Kubanoj – kandidatoj por la Nobel-premio, **Jitendra Sharma**: Veraj batalantoj kontraŭ terorismo, **Ricardo Alarcón de Quesada**: La kazo de la Kvin –pruvo de la terorismo de Usono kontraŭ Kubo, **Gianni Miná**: Historio kiun la amaskomunikiloj kaŝas – la kvin kubanoj, **Nadine Gordimer**: La homaro kiel reflektado de la justeco, tradukoj de div. MAS-anoj, MAS, 2009 tradukoj de div. MAS-anoj, 2009, ISBN 978-2-918300-10-6

20. – **Elisée BYELONGO IŜELOKE: Eĥoj el Bembujo**. Tradicio, rilatoj kun Banyamulenge, la genezo de la milito en Kongolando-Kinŝaso, kaj la diasporo rilate al Esperanto, MAS, 2009, 91 p., ISBN 978-2-918300-11-3

21. – **Oktobra Revolucio kaj la sekvoj. Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovet socio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 48 p., ISBN 978-2-918300-07-6

22. – **Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 2, Joachim Bischoff: La financkrizo kaj alternativoj, Andreas Fisahn: Demokratia stirado de la ekonomio, Manfred Sohn: Dek tezoj por sociigo de la cirkuladsfero, Luciano C. Martorano: Socialismo, sociigo, demokratio, Manfred Lauermann: La dialektika plan-ekonomio de Ĉinio – respondo al la financkrizo**, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 81 p., ISBN 978-2-918300-12-0

23. – **La homo kaj lia naturo – La bildo pri la homo en la kapitalisma socio kaj en marksismaj sciencoj. Lucien Sève: Ĉu la homo? – La marka antropologio kaj ĝiaj bazaj konceptoj, Werner Seppmann: Mond- kaj hom-bildoj – Pri la formoj de ideologiaj potenc-reproduktado, Helga E. Hörz: Ĉu la hombildo krizas? Hans-Peter Brenner: Biopsiĥosocia unuo homo – kogna cerbesplorado kaj ties impulsoj por la marksisma hombildo**, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, ISBN 978-2-918300-15-1

24. – **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj unua ĝis naŭa**, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2009, 381 p., ISBN 978-2-918300-13-7

25. **Karlo Markso; Frederiko Engelso: Tezoj pri Fojerbaĥo; Principoj de komunismo kaj aliaj verketoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-17-5

26. – **Frederiko Engelso: La origino de la familio, de la privata proprieto kaj de la ŝtato**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-16-8

27. – **Arnold Petersen: Komentoj al la „Komunista Manifesto”**, tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder, (reviziita reeldono de la sama, S.A.T., Parizo 1933), MAS, 2010, ISBN 978

-2-918300-19-9

28. – Ekonomia krizo, Analizoj n-ro 3 (2010), *Werner Seppman*: Riskokapitalismo;, *Richard Sorg*: Domenico Losurdo interpretas Niĉeon;, *Christina Kaindl*: Subjektiveco en la krizo; *Harald Werner*: La krizo en la ordinara konscio; *Christoph Butterwege*: Mondekonomiakrazo, evoluo de la socialŝtato kaj malriĉeco, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-22-9

29. – Werner Seppman: Laboro kaj dialektiko – Pri la emancip-horizonto de la Marksa pensado; Harald Neubert: La „historia misio de la laborista klaso” ĉe Markso kaj Engelso kaj la historia realeco; Hans Kölsch: Kubo – Heinz Dieterich – kontraŭe; Otto Meyer: Teologio de liberigo – ĉu etikedo-trompo aŭ paŝoj al emancipiĝo? Eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-18-2

30. – Adĵevi ADJE: El togolanda saĝosako, MAS, 2010, ISBN 9782-918300-20-5

31. – Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-25-0 (nur rete)

32. – Ivan Efremov: La nebulozo de Andromedo, Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 403 p., ISBN 978-2-918300-24-3

33. – Domenico Losurdo: Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 199 p., ISBN 978-2-918300-26-7

34. – Maritza Gutiérrez: José Martí – de kie kreskas la palmo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-28-1

35. – Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj deka ĝis dektria, Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 243 p., ISBN 978-2-918300-14-4

36. – Kien la klimato? Post Kopenhago kaj Koĉabambo, Eseoj kaj raportoj, Alexis Passadakis kaj Hendrik Sander: Konkurenco en la forcejo Klimatpolitikaj perspektivoj post la fiasko de Kopenhago; Hans-Jörg Schimmel: La ideologia dimensio de la CO₂-diskuto; Karl Hermen Tjaden: Kapitalmoviĝo kaj klimata okaziĝo; raportoj, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, ISBN

37. – Georgo Pleĥanov: Pri rolo de la persono en la historio, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 59 p., ISBN 978-2-918300-36-6.

38. – Karlo Markso: Pri la juda demando, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 49 p., ISBN 978-2-918300-29-8

39. – Eddy Raats: Post la pluvo, pluvego, Travivaĵoj de junulo, MAS, 2010, ISBN 978-2-918300-34-2

40. – Adebayo AFOLARANMI: Ronke, la ĵaluzulino, MAS, 2010, 85 p., ISBN 978-2-918300-35-9

41. – Jozefo Ŝlejŝtejno: Enkonduko en la studadon de Markso, Engelso kaj Lenino, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 271 p., ISBN 978-2-918300-27-4

42. – **Ivan Efremov: La Horo de Bovo.** Sciencfikcia romano, El la rusa tradukis Jurij Finkel, MAS, 2010, 573 p., ISBN 978-2-918300-37-3

43. – **Roger Martelli: La komunismo estas bona partio – diru al ĝi JES,** elfrancigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p. ISBN 978-2-918300-36-6

44. – **Karlo Markso: Kontribuajo al la kritiko de la hegela jurfilozofio. Enkonduko; Kontribuajo al la kritiko de la politika ekonomio. Antaŭparolo.** Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 36 p., ISBN 978-2-918300-38-0

45. – **Miriam Rodríguez; ALVERA: Desegni la parkon,** elhispanigis Jozefo de Jesús Campos Pacheco (porinfana pentrolibro), 28 p., ISBN 978-2-918300-23-6

46. – **Kien Afriko en la 21-a jarcento? Le Monde diplomatique en Esperanto,** MAS, 2010, 157 p., ISBN 978-2-918300-39-7

47. – **Paŭlo Popo: Ĉu sekso subfosas? Maldekstraj teorioj de seksa liberiĝo kaj de malkonstruo de seksa identeco.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 80 p., ISBN 978-2-918300-41-0

48. – **Ŝtejgervaldo, Roberto: Komunistaj star- kaj disput-punktoj,** elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 151 p., ISBN 978-2-918300-40-3

49. – **Jürgen Albohn: Teorio sen revolucia praktiko estas opio por la popolo – Kritiko de la Wertkritik.** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2010, 27 p., ISBN 978-2-918300-42-7

50. – **V. I. Lenin: Ŝtato kaj revolucio. La instruo de la marksismo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio.** Tradukis el la rusa G. Demidjuk, redaktis Jurij Finkel, MAS, 2011, 181 p., ISBN 978-2-918300-43-4

51. – **Unuiĝintaj Nacioj: Internacia Konvencio pri la protekto de la rajtoj de ĉiuj migraj laboristoj kaj de iliaj familianoj.** Tradukita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-44-1

52. – **Karlo Markso kaj Frederiko Engelo: Manifesto de la Komunista Partio en la tradukoj de Detlev Blanke (1990), Emil Pfeffer (1923), Arturo Baker (1908), (T. Veder [1933]) kaj la germana originalo,** komp. Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 289 p., ISBN 978-2-918300-45-8

53. – **Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, Ĉapitroj dekkvara ĝis dudekkvina,** Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 359 p., ISBN 978-2-918300-30-4

54. **Gvidlibreto por kompreni la internaciajn migradojn,** tradukita de Jeanne Marie Cash, desegnaĵoj de la tradukinto, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 15 p., ISBN 978-2-918300-47-2

55. **Miriam Rodríguez: Profiloj de Suno kaj Luno**, elhispanigita de Jozefo de Jesús Campos Pacheco, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Perera Gutiérrez, MAS, 2011, 30 p., ISBN 978-2-918300-46-5

56. **Frederiko Engelso: Ludoviko Fojerbaĥo kaj la fino de la klasika germana filozofio**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-48-9

57. **Georgo Dimitrofo: Raporto al la 7-a Kongreso de la Komunista Internacio; Harald Neubert: La Kominterno en la 1930-aj jaroj kaj la koncepto de unueco; kun enkonduko de Günther Judick**, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 113 p., ISBN 978-2-918300-49-6

58. **José María Arguedas: Yawar-festo (Sangofesto)**, Esperantigita de Franklin Montenegro, MAS, 2011, 256 p., ISBN 978-2-918300-51-9

59. **Ekonomia krizo n-ro 4**. Joachim Becker: EU – de la ekonomia al la integriĝa krizo. Jörg Goldberg: La mondo de la du rapidoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 52 p., ISBN 978-2-918300-52-6

60. **Frederiko Engelso en aktualaj diskutoj**. Werner Seppmann: Privilegia loko por rigardi en la laborejon de la marksisma pensado. Notoj pri la korespondado inter Markso kaj Engelso; Erwin Marquit: Engelso kaj logikaj kontraŭdiroj; Karl Hermann Tjaden: Kial ne estiĝis vera engelsismo, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 35 p., ISBN 978-2-918300-50-2

61. **V. I. Lenino: Tri fontoj kaj tri partoj de la marksismo**; Anarĥiismo kaj socialismo; Pri la slogano de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo; La oportunismo kaj la kolapso de la 2-a internacio; La diferencoj en la eŭropa laborista movado; Antaŭparolo al la broŝuro de N. Buĥarin: „Mondekonomio kaj imperiismo”; elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 40 p., ISBN 978-2-918300-53-3

62. **Daŭrigo de la Manifesto, Moderna poziciigo de komunista partio, La programo de la Germana Komunista Partio DKP**, kun antaŭparolo de Helmut Dunkhase, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 63 p., ISBN 978-2-918300-54-0

63. **Lode Van de Velde: Epizodoj**, MAS, 2011, 57 p., ISBN 978-2-918300-55-7

64. **Jasuo HORI: Tertrema katastrofo de Japanio. Taglibro**, MAS kaj SAT, 2011, 165 p., ISBN 978-2-918300-56-4

65. **Werner Seppmann: La malkonfesata klaso.. Pri la laborista klaso hodiaŭ**, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2011, 176 p., ISBN 978-2-918300-57-1

66. **Roberto Ŝtejgervaldo: Sen laborista klaso okazas nenio esenca, sed sole kun ĝi – ankaŭ ne; Werner Seppmann: Remalkovro de la klasoj**, elgermanigitaj de Vilhelmo Luter-

mano, MAS, 2011, 35 paĝoj, ISBN 978-2-918300-58-8

67. Elmar Getto: Brazilo transe de piedpilko kaj sambo. Germanigita de Karl Weiss, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-60-1

68. Karlo Markso: La kapitalo. Volumo I, Kritiko de la politika ekonomio. Libro I: La produktadprocezo de la kapitalo, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, ISBN 978-2-918300-59-5

69. Kien la klimato? N-ro 2, MAS, 2011, 61 p., ISBN 978-2-918300-61-8

70. Berto Breĥto: Historioj pri S-ro Kojno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 43 p., ISBN 978-2-918300-62-5 (ekskluzive kiel materialo por seminario ĉe MAS)

71. Ivan Efremov: Rakontoj pri neordinaraĵoj, tradukitaj el la rusa de Jurij Finkel, MAS, 2011, 604 p., ISBN 978-2-918300-63-2

72. Alfredo Bauer: Kritika historio de la judoj, vol. 1, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 459 p., ISBN 978-2-918300-64-9

73. Karlo Markso: Respondo al V. I. Sasuliĉ, kun Klaus Giettinger: La miskompreno, elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2011, 59 p., ISBN 978-2-918300-71-7

74. Frederiko Engelso: La evoluo de la socialismo de utopio al scienco, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 65 p., ISBN 978-2-918300-65-6

75. Georgo Fulberto: „La kapitalo” koncize. Kun recenzo de Lucas Zeise. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 98 p., ISBN 978-2-918300-72-4

76. Ivan Efremov: Tais el Ateno. El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2012, 533 p., ISBN 978-2-918300-73-1

77. Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, en: Vilhelmo Lutermano: Materialo por la seminario de MAS: „Berto Breĥto kaj klasa moralo en liaj verkoj «Historioj pri S-ro Kojno» kaj «Me-ti, libro de turnoj», Parto 2-a: «Berto Breĥto: Me-ti, libro de turnoj»”, MAS, 2012, 147 p., ISBN 978-2-918300-74-8

78. Eddy Raats: Pasio, defio, amikeco. Spertoj de montgrimpisto. MAS, 2012, 95 p., ISBN 978-2-918300-70-0

79. Eddy Raats: La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo. 2-a eld., MAS, 2012, 99 p., ISBN 978-2-918300-76-2

80. V. I. Lenin: Imperiismo, kiel la plej alta stadio de kapitalismo. (populara eseoj) El la rusa tradukis Jurij Finkel. Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 125 p., ISBN 978-2-918300-77-9

81. Yoandry Martínez Rodríguez: Tri en la montaro. Tri infanteatraĵoj kun desegnaĵoj de

Adrián Armas González. Elhispanigita de Jozefo de J. Campos Pacheco, MAS, 2012, 54 p., ISBN 978-2-918300-79-3

82. Kien la klimato? N-ro 3 (2012) Pri la roloj de kresko kaj de merkato en la tasko protekti la klimaton, Kvin eseoj elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 62 p., ISBN 978-2-918300-80-9

83. Rolfo Lotero: Ĉu evolucio aŭ kreado? Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2012, 22 paĝoj, ISBN 978-2-918300-81-6

84. Hans' Magno Encensbergo: Defendo de la lupoj kontraŭ la ŝafidoj. Poemoj. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 118 p., ISBN 978-2-918300-75-5

85. Domeniko Losurdo: Libereco kiel privilegio. Kontraŭhistorio de la liberalismo. Esperantigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2012, 379 p., ISBN 978-2-918300-82-3

86. Franco Kafka: Letero al la patro. Kun akompanaj tekstoj kaj postparolo de Michael Müller. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. MAS, 2012, 81 p., ISBN 978-2-918300-83-0

87. Aleksandro Grin: Skarlataj veloj. La ora ĉeno. Kuranta sur ondoj. Mallongaj rakontoj. El la rusa tradukis Jurij Finkel. MAS, 2013, 418 p., ISBN 978-2-918300-84-7

88. Lothar Peter: Postmoderna maldekstra radikalismo – ĉu vojo al nova estonteco? Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 25 p., ISBN 978-2-918300-85-4

89. Ontologio kaj fremdiĝo nuntempe. Domeniko Losurdo: Hegelo, Markso kaj la Ontologio de la socia esto; Claudius Vellay: Fremdiĝo el la vidpunkto de la ontologio de Lukaĉo. Materiisma etiko ĉi-flanke de religio kaj kredo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 61 p., ISBN 978-2-918300-86-1

90. Roberto Ŝteĝervaldo: Postmoderno estas nova melodio al malnova teksto. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-87-8

91. Heinz Dieterich: Transiroj al la socialismo en la 21-a jarcento, elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 22 p., ISBN 978-2-918300-88-5

92. Frederiko Engelo: Enkonduko al Karlo Markso: Klasbataloj en Francujo 1848 ĝis 1850 (1895), elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 23 p., 2013, ISBN 978-2-918300-89-2

93. Máté Zalka: Doberdo. Romano tradukita el la hungara de János Petik, MAS, 2013, 317 p., ISBN 978-2-918300-90-8

94. Jean-Guy Allard: Teroristoj de Usono kontraŭ Latinameriko. Artikoloj tradukitaj de Norberto Díaz Guevara kaj de ceteraj MAS-anoj, MAS, 2013, 445 p., ISBN 978-2-918300-78-6

95. Bartolomeo Laskaso: Raporto pri la detruado de Indio, kun Hans' Magno

Encensbergo: Retrorigardo en la estontecon. Tradukitaj el la hispana de Ludoviko *Serrano Pérez* kaj el la germana de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 107 p., ISBN 978-2-918300-66-3

96. V. Adoratskij: Kio estas marksismo kaj leninismo. El la rusa lingvo tradukis F. Robiček, lingve kontrolis E. Drezén. Reeldono de la verko aperinta ĉe EKRELO laŭ vortrekona skano de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 36 p., ISBN 978-2-918300-92-2

97. Lenino: Pri religio. Du artikoloj. Socialismo kaj religio, trad. M. Lapin kaj G. Demidjuk; **Pri rilato de laborista partio al religio,** trad G. Demidjuk; redaktitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 28 p., ISBN 978-2-918300-96-0

98. Instituto Markso-Engelso-Lenino: La instruo de Karlo Markso. El la rusa lingvo tradukis P. Gavrilov, N. Incertov, V. Polakov, E. Ŝvedova. Lingve kontrolis V. Polakov. EKRELO, Amsterdamo, 1933. Reeldono ĉe MAS laŭ vortrekona skanado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 39 p., ISBN 978-2-918300-95-3

99. Ignacio Ramonet: La eksplodo de la ĵurnalismo. De la amaskomunikiloj al la amaso de komunikiloj. Tradukita de Maria Julia Cárdenas Cápiro kaj Vilhelmo Lutermano, MAS, 2013, 104 p., ISBN 978-2-918300-95-3

100. Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio, kun enkonduko de Eric Hobsbawm, Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2015, 113 p., ISBN 978-2-918300-91-5 (tiu ĉi libro)

101. Frederiko Engelso: La libro de revelacio (La apokalipso de Johano). Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 28 p., ISBN 978-918300-97-7

102. Karlo Radeko: Kapitalisma sklaveco kaj socialisma labor-organizo, EKRELO, Lepsiko, 1931, reeldonita de MAS, laŭ vortrekona skanado de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) fare de Roy McCoy, redaktita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 43 p., ISBN 987-2-918300-94-6

103. Frederiko Engelso: Pri la loĝejproblemo. Elgermanigita de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 80 p., ISBN 978-2-918300-98-4

104. Aleksandro Grin: La mondo brilanta. La vojo nenien. Cent verstoj laŭ rivero. El la rusa tradukis Jurij Finkel. Ilustraĵoj de S. G. Brodskij, MAS, 2014, 434 p., ISBN 978-2-918300-99-1

105. Historio estas farata. Kontribuaĵoj al la materiisma koncepto de historio. Georg Fülberth: La invento de la meztavolo; Lucas Zeise: Pri la homo oeconomicus, pri la ekonomio kaj pri la laboro; Hans-Peter Brenner: La rilato inter homo kaj naturo. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano. Monda Asembleo Socia (MAS), 2014, 37 p., ISBN 978-2-36960-001-5

106. Thomas Metscher: Lingvo kiel praktika mondkonscio. Rimarkoj pri la marka kaj engelsa lingvokoncepto kaj pri ĝiaj sekvoj; Roberto Ŝteĝervaldo: Tutsimple marksismo (recenzo); Thomas Metscher: Breĥto kaj la alta arto de simpleco. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, Monda Asembleo Socia (MAS), 2014, 46 p., ISBN 978-2-36960-000-8

107. Milito kaj paco. Berto Breĥto: La memoro de la homaro; Andrew Murray: Milito kaj kontraŭstaro al milito; Erhard Crome: Ĉu jarcento pacifika? Bernd Müller: Du strategioj de la ekspansio orienten; Hermann Kopp: Recenzo de la libro de Peter Strutyński pri senpilotaj flugmaŝinoj por batalo (sepavoj); Thomas Metscher: „Malbenita estu la milito”. Politika poezio – pensadoj pri disputata nocio; 15 jaroj NATO-agreso kontraŭ la Federacia Respubliko Jugoslavio; Werner Ruf: La ĝihadisma internacio. Ĉu variaĵo de privata milita entreprenismo?; Andreas Wehr: Pri la aktualeco de la imperismo-demando. Elgermanigitaj de Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 82 p., ISBN 978-2-36960-002-2

108. Thomas Metscher: Socialisma avangardo kaj realismo. Pri la estetiko de Dmitri Ŝostakoviĉ. Elgermanigis Vilhelmo Lutermano, MAS, 2014, 40 p., ISBN 978-2-36960-003-9

La libroj akireblas ĉe Esperantaj libroservoj, ĉiukaze ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Elĉerpitaj libroj estas elŝuteblaj ĉe FEL. Por MAS-anoj ĉiuj libroj de MAS estas senpage elŝuteblaj el la retpaĝo de la asembleo-listo de MAS.

Karlo Markso kaj Frederiko Engelso:
Manifesto de la Komunista Partio
kun enkonduko de *Eric Hobsbawm*
tradukitaj de Vilhelmo Lutermano

Monda Asembleo Socia (MAS)

2015

ISBN 978-2-918300-91-5

Enpaĝigita de MAS per LibreOffice 4.2.6.3 kaj litertiparo *Liberation Serif*
10 kaj 9 pt sub *Linukso Mint Versio 17 "Quiana"*

Presita en Britujo
en la jaro 2015